

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA

KUL

Esperanto

1022 I

E. L. Meier

—•—
KVIN NOVELOJ



INTERNACIA MONDLITERATURO 5/6

Meier

E. L. Meier

KVIN NOVELOJ

esperantigitaj laŭ germanaj aŭtoroj



1912

FERDINAND HIRT & SOHN EN LEIPZIG
ESPERANTO-FAKO



12746

spec 1022 I



J-11200

K. F. v. Rumohr

LASTA SVELLO

Sed konservo de sekreto estas malfacila, kiam oni estas observata de ĉiuj.

La Roma'a nobelaro precipe klopodis akiri la favoron de la eminenta sinjorino. La sendependeco de ŝia animo kaj la eminenteco de ŝia situacio ŝajnis promesi al ĝi protekton kontraŭ la arbitrecon kaj perfortecon de multaj el la gento Farnese. Kaj, kredeble, Margareta malpublike klopodis por antaŭrimedi maljustecon, neniigi iliajn efikojn, almenaŭ plibonigi tiujn ĉi; certe, la papo honoris ŝin, kaj ŝin timis lia plej sovaĝa nevo, kiun baldaŭ poste trafis la rekompenco en Parma. Oni aranĝis brilantajn festojn, por amuzi la principinon kaj alligi ŝin al Roma, kie ŝia potenco, ŝajne, estis necesega. Ĝuste tiutempe ŝi ĵus revenis de la kortego imperiestra, kiu estis ricevinta ŝin kun granda distingo kaj, kredeble intence, montrinta al mondo, kiom valoras por la imperiestro ŝia opinio kaj juĝo. Sciigo pligrandiga pri ŝia influo estis antaŭrapidinta Roma'n, kie oni des pli fervore preparis sin por ŝia solena ricevo. La preparoj ne estis ankoraŭ finitaj, kiam la principino proksimiĝis al la urbo; tial ŝi, pretekste por ripoziĝi post la longdaŭra vojaĝo, ekhaltis ĉe sia kastelo de Kaprarola. Ŝia koro ne sentis gaje nek festene; tial ŝi volonte restadis en tiu grandioza, sed tamen soleca kastelo,

mireginda konstruaĵo de Vignola, kie kampara komforto kaj princa pompo leviĝas el kaj super nepereigeblaj fortikajaj muregoj kaj kun tiuj ĉi ŝajnis esti tiel samcelaj, ke iu alvidanta ilin estis inklina kredi, ke la bastionoj de la potenca kvinangulaĵo estas necesegaj abutmentoj*) de la suprencelanta palaco. Tie, en la arkaĵoj kiuj malfermiĝas kontraŭ la ebenaĵo, la principino amis malrapide promenadi; volonte ŝi super-rigardis, de tiu aeruma altaĵo, la dezertigitan vastan landon, kaj, tiam kaj tiam, turnis rigardojn malsupren kontraŭ la serioza montaro, kiu maldekstre limas la ebenaĵon. Tiu, vere, estis larmige bela vido; ĝi ankaŭ akordiĝis kun ŝia humoro.

Forlasinte sian patron, malfortan kaj malsanan, ŝi evidente konvinkiĝis de la vereco de l' famo, ke lia vivoforto iom post iom malfortiĝis kaj lia volo estis rompita. Ŝi intime amis sian patron kiel sian bonfarinton, kreinton de sia grandeco, kies valoron ŝi sentis. Sed pli ol tiuj ĉi pli ĝeneralaj sentoj de infana intereso, korprenis ŝin la antaŭvido de malbonoj kaj konfuzoj, kiujn minacis kaŭzi la nuna malforteco kaj neeviteble proksima morto de l' imperiestro. Ŝia vireca spirito estis frutempe maturiĝinta;

*) konstruero kontraŭ premanta pezo.

ŝi ĝuis la fidon de sia patro, kiu lasis ŝin intime interniĝi en la misteroj de siaj kuraĝaj kaj noblaj decidoj. Antaŭsentante ŝian destinon, li klopodis prepari ŝin por la gvidado de la grandaj mondaj aferoj, konfidante al ŝi, dum liberaj momentoj, tion, kion li estis celinta, atinginta aŭ maltrafinta. Tial ŝi juĝis pri la interrilitoj de la ŝtatoj de sia tempo de pli alta vidpunkto, kaj komprenis ilin multe pli ĝenerale, ol tiuj, kiuj estis maljuniĝintaj en militaj kaj pacaj oficoj. Ĉar tiu, kiu dum longa tempo okupas sin nur kun subaj aferoj kaj celas akiri majstrecon en tiuj, per penado kaj persisto, tiu necese perdos la superrigardon de la tuto, supozite ke entute li iam akiris ĝin. Tiuspecaj spertoj estas tre oftaj, kaj, tiel ofte supreniĝintaj ŝtatistoj uzadas la bagatelemon de subaj oficaĵ branĉoj por la administrado de la grandaj kaj ĝeneralaj aferoj, ke oni jam faris pri tio proverbon, kiu estas ĝenerale konata. Certe, Margareta jam tiutempe kalkulis la neeviteblajn konsekvencojn de la pli kaj pli kreskanta sendependeco de la pli altaj ŝtataj oficistoj de sia patro! Rimarkante tion, ŝi estis maltrankviligata per la malforteco de sia legitima frato Filipino; ĉar ŝi ĝuste konkludis, laŭ liaj agoj kaj diroj, ke li, estonte, pli konsideros la ŝajnon ol la estecon de regado,

kaj sekve serveme obeos tiujn, kiuj scios tre trompe ŝajniĝi antaŭ li obeemon kaj plenan submetemon sub liaj voloĵ. Sed ankaŭ ŝia propra situacio estis duba. Provinde sian fiereman kaj malintiman fraton kaj la potenculojn de la nuna kaj de la estonta kortegoj kun trankvilo kaj senpacienco, ŝi, vere, ne povis plue ignori, ke ŝia estimo kaj influo ĉesos kun la vivo de la imperiestro. La nova, ankoraŭ neamata, grandeco de la familio Farnese, kaj la maljuniĝanta papo promesis nur malmulte da kompenso de tiu perdo! Ĉiu potenculo, ĉe kortego aŭ kie ajn homoj efikigas superecon, ĉiam volas vidigi kontenton, bonecon kaj indulgon; tial li devas enfermi sian funebbron, siajn zorgojn kaj malbonhumorojn en la plej internan parton de l' koro; ĉar neniam perdos li la timon, ofendi aŭ repuŝi subulojn per rapida diro aŭ nepripensita mieno; prudento kaj grandanimeco sammaniere devigas lin doni favoron kaj konsideron al ĉiuj. — Kvankam tio estas publika, de longtempe malkovrita sekreto, tamen la masko de favora sento ĉiutage denove sentigas al ĉiu unuopa esperojn, kiuj, se iam entute, tamen nur tre hazarde plenumiĝos; ĉar, koncerne niaj propraj aferoj, ni homoj rigardas tra kolorigitaj okulvitroj kaj amas sindonon al trompaj esperoj;

kaj de tio ĉi devenas la feliĉigo de tiaj vantaj signoj de favoro, kiu ĉiam estos necerta kaj ŝangebla, eĉ tiam, kiam ĝi estas vera!

Margareta jam frutempe rimarkis la artifikojn de kortega vivado, meditis pri ili, kaj esploris pri iliaj kaŭzoj kaj utilo; ŝi kredis, ke la praktikado de tiuj estas devo de ŝia situacio, almenaŭ ŝi devos per tiu farado alkonformiĝi al kutimo. La matenon de sia eniro en la urbon, ŝi ekstarigis de lito frutempe, por, post ĉeesto ĉe meso kun intima pieco, alfari sian kostumon al la tago. Ŝi elektis robon de malhelverda veluro kun riĉa brodaĵo, kovrante la brakojn ĝis manoj kaj kolon ĝis mentono; metis sur ŝultrojn mallongan mantelon, kies longa bordero estis brodita per oro kaj perloj. Ŝian kapon kovris malgranda ĉapelo nigra, kies gracia ardeopluma peniko estis fiksita per multepreza juvelo. Tiel ornamita ŝi eniris kaleŝon kun siaj sinjorinoj. Alveturinte la lokon, kie ŝi renkontu la festan procesion de l' Roma'a nobelaro, la veturilo ekhaltis, kaj la principino eliris el ĝi, por, kun siaj sinjorinoj, suriri ĉevalojn. Kun nobla sinteno kaj tute senhelpe ŝi svingis sin sur la multekolharan ĉevalon, kies selo kaj ĉabrako estis helruĝe veluraj, sed piedingo kaj bridaĵo orumitaj. Malgranda gvardio de tute armitaj lancistoj rajdantaj, kiuj ĝis nun estis sekvintaj la kaleŝon,

nun antaŭgalopis la rajdantarojn kun mezurita interspaco. La antaŭaj lancistoj klinis la brilantajn lancojn iom antaŭen, sed la sekvantaj tenis ilin rekte supren. Saminterspace de tiu ĉi antaŭgvardio kaj la malrapide sekvanta akompanantaro de la kaleŝo, rajdis la principidino, ĉirkaŭita de siaj sinjorinoj kaj la cetera korteganaro.

Ankaŭ la renkonte alvenantoj estis gvidataj per densa aro de plene armitaj kavaliroj. Dum la alrajidado ĝi okupis la tutan larĝon de la strato, per tio kovrante al la antaŭgvardio de la principidino la sekvantan pacan pompon. Sed, momente de la kunveno, ĝi dividiĝis laŭlonge, deflankiĝis rapidege dekstren kaj maldekstren por, post bela rondmoviĝo, formi brilantan duoblan serion sur la apuda kampo. Ambaŭ la serioj restis sufiĉe malproksime de la strato, por lasi spacon al la rajdantoj de la principidino, por simila moviĝo. Tiuj ĉi ankaŭ tuj faris analogan, kvankam kun malpli da ordo kaj eleganteco.

La principidino, rigardante la militan ludon kun intereso, kaj nun atendente surprizojn, turnis la rigardon kontraŭ la strato, sur kiu longa aro de junaj nobeloj de la urbo kaj ĉirkaŭaĵo rajdante proksimiĝis kaj dume faris, laŭ tiama kutimo, ĉiuspecajn artifikaĵojn,, nome kapriolojn, kurvetojn ktp. Estis nobla kaj ele-

ganta vido, kiam ili nun samtempe deiris de ĉevaloj, transdonis tiujn ĉi al siaj stalestroj, por tiam, dense marŝante, proksimiĝi al la principino, kiu kun siaj sinjorinoj restis surĉevalo, nur malmulte altirante bridon por atendi la alvenantojn kaj ricevi ilin kun trankvila sintenado.

La brilanta floraro de la Roma'aj nobeloj kaj la velkaj aĵoj de la pli moderna tempo ne estas iel similaj. Iom post iom la anoj de la eklezia potenco foriris, aŭ almenaŭ ombris la anoj de la eklezia potenco la idojn de tiuj gentoj, kiuj de la tempo de la Otto'agento estis alprenintaj imperiestrajn feŭdojn en la Roma'a lando; kaj nuntempe, la Roma'a nobelaro, eĉ se gloregaj nomoj ornamas ĝin, konigas, ke ĝi ŝuldas sian grandecon al infulo,^{*)} nek al glavo! Sed tiutempe ekzistis ankoraŭ granda nombro da antikvaj kaj potencaj gentoj, kiuj zorgeme tradiciigis la virtojn, certe ankaŭ la difektojn, de la feŭda nobelaro al siaj posteuloj. Ili estis plenaj de netrouzita forto, tial voluptemaj; plenaj de kuraĝo, tial ankaŭ tromemfidaj, ordonemaj kaj perfortemaj. Oni, kutime, grandioze projektis spiritan instruon kaj edukon de tiu malkvieta junularo; sed oni ne estis persistema nek zorg-

*) Infulo (germane: Inful) episkopa ĉapo.

ema pri la plenumo de la unua projekto. La vivado de ĉiu unuopa estis romana, plena de geniaj trajtoj, interesaj komplikaĵoj kaj riskaĵoj, sed sen iu interrilato nek ĝenerala karaktero. Inter tiaj kunuloj superstaris juna Savello pro kuraĝo kaj spriteco; kaj la antikveco de lia gento, kiel ankaŭ same la riĉeco kaj potenco de liaj tre maljunaj gepatroj, helpis lin firme starigi sian superecon.

Duko kaj dukino Savello estis edukintaj multe da infanoj; sed el ĉiuj nur tiu ĉi plej juna filo restis, ĉar la pli junaj estis mortintaj unu post alia, ofte neatendite kaj terure. La junulo tial estis la konsolo kaj espero de ilia maljuneco, pli estro de la domo ol ili mem. Flatuloj ĉiutage raportis pri io brilanta kion li estis farinta aŭ parolinta, sed ili ŝajnis lin pli deca aŭ kaŝis antaŭ ili la diboĉecon de lia vivo. Sed eĉ se oni estus dirinta aŭ perfidinta ĉion, ili eble nur estis ridetintaj. „Mi ja mem ne estis alia dum mia juneco!“ kutime diris la duko, kiam okaze li eksciis la diboĉojn de sia filo. Li estis, cetere, pardoninda; ĉar la liberaj moroj de la ĉioma kunvivantaro, kaj la granda diferenco de la diversaj profesioj, tiam ŝajnis pardonebla multon, kio estas juĝata kiel krimo, laŭ pli severa ordo. La gepatroj, plue, devis ja indulge juĝi pri tio, kion ĉioma Roma pardonis

al la junulo, kiu estis amata de la sinjorinoj, kaj honorata, timata kaj serĉata de la kavalira junularo de la urbo. Oni kredis, ke eĉ Margareta distingis lin kompare kun aliaj, kaj pro tio li estis ankaŭ destinata kiel ĉefo kaj parolanto de la procesio, per siaj kunuloj.

Tiu tempo ne povis produkti pli belan junularon nek pli riĉan pompon; sed, kvazaŭ laŭ interkonsento, la sinjoroj nur rigardis Savello'n, kiu, kun ĉapo en mano, antaŭiris la aliajn. Lia kamizolo, similante kirason, estis multaloke trakudrita kaj ĉie brodita per oro kaj perloj; sur dekstra ŝultro li portis mallongan mantelon, ĉe flanko briletis la riĉe garnitaj tenilo kaj portilo de lia spado; brilanta rubeno, ĉirkaŭita de lakto-blankaj brilantaj perloj, ornamis lian ĉapon. Ĝian plumon, sen kiu, tiutempe, apenaŭ iu ajn nobelo vidiĝis publike, li estis forgesinta aŭ forlasinta pro kaprico.

Respektege li trifoje riverencis antaŭ la nobela sinjorino, kiu kun indeca mieno rigardis malsupren al li. Tiam, ekprenante la piedingon, sur kiu ripozis ŝia piedo, kaj fleksante unu genuon, li parolis jenon:

„De la trono de l' Cezaro de nia tempo, la granda Karlo, vi, grandega princino, revenas en lian ĉefurbon, ĉar Roma apartenas al Cezaro, kaj la eklezio ordonas, ke ni donu al la Cezaro

tion, kio estas lia. Kaj tial nin submetas ni al vi, lia filino, anstataŭulino! Ĉar por li vi regas nin senbare per komando pri niaj koroj kaj animoj, nia plej bona esteco. Via foresto malĝojigas nin, via reveno reportas al ni la ĝojon, kiun vi forprenis. Permesu, granda princino, ke ni akompanu vin ĝis la pordegoj de tiu ĉi urbo, kiu iam estinte komandis ankaŭ la terajn kaj paseblajn sortojn de l' homaro, kiel ĝi ankoraŭ hodiaŭ komandas la ĉielajn kaj eternajn. Vi deiras malsupren al ni de la ŝtupoj de tiu trono, kiu komandas ambaŭ Hindolandojn kaj regas marojn, ne metante alian limon al sia potenco, ol tiun spiritan, per kiu Roma estas daŭre granda. Samparenca de vi estas ja tiu potenco mistika, ĉar vi estas nevino kaj filino de nia eklezia patro kaj reganto. Kien ajn vi iros, vi renkontos potencon; vi ne evitos ĝin, se eĉ vi volus, ĉar ĝi daŭre restas apud vi!“

„Ne por praktiki potencon“, respondis Margareta, „sed por obei, mi revenas en la sanktigitajn muregojn de Roma. Volonte mi obeas ĉiun ordonon, kaj tial ankaŭ mi submetas min al la leĝo de via amo, enkonduki kaj akompani min en tiujn honorindajn muregojn, al kiuj mi nur povas proksimiĝi kun sankta timo. Akompanu min do, por kuraĝigi, protekti kaj fortigi min! Suriru viajn ĉevalojn, sinjoroj, kaj vi, Savello, restu ĉe mia flanko!“

Ili malrapide forrajdis ĝis la ponto, kie staris sennombraj ŝtataj kaleŝoj. Tie la princino respondis al la riceva saluto de la pli maljunaj kavaliroj kaj al la salutoj de la sinjorinoj, kiuj alpremis sin al la fenestroj de la kaleŝo por esti de ŝi vidataj. — Kie princino kaj regulo ne limigas potencon, tie la valoro de dolĉe peranta favoro estas netaksebla, kaj ĉiu devas certigi tiun influon al si por estonta uzado.

Tiu ĉi multekolora, sed bone ordigita, pompa rajdantaro renkontis, ĉe la pordego de l' popolo, sennombran popolamason, tra kiu ĝi nur malfacile kaj malrapide povis moviĝi antaŭen ĝis la mezo de la „Corso“, kie tiam ankoraŭ tiu antikva triumfarko, kiun oni pli poste forigis, plimallarĝigis la straton. Tiu prokrasto donis al la princino okazon kaj tempon por prividi la pentraĵojn, per kiuj tiu antikva konstruaĵo estis kovrita, nome alegoriaj prezentaĵoj, aludoj pri la grandeco de Karlo, la influo de Margareta kaj la ŝatateco de la familio Farnese; ĉiuj faritaj de talentaj, sed facilanimaj pentristoj, kies egalojn la kortegoj de tiu tempo grandanombre okupadis. Post kiam la soldatoj prosperis fari trairejon por la rajdantaro, tiu ĉi moviĝis antaŭen ĝis tie, kie la vojo malsupreniĝas kontraŭ la palaco de Farnese. De tiu loko la princino kun pli malgranda sekvantaro rajdis al sia loĝejo, kie

ankaŭ parto de la papa korteganaro ricevis ŝin, kune kun ŝia propra domanaro, kun amo, almenaŭ respekto. La korteganoj plejeble mal-longigis siajn salutadojn kaj baldaŭ foriris, ĉar la princino ne povis pli longe kaŝi sian vivan deziron al ripozo kaj soleco. Ŝi bezonis iom da trankviliĝo, ĉar ŝi devis ankoraŭ, vespere, akcepti la bondezirojn de ĉiuj personoj, kiuj tiam estis potencaj kaj ŝatataj en Roma. — Kiel ofte do grandeco estas ĉagrene enziata de tiuj, kiuj ne estas ĝiaj partoprenantoj! Ke do tiaj enviuloj sciu, per kiu peza, multekosta prezo ĝi estas gajnita! Kiu do pli estas sklavo? Ĉu tiu, kiu kun ĉiuj servas unu personon, aŭ tiu kiu sola servas ĉiujn? —

Post kelkaj horoj, pasigitaj silente, sed ne senlabore, la sinjorinoj laŭ kutimo kolektiĝis ĉirkaŭ sia estrino. Komence ili nur mallaŭte interparolis unu kun alia, sed poste, kiam la princino ŝajnis aŭskulti iliajn parolojn, tiuj ĉi plilaŭtiĝis. La procesio de la Roma'a nobelaro entute plaĉis ilin, kvankam kelkaj ecoj ŝajnis al ili mallaŭdeblaj. Virina taksado de viraj meritoj estas ja tre kaprica, ofte senatende ŝanĝiĝas, laŭ tempo kaj horo, kaj rapide transiras de unu ekstremo al alia; ankaŭ la favoro de la Roma'aj virinoj ŝajnis esti, antaŭ ĉiuj aliaj, dediĉata nur al Savello. Neniu alia koloro estis



bela aŭ plaĉa, neniu fasono de vestaĵo aŭ maniero de portado de spado laŭdebla, ol nur lia. Ĉiu imitis lin, sed sen ŝanco nek prospero, ĉar antaŭ ol iu nova kutimo fariĝis ĉiutaga kaj ĝeneraliĝis, li jam aliigis plaĉon kaj inklinon por novaj kapricoj, kiuj tuj malaltigis la valoron de la rapide malnoviĝantaj, laŭ juĝo de la virinoj. Certe, ĉar la princino ĉeestis, ŝiaj kortegaj fraŭlinoj evitis longdaŭran preparolon de tiaj seninteresaĵoj, kaj nur sendetale citis lian staturon, sintenon, rigardon kaj moviĝon; ĉar, tiun tagon, la delikata kaj laŭkortega alparolado, la nobla parolmaniero kaj floranta spriteco de la heroo de l' tago havigis al ili sufiĉe da motivoj por neelĉerpebla laŭdado.

„Juna Savello“, diris Margareta, post iom da silenta aŭskultado, „vivigus kaj ornamus ĉiun, eĉ la hispanan kortegon per sia ĉeesto; ĉar prezentiĝi en mondo pli preferinde kaj pli ĉarmigi siajn gestojn sen ia devigo, ol li prosperas aŭ povas laŭ naturo — estas neeble! Ankaŭ li parolas bonege kaj montras viglan spiriton, pro kio ankaŭ mi kutime preferas pli longtempe kaj multe paroli kun li ol kun iuj aliaj. Oni eble konkludas laŭ tio, kvazaŭ mi ŝatas lin pli ol tiom da viroj, kiuj, kvankam samindaj aŭ eĉ pli indaj estas malpli lertaj pri parolo kaj respondo. Sed, pensante tiel, oni trompas sin;

male: lia rigardo kaŭzas timon kaj teruron al mi; ĉar ĉiutage mi devas ekscii tiom da teruraj okazintaĵoj, ke mi ofte sentas inklinon, averti lin kaj imagigi al li la danĝerajn kaj malbonajn konsekvencojn, kiujn ebligos lia trokuraĝeco. „Mi esperas“, ŝi aldiris, „ke li ne pli plaĉos al miaj sinjorinoj pro tio, ĉar li, nenion estimante en mondo, maltrankvilege kaj senhonte cedas siajn voluptojn! Mi havas kaŭzon timi, ke lia sovaĝa vivmaniero rezultigos fruan kaj teruran finon al li!“ —

Margareta tre strange akcentis tiujn ĉi lastajn parolojn, kies severeco plidolĉiĝis pro la kortuŝanta esprimo de ŝia kompatema sento. Tiuj el la sinjorinaro, kiujn ŝia riproĉo ŝajne trafis, dolĉe ekruĝiĝante mallevis la okulojn; sed ankaŭ la aliaj estis tuŝitaj per la antaŭsenta fino de la interparolado. La anonco, ke oni estas kunveninta en salono kaj senpacience atendas la principinon, alidirektis ilian atenton.

La aranĝo de la palaco Farnese ne estis ankoraŭ duone finita, sed en la pompaj ĉambroj la pargetaĵo de la plafonoj jam ornamita kaj la neornamitaj muroj kovritaj per teksitaj tapiŝoj, brilantaj de oro kaj silko. La principino, enirante la tronhalon, ekhaltis momenton, ĉar kutimata al la senluksa kortego de sia patro ŝi sentis kiel blindigita pro la riĉa brileco de la kunvenintaro;



sed tiam ŝi malrapide paŝis antaŭen al la alpremiĝanta amaso. Kiel ofte pura hazardaĵo favoras personan reprezenton, tiel ankaŭ nun la senvola prokrasto de Margareta kaŭzis al ŝi tute apartan indecon kaj grandecon, kiuj estis rimarkataj kaj sekvataj de mallaŭta murmurado aplaŭda de la ĉeestantoj.

Kompare kontraŭ la Roma'aj virinoj, Margareta ne ŝajnis bela nek apenaŭ plaĉa. Sed la memoro de ŝiaj agadoj kaj la impresoj de ŝia nuna sintenado vekis ĉe ĉiuj feliĉaĵoj miksaĵojn de respekto kaj fido. Kiun ajn ŝi, dum sia irado ĉirkaŭen en la vasta halo, salutis aŭ eĉ alparolis, tiu sentis sin kvazaŭ levigita super si kaj tre feliĉigita. Ne sen envio oni do vidis, post kelke da tempo, ke ŝi ekhaltis antaŭ la princido Savello. Ĉar ŝi, ŝajne, volis alparoli lin, ĉiuj ĉeestantoj modeste retiriĝis.

La farto de la gedukoj, kiuj jam de longtempe pro maljuneco kaj malforteco estis malhelpataj eliri domon, kaŭzis, ke la princino demandis, kial Savello daŭre prokrastas elekti kunulinon por ĝojo kaj malĝojo, nome edzinon? „Ĉu viaj gepatroj“, ŝi diris, „ne treege ĝojus, vidi vin edziĝinta ankoraŭ antaŭ ilia morto, eĉ eble ankaŭ havi heredonton? Vi estas la lasta ido de via antikveca familio; sur vi estas bazita la konservo de nobela kaj bela nomo, kaj est-

onte vi havos princajn riĉaĵojn! Se vi, kiel mi, povus viziti la monaĥinejojn de tiu ĉi urbo, vi miregus pro la ĉarmeco kaj beleco de la gracia junularo, kiun ili enfermas; nome: filinoj de la plej potencaj familioj de tiu ĉi urbo, kiuj alportus al vi novajn rilatojn, heredaĵojn kaj riĉaĵojn, kaj enportus en vian familian vivon pli da ornamo kaj ĉarmo ol eble vi povas supozi. Kiel ofte do edziĝa unuiĝo estas prokrastita trans la tempon, kiam viroj ankoraŭ estas impreseblaj per ĝia feliĉeco kaj kapablaj ligiĝi kaj alpreni novajn kutimojn!“

Kvankam Savello volonte aliigus la temon de tiu interparolado, tamen respektigo necesigis almenaŭ respondi al la admonoj de Margareta. „Via princina moŝto“, li diris, „per tio eksonigas tonon, laŭ kiu miaj gepatroj hejme kantas al mi ĉiutage larĝan kantaĵon! Se la duko kaj mia patrino estus lasintaj liberan evoluon al mia inklino, nek intencintaj altrudi al mi decidon, mi kredeble jam delonge estus edzĝinta! Ni nur nevole permesas al aliaj personoj, decidi pri tiaj aferoj, kiuj koncernas nin mem pli intime ol aliajn, kiel ajn bonaj eĉ estus iliaj motivoj kaj dolĉaj iliaj admonoj!“

„Ĉu ne iom da obstineco kaj tromemfido efikas per tio kion ĵus vi diris?“ respondis Margareta; „ĉu vi eble ne entute sentas inklino,

fari tion kion aliaj malaprobas kaj rifuzas, sed male rifuzi tion kion viaj amikoj konsilas al vi, kvankam plej eble prudenta kaj laŭdebla ajn ĝi estas? Mi timas, ke vi ne scias diferencigi inter viaj veraj kaj malveraj amikoj kaj, tiel trompите, nur atentus tiujn ĉi! Ĉar, se iam ajn vi atentus verajn amikojn, vi eksentus teruron antaŭ vi mem kaj forlasus la vojon, sur kiu vi paŝadas! Kredu, ke mi daŭre timas por vi! — Kiel senbride vi do trakuras la vivon! Unu perforteca ago cedas alian, kaj ĉiutage vi postulas Dian indulgemon, kiu ĝis nun konservis vin spite tiom da danĝeroj! Sed timu la momenton, kiam ĝi forlasos kaj transdonos vin al la homa venĝo!“ — Tiujn ĉi parolojn ŝi diris serioze kaj minace, dum ŝi rigardis al la junulo kiu klinite staris antaŭ ŝi. Ŝia rigardo ŝajnis vidigi intiman intereson, kiun la princido bone rimarkis, sed tamen malbone komprenis. Aroganta, malica trajto de liaj buŝaj anguloj montris lian malprudentan ĝojon. Margareta, tiun komprenante, ekstremante forturnis sin de li kaj plue, dum la cetera vespero, ŝajnis tute ignori lin.

La morgaŭan matenon la princino aliris la vaticanan palacon por kisi la manon de l' papo. Tiu ĉi estis uzinta la vojaĝon de sia nevino al la imperiestra kortego, por komenci intertraktadon, kies sukceso certigu al lia familio por

ĉiam la posedon de la princlandoj Piacenza kaj Parma. Ĝis tiu ĉi momento Karlo montris malmulte da fervoro pri tiu ĉi afero; ĉar Pier Luigi, la pli maljuna kaj pli amata nevo de l' papo, vivis ankoraŭ kaj povis ricevi heredonton, kies estonta indeco kiel sendependa princo ne povis do senpere utili Margareta'n. Sed la malegoista fervoro, kun kiu la filino agadis kaj prizorgis la utilon de la familio Farnese, estis dum la lasta tempo proksimiginta la traktadon al celo. La papo tial tre sopire atendis ŝian alvenon por esti pli detale informota kaj ankaŭ danki kaj admoni Margareta'n pro plua agado.

Ke tiu kunveno estu intima kaj eĉ ne rimarkota de la spionantaj rigardoj de la korteganoj, la princino aliris al la ponto „St. Anĝelo“ kaj tra la nova strato de Julio III-a, kiu estis direktita laŭ ŝnuro kaj enhavis jam novajn aŭ ankoraŭ konstruatajn domojn. Ripete ŝi rigardis la palacojn, kies konstruado estis progresinta de ŝia forveturo, aŭ kiuj estis nove fundamentitaj. Ŝi komparis tiun ĉi longan kaj regulan straton, unu el la plej belaj, kvankam ne la plej belan de Roma, kontraŭ la malebenaj kaj malrektaj stratetoj de la urbetoj, tra kiujn ŝi estis akompaninta la ĉirkaŭvagantan kortegon de sia patro dum la lastaj monatoj. Al granda Karlo, estro de tri terpartoj, mankis centro kaj

fiksa sidejo en liaj landoj; liaj palacoj kaj kasteloj konsistis el okazaj amasigoj de divers-specaj partoj, kiuj malhavis oportunecon kaj pompon kaj ofte ankaŭ la plej neceson. Sed en Roma ĉio estis grandioze kaj pompe projektita kaj farita; kaj, pro dekutimo, eĉ la konataj objektoj ŝajnis al ŝi novaj. Alveninte la ponton, ŝi ordonis, ke oni suprenlevu la kurtenon. Ŝi volis revidi la tombegon de Hadriano, nun estanta la citadelo, kastelo de nova Roma. Antaŭ malmulte da jardekoj, papo Klemento VII-a estis rifuĝinta en tiujn ĉi nedetruoblajn muregojn kontraŭ sovaĝaj militaj bandoj, kiujn pagis la imperiestro kaj komandis franca princido. Ŝi memoris la rabadon kaj malbonan traktadon de Roma, kie tiu okazintaĵo estis ankoraŭ bone memorata kaj ne malofte kun kolero preparolata eĉ dum ĉeesto de la princino. Ŝi pripensis, per kiaj malfortikaj fadenoj do ofte la unuiĝoj de la granduloj estas kunligitaj. Do nur pro tio, ĉar nur malofte ili havas vere seriozajn celojn! Kaj, kiel facile ili repaciĝas reciproke, eĉ post plej fortaj bataladoj, ĉar la plej senteblo efekto de iliaj malamikecoj ne tuŝas ilin mem, sed frapas nur la popolamason!

Ŝi pluen veturis tra la „borgo“, kiun tiutempe ankoraŭ ornamis multe da antikvaj gra-

ciaj konstruaĵoj, la plaĉaj burĝaj domoj, kiujn Nikolaus V-a estis konstruinta tie, ankaŭ la loĝejo de Rafaelo kaj aliaj, el kiuj hodiaŭe restas nur la palaco de Bramante, kvankam dezerta, ĉar neniu nobelo nek potenca ekleziulo restadas en ĝi. — Proksime ĉe la preĝejo de Sankta Petro, kies kolosa kupolo jam superis la tutan urbon, neniu moderna konstruaĵo ofendis la senton de inteligentaj kaj kleraj homoj. La bonaj konstruaĵoj de l' antikva tempo estis tre proksimaj ĉe la nova preĝejo; la konstruejo ordigis la pentrindan malordon de kolosaj laboraĵoj kaj grandiozaj trabaroj. La vido de tiu miksaĵo de duonaj detruaĵoj kaj ankoraŭ ne finitaj novaj laboroj ne estis malplaĉa. Pene la kaleŝo turniĝis tra la mallarĝa vojo, kiun oni estis malferminta, por ne tute bari la aliron al la unua korto de la vatikana palaco.

La princino eliris el la kaleŝo ĉe la ŝtuparo, kiu supreniĝas al la loĝioj de Rafaelo, kaj ŝi supreniris al la serio de arkaĵoj, kiujn lia genieco estis viviginta kaj gajiginta per delikataj esprimoj de sento kaj riĉege diversspecaj interludoj de formoj. Tiutempe, tiuj mirindaĵoj de arto ankoraŭ konservis sian unuan freŝecon, kaj vivis ankoraŭ personoj, kiuj estis vidintaj ilin fariĝantaj kaj rigardintaj la spiriton kaj sencon de ilia kreinto dum lia vivado. Tial, en

la superaj societaj rondoj de Roma oni ofte parolis pri la gracio de Rafaelo, la ĉarmo de la interrilito kun li, kaj plendis la fruan morton de lia vireca animo de junulo. Ĉio, kion Margareta okaze kaj dum la pasintaj jaroj estis aŭdinta pri li, nun revenis al ŝia memoro. Ŝi rigardis la riĉan ornamon de la muroj kaj plafonoj, ne kiel ni, kiuj rigardas ilin kiel artaĵojn de pasintaj tempoj, sed kiel oni rigardas ion kio estas kiel intime parenca de ni, ke ni povus imagi, mem esti kunlaborintaj ĝin! En mezo de la koridoro ŝi ekhaltis kaj apogis sin ĉe unu el la malfermaj arkoj, por enpense, laŭ sia kutimo, superrigardi el ĝi la grandan urbon, la seriozan, dezertan ebenaĵon, la serion da montoj de l' malproksimo. Neniam ŝi estis kutiminta, senti sin hejma en tiu lando; ŝia interrilito kun Roma, spite ĝia nuna graveco, tamen ŝajnis al ŝi nur pasanta. Tial ŝia animo konservis por la mirinda, sed ankaŭ melankolia kaj korporemana aspekto tiun freŝecon de sentemo, kiun kutimo poste kaj poste plimalvivigas aŭ plimalfortigas. La direkto, kiun oni, de ŝia plej frua juneco, kaj kun aparta sukceso, estis klopodinta doni al ŝia spirito, ne permesis ŝin, longtempe restadi ĉe sentoj; ŝi bezonis esplori pri iliaj kaŭzoj kaj objektoj: jen la batalado kaj celado al homa grandeco kaj potenco, kaj jen, kontraŭe, la ironio de l' sorto, kiu,

kun aparta prefero, frakasas ĝuste tion, kio ŝajnis fundita por eterne, sed kontraste konservadas senpretendajn fondaĵojn kaj modestajn monumentojn, ofte ne tuŝitaj kaj realigitaj, dum jarmiloj! Kiu ne memorus, ke tiu aŭ tiu plejeble simpla ideo, kies ĝusteco ŝajnas preskaŭ triviala, kaj tiu aŭ tiu manipulo, kiu ŝajnas aparteni al plej eble malsupera mekanismo, — tamen, kvazaŭ ili havas signifon nur en monda historio, ofte postdaŭras la detruon de potencaj reĝolandoj? — Ĉiu politikisto, malproksime antaŭen pensanta, devus malesperi, se la konscio de devo ne donus al li la forton, firme teni la gvidilon, por gvidi sian ŝipon tiom malproksime antaŭen, kaj ĝuste, kiom li mem ajn povos, aŭ entute estos eble!

La princino devis esti senrevigata kaj memorigata pri sia onklo, kiu jam estis enirinta la ĉambrojn de la kancelario. Oni ĝenerale nomas ilin la „stancoj (ĉambroj) de Rafaelo“, ĉar ili enhavas la plej grandan laboraĵon de lia vivado. La papo ne malbonvole restadis en tiu ĉirkaŭaĵo, ĉar la eklezio ankoraŭ daŭre klopodis enamikiĝi kun tiu genio kaj kredis gajni pli da forto kaj potenco per tiu unuiĝo. — Margareta estis momenton retenata en la unua „stanco“, kie estas pentrita „Attila“, kiun Leo, Heliodoro kaj senditoj de la granda Dio de He-

breoj detenas de rabado kaj detruado; tiuj ĉi temoj estis proponitaj al la artisto de la eklezianaro, kiu tiutempe plene sentis sian potencon. Sed, de tiam la situacio de la Roma'a hierarkio multe aliĝis: la eklezio jam ne kaŭzis teruron nek allogis per si mem, male: ĝi jam estis lerninta intertraktadon kaj sciis averti la potencojn pri komunaj danĝeroj kaj utiloj. Tial ankaŭ la libere pensantaj kaj eĉ nekredemaj regantoj pensis, ke la konservado de eklezia ŝatateco estas necesa, almenaŭ dezirinda, por ilia propra certiĝo kaj bonfarto. La princino fundamente konis la sekreton de tiu ĉi politiko. Ankoraŭ unu fojon ŝi rapide pripensis, kiom ŝi estos permesata sciigi kaj diri sen deiro de tiu vojo de intertraktado kaj kompromiso, kiun la cirkonstancoj ordonis al ŝi.

Ŝi trovis la papon, al kiu granda maljuneco donis respektindan eksteriĝon, sidanta sur apogseĝo, ornamita de oro kaj purpuro; oni estis metinta, proksime ĉe lia maldekstra flanko, duan malpli altigitan seĝon por Margareta, por ke li povu paroli kun ŝi ne aŭdite kaj mallaŭte. Post la kutima genuflekso, dum kiu la papo prezentis al ŝi manon por kiso, li faris signon al la princino, ke ŝi restariĝu kaj sidiĝu ĉe lia flanko. La sekvantaro eliris, oni ŝlosis la pordojn de la ĉambro kaj gardis la eksterajn alirejojn; tiam,

post kelke da laŭte parolitaj ĝeneralaj diroj, la ŝtata interparolado mallaŭte ekkomencis kaj murmurete daŭris ĝis fino.

Baldaŭ oni priparolis la celon de la plej ardaĵoj de la maljunulo, nome: plialtigo de lia familio. Margaretas sciigis, ke ŝi lasis tiun ĉi aferon ĉe la kortego en tre progresinta stato. Tamen, la imperiestro dependigas sian finan decidon de la kondiĉo, ke oni pli precize certigu la heredecon al ŝia edzo, princido Ranuzio, ol oni faris ĉe la komenco kaj daŭrigo de la intertraktoj. Koncerne tion ŝi trovis la papon pli cedema ol iam antaŭe. Lia karulo, Pier Luigi Farnese, estis edzigita jam de longa tempo, seninfano; tial la espero de venonta heredonto estis fine por ĉiam malaperinta; sed la papo pli fervore ol iam deziris vidi sian nomon brili en la serio de eŭropaj regantoj kaj atingi la certecon, ke ĝi postvivu lin kaj pluenplantiĝu ĝis malproksimaj tempoj. Koncerne tio ĉi, la papo ankaŭ komencis kompreni, ke Pier Luigi, kiun solan el ĉiuj nepoj li amis kun patreca cedemo kaj kareso, estas malmulte taŭga por havigi ŝatatecon kaj favoron al tute nova gento; sed, kontraŭe, lia tromemfido, plena manko de seriozeco, virto kaj sinteno, ne povante fondi novan ŝatatecon, facile sufiĉus por kaŭzi malŝaton eĉ al la plej antikva gento kaj eble eĉ malindigi ĝin.

Tial nun li kun afableco aŭskultis la raporton de la princino, certigis ŝin, esti preta por escepti de la heredindeco de la dukolandoj ĉiun ne precize edziĝan posteulon de la pli maljuna frato, por favori la pli junan. De tiu ĉi temo la papo parolante transiris al pli ĝeneralaj temoj, serĉis denove informi sin, per la princino, pri la vivo-orto de l'imperiestro, la talentoj kaj karaktero de la tronheredulo, la emoj kaj difektoj de la favoratoj, kaj ankaŭ plicertigi sian jaman sciadon. Ĝis nun eĉ la plej intimaj personoj ne povis certe konvinkiĝi, ĉu Filipo favoras unu personon pli ol alian. Oni diris, ke li nenion distingas nek ŝatas ĉe homoj, krom ilia senpera uzebleco; li indulgas siajn helpantojn, flatas ilin kun delikateco, sed tamen kun timo, malfido kaj daŭra zorgo, ke ili iam estonte povus superi lin laŭ gvido kaj potenco. Eĉ la ekleziajn estrarojn, al kiuj li ŝajnas esti obeema kaj tute sindonema, li ne permesas, senpere esplori pri lia politika karaktero. Lia konfeso (laŭ la raportoj faritaj al la sankta seĝo) estas ĝeneralaj esprimoj kaj la sciigo pri liaj konsciencaj duboj enigma. Tial oni atendis reĝon kun tute nova, nekutima karaktero: sen pasio nek pripensemo, konvinkita pri la senpera misio de sia profesio; persista tiel en eraroj kaj maltrafoj kiel en la ĝusto kiun li elektos; alia persono kiel homo ol kiel reg-

anto; daŭranta enigmo, malfacile aŭ facile divennebla, laŭ la ebleco, trovi divenilon. Multe da demandoj de l' papo koncernis tiun gravan temon. Margareta respondis parte per delikataj rimarkoj, plenaj de indeco kaj konsidero, sed tamen provis deigi la pensojn de l' papo de tiu malagraba temo, per lerta enkonduko de logantaj kaj lulantaj sciigoj, nome la respekto de l' imperiestro kontraŭ la persono de Lia sankta moŝto, la persista sindono de la tronheredulo al la volo kaj gvidado de la eklezio. Ĉar ŝi ne havis la mision, malkaŝi antaŭ li la pli intimajn sekretojn de la imperiestra kortego, nek oferi la daŭran apogon pro la pasanta kaj kaduka de tiu maljunulo, kiu jam diversfoje estis tiom proksimiĝinta al la tombo, ke oni jam estis lasinta ĉiun esperon.

En Roma oni rimarkis la sekretecon kaj la nekutiman daŭron de tiu aŭdienco kaj multfoje ĝin preparolis dum la sekvintaj tagoj. Des pli oni klopodis, esti rimarkata de la princino, kaj diligentis montri al ŝi la ĝojon, kiun oni ne nur mensogis, sed ankaŭ vere sentis pro la reveno de la nobla kaj grandioza virino. Ŝi estis superinta sian bonecan koron, por sentigi al Savello sian malfavoron. La fieraj junulo ne povis toleri ke oni publike kaj antaŭ la tuta nobelaro traktis lin per nerimarko kaj malŝato, kiujn li

ne estis permesata kontraŭbatali, pro la potenco de la imperiestra filino kaj la kavalira kutimo. Tial li ekdecidis foriri el Roma ankoraŭ antaŭ la fino de la amuzaĵoj, por enfermi sin, kun malmulte da kunuloj, Roma'aj diboĉuloj, flatuloj kaj parigistoj, en la posedaĵo de sia patro, nome la gracia „Aricia“.

Frumatene li estis suririnta ĉevalon kun tiuj akompanuloj kaj forrajdinta de la supra korto de la antikva kastelo (teatro de Marcello) laŭlonge de la ruinaĵoj, kie en ĝardenoj jam floris migdalarboj apud la verdaj hederoj volverampantaj, kaj ĉe la muroj de la muregaĵo jam burĝonis persiko apud dissemitaj sovaĝaj oranĝoj, dum ĉie sur la malaltaĵo delikata verdaĵo kovris teron. La suno ĵetis dolĉan lumon sur la altajn niurojn de la banejoj de Antonino, kiuj dislimiĝis, akre sed tamen dolĉe, de la bluaĵo de la malproksima montaro. Pluen, ĉe la pordego de Sankta Sebastiano, la gardistoj elkuris, ne por ekhaltigi la belegan aron, sed nur por saluti kaj honori ĝin. Malŝate la juna princido redonis la saluton kaj daŭrigis rajdon, sed jam en la pordego li ekreturnis sin por alvoki la gardistaron. Li eltiris el zono kelke da ormoneroj kaj kun senzorga certeco ĵetis ilin kontraŭ la alvenantaj soldatoj kaj policanoj. „Prenu“, li diris, „kiel rekompenco de via saluto kaj“, li

strange kortuŝite daŭrigis, „ankaŭ pro mia memoro!“ La akompanantoj kaj la sekvantaro ekridegis pro tiuj paroloj, ĉar ili kredis, ke la sento, kiu okupis la junulon, estas moko kaj ŝerco, laŭ lia kutimo.

Nun ili rajdis antaŭen tra la duone dezertaj antaŭurboj. Tie ankoraŭ estis tiu kaj tiu domo kaj komenca kulturado, kiujn nur pli malfrue la pli malhardigita gento tute forlasis. Ĉe ilia maldekstra flanko restis la „cirko de Caracalla“; tiam ili sekvis la vojon de la „Appia strato“, kiu, de kiam oni ne plu uzas ĝin, pli kaj pli kaŝiĝas sub la rubo de proksimaj konstruaĵoj. La vido de la antikvaj tomboj ĉe ambaŭ flankoj de la strato estis malgajiga por Savello kaj plimultigis lian malbonhumoron. Nur poste, kiam la vojo iom post iom malsupreniĝis, ĉe la piedo de la Albana monto, kie blovas pli malpeza aero, la rigardo trans la ebenaĵon fariĝas pli libera, kaj baldaŭ ankaŭ la maro vidiĝas en malproksimo, tiam lia koro komenciĝis malfermiĝi por la serena sunlumo kaj la mirinda elvido, kaj kun tiuj ĉi belaj impresoj iom post iom ĝojo revenis en lian koron. Tiun ĉi aliĝon liaj kortegaj kunuloj rapide rimarkis kaj ili faris ĉion eblan por helpi ĝin. Oni ŝercis, kvankam ankoraŭ modere, ĉar li ankoraŭ ŝajnis daŭrigi ofendiĝmon kaj incitemon. Dum tiu interbabil-

ado, unu el la ĉevaloj senrimarke estis sur la malmola strato forpuŝinta piedferon, kiu estis perdiĝinta. Oni resendis serviston por serĉi ĝin; kelkaj el la cetera akompanantaro ekhaltis por atendi lin, aliaj malrapide sekvis la principidon, kiu, ne atentante la akcidenton, trote rajdis antaŭen. Pasis kelke da minutoj, antaŭ ol Savello rimarkis, ke li estas multe antaŭrajdinta la aliajn; nur unu el lia sekvantaro estis restinta ĉe lia flanko.

Li ekhaltis, por ne tro malproksimiĝi de sia akompanantaro (singardo, por kiu neniam mankis motivoj en la ĉirkaŭaĵo de Roma). Savello ŝajnis senpacienca, ekscii la kaŭzon de la prokrasto; tamen, lia akompananto, kiu, sola inter tiom da homoj, estis kun vera amo sin doninta al li, provis, ĉar okazo prezentiĝis, esplori pri la kaŭzoj de lia malbonhumoro — ne pro sciivoleco, sed pli pro espero, konsoli kaj refortigi lian animon.

„Ĉar vi urĝas“, respondis Savello, „mi konfesos al vi mian malfortecon, malsaĝecon. Jam frumatene oni sendis al mi el la ĉevalejo la sciigon, ke mia favorata ĉevalo, la nigra, kondutas obstine, batas ĉirkaŭ si, mordas kaj neniel toleras bridon nek selon. Mi ordonis, ke oni bridu alian, sed ankaŭ pri tiu ĉi oni sciigis min, ke ĝi kontraŭstaras, esti gvidata el ĉeval-

ejo. Mi kaŝis antaŭ la ĉeestantoj la impreson, kiun tiu fabelo faris al mi, kaj konservis mian sintenadon. Tamen, poste — kiel fariĝis, mi ne scias — la vido de la fabela antikva muregaĵo ĉe ambaŭ flankoj de la vojo plimultigis mian antaŭan malbonhumoron. Mi neniam antaŭe rigardis ĝin, apenaŭ ĝin rimarkis; sed hodiaŭ la antaŭa revema sento nerifuzeble tiris kaj turnis min tien kaj tien, ke mi ne povis malobservi ian. Tamen — ne sciigu ion pri tio! Jen la postiĝintoj jam alvenas; ni aŭdu, kio ilin prokrastigis!“

Pro la humoro, kun kiu Savello ilin aŭskultis, li eĉ en tiu plej triviala akcidento ekkonis novan antaŭsignon de malfeliĉo. Tamen li devigis sin vidigi mokan mienon kaj, returnante sin antaŭen, enpikis spronojn al sia ĉevalo por ree antaŭrajdi la ceterajn. Liaj akompanuloj kaj servistoj silente sekvis lin, ĝis kiam fine la aro atingis la valan vojon, kiu supreniĝas al la kastelo de Aricia.

La malgranda garnizono ĉe la pordego ricevis la enrajdantojn kun milita pompo kaj laŭtaj ĝojkrioj. Al ĝi la alveno de la estraro havigis superfluan, provizore liberigis ĝin de tiu stranga estado de sieĝeco, kiun kaŭzis al ĝi, dum kutimaj tempoj, la granda nombro kaj la flama malamo de la kampanaro. Kie ajn tiuj

dungatoj estis trafataj unuopaj, ili sendube estis mortigataj de la loĝantoj de l' kamparo; ĉar, mortigi ilin ŝajnis, al la plejmulto da tiuj ĉi, faro de justeco, eble eĉ ago de kompenso kaj puriĝo. Tiuj armitaj aroj, kies nombro kaj potenco servis la grandajn familiojn de l' tiama tempo ne nur kiel protekto, sed, vere, ankaŭ por konservi antaŭ la mondo ilian gloron kaj distingon, rajte havis la nomon „banditi“, kiu signifas: proskripciitoj, ekzilitoj. Ĉar ili estis kolektataj kaj kunmetataj el krimuloj, kun propra risko kaj propra profito. Ili kutime estis sindonemaj al siaj estroj kun nerompebla fideleco kaj blinde obeis iel la potenculojn, kiuj ŝirmis ilin kontraŭ la leĝoj. Unuiĝoj de tiu maniero, kvankam ajn malbona estas ilia fundamento, almenaŭ estigis ŝajnon de jena plej bela virto de l' homa gento: fideleco kaj sindonemo ĝis morto! — Tiel ofte estiĝas virtoj el malvirtoj, kaj ree krimoj kaj gravaj kulpiĝoj el virtoj, ke oni povus kredi, ke tiuj ecoj estas multe pli intime interligataj, ol oni ĝenerale supozas.

La alvenintoj nun enrajdis en la korton, kies pavimo estis ruiniĝinta per vetero kaj kovrita de rubo kaj herbaĵo. Ankaŭ en la interno de l' kastelo vidiĝis signoj de progresanta detruigo: la ŝtuparo estis malleviĝinta, multaj ŝtupoj tre difektitaj, la ĉefa enirejo malplaĉa kaj ĝiaj

fenestroj apenaŭ sufiĉe ŝirmitaj kontraŭ la eniĝanta malsekaĵo per lignaj kovriloj. Sed, transe de la koridoro estis bone prizorgita flankaĵo, kiun oni estis renoviginta antaŭ mallonga tempo. Ĝi estis direktita kontraŭ sudokcidenton, el ĝiaj fenestroj oni supervidis la urbon, ĝian gajan kamparon kaj malproksimege, trans la dezerta bordo, la maron.

La antikva plafono de la halo estis pargetita laŭ bela desegno, la muroj supre pentritaj de bonaj majstroj, sed malsupre kovritaj per ledaj tapetoj, laŭ la maniero, kiel oni antaŭe fabrikadis tiajn en Venecio kaj surprimis ilin per oraĵo laŭ bone elektitaj modeloj. Flanke, en granda kameno, konstruita el marmoro, brulis granda fajro; tio estis tre agrabla por la dorlotitaj sudlandanoj; ĉar la vetero estis ŝanĝinta post tagmezo, kaj malvarma vento estis, sur la altaĵo, surprizinta la maldike vestitajn vojaĝantojn. En mezo de la halo manĝotablo jam estis preta; la kastelmastro, frutempe sciigita pri la projektita alveno de la juna estro, estis sekrete preparinta la domon por lia ricevo, sed nenion sciiginta pri ĝi en la urbeto. Li konis la inklinon de la junulo, nome: senatende kaj nekonite ĉirkaŭvagi en la patraj posedaĵoj, por serĉi aventurojn, kies fino ofte estis terura.

La tablo estis ŝarĝita de sennombraj manĝ-

aĵoj kaj trinkaĵoj, produktaĵoj de la ĉirkaŭaĵo, sed elektitaj kaj zorge preparitaj; ĉar daŭre oni ankoraŭ ŝatis en Italujo tiaspecajn ĝuaĵojn. Grasa, laktoblanka bovidaĵo de l' bordolando, kaj grasigita malsovaĝa birdaĵo alternis kun la ĉasa kaptaĵo kaj fiŝaĵo. Kiam, post satigita apetito, la fruktoj de la sezono estis alportitaj kune kun fruktoj konfititaj, oni pli laŭte kaj ofte postulis vinon. Tiu ĉi estis nur enlanda kreskaĵo, sed pli zorgeme plantita kaj kulturita ol dum pli posta tempo; oni bone ankoraŭ ŝatadis bonajn jaraĵojn kaj superjarajn vinojn, pri kiuj nun neniu diro estas aŭdebla en la ĉirkaŭaĵo de Roma. — La manĝaĵo nun estis forportata; la restaĵo donata al la sekvantaro, kaj post tio al la garnizono por riĉega satiĝo.

La laŭta bruado de la ĝojegantaj trinkuloj forsonis malsupren ĝis proksima Aricia, kies loĝantoj timeme ekaŭskultis kaj dubante interdemandis unu alian el la fenestroj, kio do estas? Ĉu fariĝis bruado en la garnizono, ĉu oni povos certigite kuŝiĝi aŭ devos maldormi por esti preta? Sed ili retrankviliĝis, kiam la bruado ĉesis. Ĉar, laŭ ordono de Savello oni estis ŝovinta la ebrian garnizonon en la arkaĵon de la teretaĝo, kaj la servistaro ankaŭ estis retiriĝinta en pli malproksimajn partojn de l' kastelo.

Sed la gastojn Savello petis per tre decida voĉo, ke ili hodiaŭ konduku kviete, por ne facilanime malebligi la plezuron de la baldaŭa nokta ekskurso.

Oni trinkis ankoraŭ kelkajn glasojn; sed la averto de Savello estis ne nur malmultiginta sed ankaŭ malhelpinta la gajecon. La interparolado, kiun li estis malpermesinta fari laŭvoĉe, ŝajnis, farata murmurete, sen ĉarmo nek esenco; tial la kunuloj, iom post iom, ekstariĝis de tablo. Unuopaj paŝis al kameno, aliaj en proksimajn fenestrajn niĉojn, por rigardi la malleviĝantan sunon.

Vidi, ke la suno, precipe dum malvarmetaj vesperoj, sange ruĝiĝas kune kun sia nuba ĉirkaŭo, ne estas nekutima okazo. Por ni, tia aperaĵo estas ja nur optika, pri kiu ni citas konvinkajn kaŭzojn, almenaŭ kontentigajn. Sed virbovo en paŝtejo ekkoleriĝas kaj sentas teruron pro la vido de sange ruĝigita vespera ĉielo; kaj, eĉ la homoj, antaŭ ol ili kutimis, subordiĝi sian fantazian senton sub la intelekton, kredis ĝin esti antaŭsigno de sangaj faroj, mortigo kaj krimo. Tiutempe, la kredo de la aŭspicia signifo de tiuj aŭ aliaj ĉielaj signoj estis tute komuna, kaj ĝin havis eĉ tiaj personoj, kiuj, trompante ĉiujn morajn barojn, malŝatis kaj malamis la pli severan sencon de religio kaj pro

tio estis en mondo nomataj senkredemaj mokuloj. Tial fariĝis, ĉe la fenestroj, timeta murmureto, sufiĉe aŭdebla, por ekveki Savello'n el liaj konfuzaj pensoj. Rapide li stariĝis de l' seĝo, sur kiun li estis ĵetinta sin post finita manĝado, kaj proksimiĝis al fenestro, por, kiel la ceteraj, fikse elrigardi unu momenton. Tiam li silente reiris al la loko, kiun li ĵus estis forlasinta. Neniu trajto de lia vizaĝo perfidis al liaj kunuloj de malbono tion, kion li pensis; sed en la kaŝitaj profundoj de lia animo estis terura ribelo kaj agitado. La matenaj antaŭsignoj, pro iliaj simpatie kortuŝantaj ecoj, estis prezentigintaj al li kiel dolĉaj kaj molaj avertoj. Sed nun post kiam luksa festeno, malpia interparolado ĉe tablo, jam estis malfortigintaj la potencon de tiu pli bona sento, nun, kiam, laŭ lia firma kredo la ĉielo mem minacas lin — jen senmezura fiereco estiĝis en li, kaj la imago, ke superteraj potencoj intencas lin ordoni, tremigi kaj submeti, ekkolerigis lian neniam flekseblan animon. Nun li kun sovaĝa kolerego avidis devastigi teruregon kaj pereon ĉirkaŭ si, eĉ trans mondon, supozite ke liaj fortoj povos obei lian volon. La hazardo, aŭ ankaŭ iu el tiuj teruraj antaŭdestinoj, kies senco kaj celo estas kaŝitaj, eĉ tute neesplorableblaj, jam estis pretiginta oferaĵon por li.

Estis jam malluma nokto, kiam li admonis siajn kunulojn, ke ili alivestiĝu kaj armu sin. Ili eliris la kastelon tra kaŝita pordo, kiu iam estinte estis servinta por milita eliro kaj tra kiu oni malsupreniris en la sekan fosaĵon. La kontraŭa apoga murego estis minita dum antaŭa sieĝo kaj diskrevigita ĉe diversaj lokoj. Super tiujn ruinaĵojn Savello kutime rampis tiam, kiam li serĉis aventurojn kiel la nunan; sed neniun antaŭan li estis komencinta kun tiel malamika voleco, nek kun tiel malvarma, kolera koro.

Antaŭsento de proksimiĝanta danĝero estis jam frue reĉasinta plej multe da loĝantoj en iliajn loĝejojn; la stratoj estis dezertaj, la urbo ŝajnis senhoma, egale la vojoj, kiuj kondukas al la proksimaj kampoj kaj ĝardenoj kaj estas garnitaj nur per unuopaj domoj. La profunda silentado eĉ ne estis intermitigata de bojado de hundoj; ĉar tiuj ĉi dombestoj antaŭflaras superecon, kaj tial ili kutime ne ekbojis ĉe la proksimiĝo de Savello, sed time rampis en rifugejon. Havigi al sia kolerego celon, oferaĵon, ŝajnis al la princido tiel necese, kiel, en samaj cirkonstancoj, al ĉiuj kiuj, pro malfortaj superuloj aŭ blinda ŝanco, firme imagas, ke iliaj avidoj kaj esperoj neniam povos resti neplenumitaj. Sed, antaŭ ol li ankoraŭ estis sciiginta sian novan kapricon, li malproksime ekaŭdis mal-

laŭtan murmureton, kaj post kiam li ordonis silenton, baldaŭ ankaŭ ne certajn paŝojn kaj bruon kiel de suprenrampantoj.

Unu signon — kaj rapide liaj akompanuloj estis dividintaj sin en tri arojn, por ĉirkaŭkapti sian kaptajon de ĉiuj flankoj. Ĝi ne estis malproksima, nek malfacile trovebla; ĉar jam post malmulte da rapidaj paŝoj, Savello ekvidis sub la senfoliaj arboj knabinon, kies akompananto vane klopodis rifuĝigi ŝin trans la proksiman ĝardenan muregon. Akra ekfajfo sciigis liajn kunulojn, ke kaptajo estas trovita. La plej proksimaj estis ĉe li, la aliaj rapidis alveni lin, kaj baldaŭ ĉiuj ĉeestis.

Unu sola fatala momento decidis la sorton de du senkulpaj homoj. Savello ĉirkaŭkaptis la sendefendan, pro terurego senmovan knabinon kaj ĵetis ŝin en la brakojn de la plej proksimaj, kiuj forprenis la svenintan. Dume, ŝia akompanulo, armita per vinmonta paliso, estis saltinta malsupren de la murego; furioze kaj ne sensukcese li agitis sian facile rompeblan armilon, sed baldaŭ, multefoje trapikite, li defalis teren. Li ne longtempe agoniis — la Romanoj konis sian profesion kaj sciis certe trafi en mezon de vivo.

Kiam la sekvantan tagon frumatene la vilaĝanoj eliris al laborado, ili trovis sur la vojo la senvivan korpon. Rekonsciiginte post la komenca terurego, kelkaj el ili silente kaj plene de ĉagreno forportis la kadavron en la urbon, dum aliaj sekvis la postsignon de la mortigintoj. La vojo estis sabla, tial ĝi estis konservinta la enpremojn de iliaj paŝoj. Sed baldaŭ, proksime ĉe la kastelo, la postsignoj ĉesis kaj ŝajnis nur malklare daŭriĝi en la herbo de la proksima senkultura kampo. Oni prokrastis, interkonsiliĝis kaj fine decidis, ke kelkaj sekvu la neklarajn postsignojn, rompitaĵojn, premitajn herbojn, kiujn la suno ne estis ankoraŭ relevinta; sed la aliaj restadu tie, ĝis kiam tiuj estos akirintaj certecon pri la vojo, sur kiu la krimuloj estas irintaj. Tiamaniere agas tie ĉasistoj, rabistoj, iu ajn, kiu sekvas logantajn, neklarajn postsignojn en sovaĝejo.

Post mallonga tempo, laŭta plenda ekkrio alvenigis ankaŭ la ceterajn. La spertuloj estis sekvintaj la postsignojn ĝis la fosaĵo de la fortiikaĵo, kaj tie trovintaj, laŭlonge de la detruita apoga murego, ĉe la morusaj volverampaĵoj, tukon, kaj inter la ruinaĵoj, tian pinglon, kian ankoraŭ hodiaŭe uzas la virinoj de tiu pejzaĝo, por fiksi la volvitajn harligojn. Ankaŭ oni vidis en la fosaĵo la vojeton al la elira pordeto.

Time ili rigardis la kastelon kaj rerapidis en la urbeton, por ne esti vidataj kaj punataj pro sia neĝustetempa scivolo; ĉar unu el ili sciis, ke Savello estas veninta kaj komencinta, laŭ kutimo, sian kampan plezuron per perfortaĵo. Antaŭ la preĝejo ili trovis multe da popolo, kunveninta por vidi la mortinton kaj informi sin pri „kiel?“ kaj „kial?“. Li estis fremdulo, sed tamen ne tute nekonata. Oni sciis, ke li amis knabinon, filinon de blinda maljunulino, kiu loĝadis en unuope staranta domo kontraŭ la kampo. Oni tien sendis iun por demandi pri la knabino. Ŝi mankis. Estis do certe, ke oni rabis kaj forportis ŝin en la kastelon; kaj estis ankaŭ klare, kiamaniere kaj per kiuj manoj la junulo estis trovinta morton.

La kadavron oni senbrue enterigis, popolo disiris; ĉiu forportis kun si sian ĉagrenon kaj timon, hejmen aŭ kampen. Sed, inter intimaj amikoj kaj interne de familioj oni laŭte plendis kaj malbenis la sorton, kiu estis tiel enabismiginta la posteulojn de liberaj Roma'anoj kaj translasinta kristanojn al la diboĉeco de multe pli ol idolistaj tiraĵoj.

Dum ĉiuj karesaj edzoj kaj zorgemaj patroj tremadis, kelkaj el ili pripensis forkuron kaj aliaj klopodis kaŝi siajn amatojn, du novaj geedzoj sidadis en la spaca kuirejo de sia domo, sen-

zorge interbabilante kaj karesante ĉe matenmanĝo, priparolante estontecon kaj gaje memorante pasintecon. La tagmeza suno dolĉe malbriligate lumis tra la paperajn fenestrojn de la simpla domo, kies dorsa flanko estis lokita kontraŭ spaca ĝardeno. Dum pli varmaj vintraj tagoj oni lasis la fenestrojn malfermitaj kaj sen ili ĝojis pri la aspekto de la riĉa kaj vasta malproksimo. La bone konservata fajro de la proksima forno plimultigis la komfortecon de tiu ĉi intima horo, dum kiu pacemaj geedzoj ankaŭ amas de tempo al tempo komforte ripozi kaj babiladi post kontentigo de apetito. La servistino estis ankoraŭ okupata per forporto de la deserto, kiam ekstere ĉe la ŝlosita dompordo eksonis frapado. Giustiniani — jen la nomo de la dommastro — ordonis, ke ŝi informu sin kaj rifuzu eniron al tute neagrabla vizito.

Ili aŭdis, ke la pordo malfermiĝis kaj refermiĝis, tiam, sur la ŝtuparo, virajn paŝojn kune kun la pli malbruaĵaj paŝoj de la servistino. „Kiu do venos?“ la dommastro duonlaŭte demandis. Kiel juna edzo li, laŭ Roma'a kutimo, restigis sian domon ŝlosita eĉ por proksimaj parencoj. Mal multe da semajnoj estis pasintaj depost la edziĝa festo, ĉe kiu regalaĵo estis riĉa kaj bona; ĝi estis donata kaj ankaŭ akceptata kiel adiaŭa festeno, kaj de tiu horo oni evitis la domon. Al la geedzoj,

kiuj kore amis unu la alian kaj ne antaŭvidis ankoraŭ finon de sia amo, nenio estis tiel nekutima, ol per vizito aŭ saluto anonci al la najbaroj, ke por ili ja ree io alia ekzistas, ol ili mem. Tial ili ekmiregis, vidi, ke la onklo de la juna edzino eniris ĉe ili. La motivo de lia vizito ne estis ordinara: lia vizaĝo vidigis esprimon miksitajn de furiozeco, kolero, timo kaj kompatato. Li apenaŭ salutis, unufoje ekĝemis, kaj tiam diris: „Cassandra“ — jen la nomo de la juna edzino — „mi petas, ke vi lasu nin solaj por unu momento!“ La juna edzino konsternite kaj demande rigardis la onklon kaj ekstariĝis por mal-supreniri kun la servistino en la teretaĝon, kie estis ŝia kamero.

„Giustiniano“, diris la maljunulo, kiam li vidis, ke li estas sola kun li; „mi alportas al vi malbonan sciigon! Vi diversfoje vidis la malriĉan knabinon ‚Vittoria‘ en mia ĝardeno, kie ŝi laboris por pago. Pensu, ke ŝi estas malaperinta dum tiu ĉi nokto kaj, ĉu vi demandas, kien? — en la antikvan konatan fosaĵon de l' kastelo. Oni ne revidos ŝin, same kiel la plej multajn el la antaŭe malaperintaj! Malriĉa junulo, kiu sekvis ŝin — oni diras ke li estas el Norba — volis helpi ŝin kaj, ŝajnas, kontraŭbatali; ĉar oni trovis lin ĉi-matene tratruita kiel celtabulo, nek per tranĉiloj, sed per tritranc-

randaj spadoj, kiajn portas soldatoj kaj nobeloj! Nun, oni jam scias, ke la juna sinjoro estas alveninta al la kastelo ĉi-nokte aŭ hieraŭ. Oni diras, ke li estas ekzilita el Roma kaj restados tie ĉi longan tempon. Mi ne alportas al vi tiun ĉi sciigon pro babilemo, sed nur por averti vin, ke vi ne lasu eliri el domo vian edzinon aŭ ke vi forigu ŝin de tie ĉi ien ajn! Cassandra plaĉis vin, kaj vi edziĝis kun ŝi. Sed, ĉu vi ankaŭ scias, ĉu vi pripensis, ke tridek mejlojn de tie ĉi ĉirkaŭen, nenia pli bela virino estas trovebla? Oni amas tion, kion oni amas, nek pensas kompari ĝin kontraŭ io alia; oni eĉ imagas, ke ĝi ne povus plaĉi iun alian tiom kiom nin mem! Mi ne diras tion por eble gloriĝi antaŭ vi pro tio, ke ni donis al vi la belan virinon kiel edzinon; ĉar, pro la sango de Dio! ni tion faris bonvole, ĉar vi estas tiel bela kaj brava kiel ŝi mem kaj havas tiom da havaĵo kiom ŝi havas, aŭ havos, kiam ŝiaj gepatroj mortos, pri kio Dio decidos! Sed mi nur volas diri al vi — aŭskultu min bone! — jenan: via edzino kaj vi mem estos en danĝero, kiam Savello rimarkos kaj ekscios, ke Cassandra estas via edzino kaj ke vi estas estro de tiu trezoro!

Per ruzo kaj konvinko, per promeso kaj donaco, li nenion gajnos, ĉar ŝi estas nia infano kaj via edzino! Sed, Giustiniano, kiom potenco povos tamen efektiviĝi?“

Serioze kaj trankvile la dommastro estis aŭskultinta la fatalan parolon de la onklo. Lia malhela okulo malrapide kaj egalmezure ruliĝis tien kaj reen; lia frunto sulkiĝis, liaj lipoj tremetis; tamen, kiam li aŭdis la lastajn vortojn de la maljunulo, lia sinregado ĉesis. „Potenco!“ li ekkriis, „potenco! Ĉu mi forsendu, rifuĝigu mian legitiman edzinon? Ne, ne! Kiu rabos ŝin de mi, al tiu mi pagos maldolĉegan rekompencan! Mi ne lasos ŝin viva; mi ŝin protektos por mi! Vi ne konas ŝin ankoraŭ! Ŝi ne estas plu malforta, ne plu la infano, kiun vi donis al mi! Se mortos mi, mortos ankaŭ ŝi; ne zorgu, ni nin protektos unu la alian!“

„Tamen“, diris la maljunulo, sed la dommastro intermitigis lin. „Silentu!“ li diris; „ĉar ni ne volas elvoki sorton, sed restadi en nia hejmo same kiel ni estus farintaj sen via sciigo; ni estas por ni mem sufiĉe da plezuro kaj ĝojo. Vi ne scias, kian trezoron mi posedas!“ li diris kun varma sento; „parolado inter ni ne ĉesas, la tutan tagon ni havas ion por diri unu al la alia; kiam vi unuafoje proponis al mi, ke mi kun ŝi edziĝu, mi ne kredis, ke mi gajnos tiom da feliĉo! — Sed, dimanĉe“, li diris, ree malserenigante rigardon, „ni devas danki Dion pro lia favoro kaj peti lian benon!“ — „Ordonu de Dio superas homan spriton kaj arton!“ tio ĉi estis

la devizo de mia patro, kaj ĝi estu ankaŭ la mia!“

„Ĉu vi ne povus“, prokrastante diris la maljunulo, „iri al la matena meso, silente kaj vualite? Tiutempe estos ankoraŭ malluma nokto, neniu vidos vin, krom Dio, pro kiu vi aliros!“

„Ne“, diris la obstina viro, „kiu serĉas Dion, tiu ne malesperu pri la mano de Dio! Li nin protektos; kaj, se ne Li, tiam mia brako!“ — Li ekbruligis lampon ĉe fajrujo, tiam prenis la tremantan maljunulon ĉe mano, por konduki lin en la nelumigitan ĉambron, kie liaj armiloj estis konservataj: pafiloj kaj pezaj arkebuzoj por ĉaso en la „maremoj“, kiel ankaŭ por spioni malamikojn kaj sendi al ili honestan kuglon; fortaj tranĉiloj kun teniloj kaj ingoj; paro da malnovaj partizanoj, kiujn kovris polvo kaj rusto. „Vidu, maljuna onklo“, diris la dommastro, „jen armiloj, kaj jen“, li vidigis brakon, „forto! Kaj jen“, li malsuprentiris suban palpebron per fingro, „inteligenteco kaj sagaco! Lasu do agi Dion kaj, se estos bezone, min! Se vi aliaj estus samaj kiel mi, malpieco ne arogante levus kapon, kiel estas hodiaŭe!“

Kolerete la onklo forlasis la domon, kie lia voĉo ne valoras, nek estas ŝatata lia konsilo. Post kiam li estis foririnta kaj la dompordo firme fermita, la juna edzino revenis en kuirejon, kie

ŝi trovis sian edzon, kiu sidis sur benko ĉe la fajrujo, distrite kaj enpense fosis en cindro, por eligi el ĝi duone ardantajn karbojn kaj rapide mallumiĝantajn fajrerojn. Ŝi sidiĝis sur alia benko kontraŭ li kaj manuzis ŝpinilon, por pli bone kaŝi per laborado, ke ŝi multe ĉagreniĝas pro la malsereneco kaj pripensemo de sia edzo. Eble ŝi, kvankam Roma'anino, sed tamen virino, sentis iom da tiu avideco, kiun oni nomas scivolecon, kaj pro tio malrajte riproĉas virinojn. Kies vivo kaj efikado estas limigitaj interne de personaj cirkonstancoj, por tiu necese ĉiuspeca proksimaĵo havas pli da ĉarmo kaj signifo.

Jam de longtempe la turniĝanta ŝpinilo mallaŭte bruetis, kiam Giustiniano eklevis la okulojn por rigardi sian edzinon, kiu kun mallevita rigardo daŭrigis ŝpinadon kaj ankoraŭ klopodis kaŝi, ke ŝi tamen palpebrumante rigardis la edzon. Li imagis esti nerimarkata kaj rigardis ŝin des pli amante, tiel, ke kortuŝeco superis ŝin, kaj larmoj elfluetis el sub ŝiaj silkecaj okulharoj. Kiam ŝi levis manon por forviŝi larmojn, Giustiniano demandis, ĉu ŝi do jam eksciis, kio estis okazinta en urbo? „Nenion!“ ŝi respondis, „mi nur tial ploras, ĉar mi vidas, ke vi estas malĝoja!“

„Ĉu vi deziras ekscii tion kio min malĝojigas?“ demandis la edzo. — „Mi ne deziras“, ŝi respondis, „nek eĉ timas. Se mi povos konsoli vin, parolu! Alikaze konservu vian sekreton. La onklo elirigis min; eble mi ne eksciis entute aŭ ne estas permesata ekscii ĝin. Tial, pripensu, antaŭ ol vi parolos; ankaŭ nesciante mi povos kunsenti vian ĉagrenon, plendi, eble eĉ konsoli vin!“

Giustiniano, metante manon antaŭ la okuloj kaj ekĝemante profunde el sia larĝa kaj alta brusto, diris kun seriozo kaj soleno jenon: „Cassandra, kara edzino, ĉu vi volos aŭ ne volos aŭdi la sekreton de via onklo, mi tamen devas diri ĝin al vi. Malbona vetero fariĝis super nia urbo. Savello alvenis kaj komencis per faro, kiu povus delokigi ŝtonegojn kaj ribeligi maron! Lasu min silenti pri ĝiaj cirkonstancoj; baldaŭ aŭ pli poste vi ja devos ekscii tion, pri kio sole hodiaŭ fariĝas la interparolado en la urbeto. Praktiki potencon kaj perforton kaj kaŭzi malfeliĉon al senkulpaj homoj, tio ŝajnas al tiuj Roma'aj kavaliroj la unika ĝuaĵo, inda de ilia stato. Rajto, moro, virto kaj pieco estas abomenaĵoj por tiuj feŭdohavantoj de l' sankta eklezio. Ili ne pensas, nek sentas, nek agas kiel homoj, ne, sed kiel diabloj! Oni kredible kaŝis antaŭ via virgulina sento tiujn aferojn

kiuj jam fariĝis kaj ĉiutage fariĝas. Kia tempo, kiaj moroj! Kristano kaj homo devas atendi la plej malbonon kaj esti forta kaj armita kontraŭ ĉio! — Aŭskultu nun tion, pro kio la onklo alvenis. Li intencis voligi min, ke mi, venontan dimanĉon, ĉeestu kun vi la matenan meson kaj evitu la ĉefan, por ke Savello ne vidu vin! Ĉiuj miaj nervoj ekstremas pro la nura penso pri la ebleco“, li finis paroli, „ke iu homo, kiu ajn estus, povus ĵeti malhonestan rigardon al vi, mia propra edzino!“

Li ĉesis paroli; Cassandra demande rigardis lin. „Kion do“, ŝi diris post iom da silento, „nun decidis mia edzo?“

„Ke ni iru al la ĉefa meso!“ li kun fiereco respondis. „Ĉu ni do kaŝu nin antaŭ li? Kaŝi rajton kaj moron antaŭ potenco kaj diboĉeco? Ĉu? — Ne! Vi eĉ ne vualu vian vizaĝon antaŭ Dio, sed konduitu tiel certigite de Lia protekto kaj via honoro, kiel iam estonte ĉe la tago de l' juĝo! Se tiam, en la sanktigita loko, antaŭ la plej Grando, antaŭ Dio kaj homoj, li riskus ĵeti al via pura vizaĝo eĉ nur unu rigardon de moko — tiam, pro ĉiuj sanktuloj! li eksentu, ke Roma'a sango ankoraŭ fluadas en miaj vejnoj! Patro mortigis iam sian filinon, ĉar li estis senpotenca, fortiri ŝin alimaniere de honto! Vi min interesas pli intime, ol infano patron; ĉar nin

unuigis la sakramento, dum ilin kunligas nur naturo!”

Malforta frosttremo ekkaptis la belan virinon. Morto kaj vivo estas tiel proksimaj unu ĉe alia! Sed, kiam ŝi, pripensinte, iom post iom komprenis tion, kion ŝia edzo estis nur ĉaste kaj kun retenemo montrinta, ŝia koro ŝveligis, kaj nobla kolereto okupis ŝian animon. „Se mi bone komprenis vin“, ŝi diris, „mortigu min nun, aŭ tiam, kiam vi pensos ĝin necesa!“ — „Mortigi vin, ĉu?“ respondis Giustiniano; „ĉu vi scias, ke oni ne dufoje gajnos vivon nek povas revoki mortintojn al la loko, kiun ili forlasis? Mortigi vin kaj mortigi min, estas unu sama! Kiel do povus mi, post kiam mi vivadis kun kaj ĉe vi dum du semajnoj, toleri vivon aparte de vi? — supozite ke vivo sen vi povas ankoraŭ esti, kaj esti nomata vivo entute! Ne, nek sen venĝo, nek sen inda morta ofero vi tiam mortu, devu morti! Unue li, tiam mi! — Sed, kial ĉagreniĝi antaŭtempe? Ni ĝuu la momenton, fidu Dion, kaj post Li nin mem!“ — Cassandra estis ekstariĝinta kaj metinta flanken la ŝpinilon. Ŝi alpaŝis al li dum li kun kareseco altiris ŝin en siajn brakojn. La belega virino ebligis per siaj diroj forigi de li malĝojajn pensojn dum tiu ĉi tago kiel ankoraŭ dum la sekvinta; kaj ĝis dimanĉo la semajno pasis por la junaj

geedzoj tiel serene kaj senkulpe, kiel ajn la unuaj semajnoj de juna edzeco.

En la kastelo estis tre malfrue tagiĝinte. La tempon, kiu restis ĝis vespero, la societo pasigis per malmolestaj kaj diboĉaj paroloj ĉe ludo. Sed malofte kaj nur senakcente oni citis la okazintaĵon de la pasinta nokto; ĉar Savello sulkigis frunton kaj malserenigis rigardon ĉe iu ajn vorto, kiu, eĉ interspace, tuŝis la aferon. Eble li la unuan fojon sentis la premon de tiu necerta malbonhumoro, kiu ne estas ankoraŭ pento nek antaŭsigno de pliboniĝo proksima, kaj tial ankaŭ ĉe tute hardigitaj krimuloj ofte akompanas la memoriĝon de iliaj agoj.

Oni estis decidinta ĉasadi, la morgaŭan tagon, en la senhoma, nekulturita ebenaĵo de l' marbordo, apron, kiu estis multe difektinta la novajn kulturaĵojn en la kampoj de la „mar-emoj“. Antaŭ sunleviĝo Savello eliris el la kastelo kun multenombra sekvantaro, por frutempe alveni al la dezerta malaltaĵo, kie multe da kampara popolo vole sekvis la alitempe malaman nobelon kontraŭ la komunan malamikon. Ĉiuj estis plene armitaj, ne nur por la ĉaso, sed, vere, ankaŭ por esti certigitaj kontraŭ eblaj atakoj de la marborda flanko.

La ĉasantaro jam estis transpaŝinta la ekstreman limon de la kulturaĵo kaj hazarde rest-

adis unu momenton tie, kie la lasta altaĵo malkrute deklivas kontraŭ la ebenaĵon, kiam la suno hele kaj brile leviĝis malantaŭ la malproksimaj montoj, kaj post kelke da momentoj dividis la nebulojn de la marĉoj. Oni ekhaltis sen ordono nek interkonsento, por rigardi la maloftan scenon. La ĉielo de tiu ĉi vasta ebenaĵo tre ĉarmas dum freŝa kaj serena vintra mateno. Neniam tie la vintro faras viziton: satigaj kreskaĵoj tie prezentas nutraĵon al sennombraj brutaroj ĝis somero, kiam la pereiga haladzo de la marĉoj devigos la vagantan popolon serĉi pli bonan aeron kun malriĉa nutraĵo en la alta montaro. Vastaj, duone ruinaj konstruaĵoj, kiujn oni, en la Roma'a marbordo regiono, nomas „casali“ (kazali) prezentas rifuĝejojn al paŝtisto, ĉasisto kaj eĉ al rabisto kontraŭ fulmotondro kaj pluvo. Tiuj vastaj, sed maldelikate aranĝitaj brikamasoj eksteren estas firme fermataj, por garantii protekton kontraŭ neatenditaj atakoj. Interne ili enhavas vastajn halojn, kiuj prezentas restadejon kaj certecon al rifuĝintaj brutaroj. Multaj el ili havas grandan altecon kaj spacon; kiam — kiel en tiu momento — la suno akre lumigas ilin, kaj ŝanĝas la ruĝetan koloron de la brikoj kiel flavetan, ili prezentas mirindan kontraston de la vasta verdanta ebenaĵo. Kun tio, la bele formita montaro en mal-

proksimo, la pli proksima maro, la grandiozaj ĉielaj formaĵoj komprenigas, ke paŝtistoj kaj ĉasistoj ofte pasigas la plej gajajn horojn en tiu sovaĝejo. Oni ja facile kutimas eviti homojn tie, kie naturo kaj profesio donas sufiĉan okazon por okupado.

Savello estis difininta kiel kunvenejon de la ĉasistoj kaj ĉasamikoj kazal'on de sia patro, Ĝi estis tre vasta kaj bone fortikaĵita per antaŭiĝaj truoj, kontraŭ unuan atakon. Kiam li galope alvenis, li trovis la ĉasaman amason restadante ĉe la orienta flanko — sovaĝa amaso, kiu laŭte kaj ĝoje salutis lin. La kampara popolo volonte submetis sin al la gvidado de la kuraĝega kaj sperta junulo, ĉe komunaj entreprenoj. Tiakaze malamo kaj venĝo provizore silentiĝas; ĉar la komuneco de celo ja pli ofte unuigas homojn, ol favoro kaj amo!

Miriga amaso estis do tiu aro de ĉasistoj kaj paŝtistoj, kaj ĝi kredeble kaŭzus malfidon kaj timon al iu alia, ol tiu, kiu hodiaŭ komandis ĝin nur provizore. Savello rigarde kontrolis la longan serion kaj ĉie renkontis delonge konatajn vizaĝojn, kiuj, laŭ ilia vivmaniero, estis aŭ malhele koloritaj per la suno kaj aero, aŭ paligitaj kiel cindro griza pro multjaraj intermitaj febroj, sed ĉiuj prezentis malĉarman frosttremigan eksteron pro iliaj profunde kuŝantaj okuloj kaj malzorgitaj nigraj barboj.

Nun oni demandis la spertulojn pri la renkonta loko kaj restejo de la ĉasbestaro; tiam oni preparolis la projekton de la ĉirkaŭiro, diversare dividis la amason kaj precipe instruis ĉiun pri lia vojo kaj starejo. Savello, kun la plej granda parto de siaj urbaj kunuloj, rekten rajdis kontraŭ la junkhavan marĉon, kie la apro kutime restadis dum taglumo. Kiam la hundoj ekvidis, ke la aro moviĝis antaŭen, ili laŭte ekbojis kaj furioze kaj rapide kurante fortrenis kun si siajn kondukistojn, al kiuj mankis la fortoj por reteni ilin. Post mallonga tempo ili estis alvenintaj al la bordero de la marĉo, kie la piedbatita kanaro kaj la kunpremita junkaro jam de malproksime sciigis al la ektimigita paŝtisto kaj dubanta ĉasisto la enirejon al la restadejo de la mallerta besto.

Kiam la kondukistoj estis forlasintaj la kuraĝajn hundojn, tiuj ĉi rapidege kurante sekvis la postsignojn en la densejo de alta arbara kanaro. Baldaŭ oni vidis, ke la supraĵoj tie kaj tie skuiĝis, tiam laŭserie enrompiĝis la junkaro, sen releviĝo. La ĉaskunularo per okuloj sekvis la moviĝon de la junkaro kaj scivolege aŭskultis por ekaŭdi la bojojn de la hundaro. Fine, tiuj ĉi ekaŭdiĝis el profunda interno de la marĉo. „Jen, mia Bayard!“ Savello ĝojege ekkriis pro granda ĝojo, ĉar ankaŭ tie ĉi li estis la unua.

Sed baldaŭ laŭtiĝis ĝenerala bojado, kiu sone superis la spiregon de la malkvietigita ĉasbesto kaj la timegan bojadon de jam vunditaj hundoj.

La bruado kaj la moviĝo de la kanaro proksimiĝis al la maldensejo. Savello deiris de ĉevalo, ekprenis la ĉasponardegon kaj fikse rigardis la lokon, kie, laŭ lia juĝo, la apro devos trarompe elveni. La kunularo sekvis lian ekzemplon, sed stariĝis pli malproksime de la elirejo. Tiel Savello estis apartigita de la ceteraj kaj sen iu proksima helpo por la kazo de bezono.

Ankoraŭ unu momenton — kaj jen, la multfoje vundita kaj incitita besto ŝaŭmante kaj spiregante elrapidis el la densejo, kaj, samtempe kun ĝi, du fortegaj hundoj. Tiuj ĉi estis kaptintaj ĝiajn orelojn per dentoj kaj penadis ĝin gvidi, treni aŭ reteni. Tamen, senprokraste, post kiam ĝi estis atinginta la maldensejon, ĝi ŝire malfermis la bruston de unu, la ventron de la alia hundo kaj laŭte kriegante ilin forĵetis de si al la tero. Nun ĝi senprokraste rapidis antaŭen kontraŭ Savello'n, kiu firme metis antaŭ sin la ĉasponardegon kaj fikse observadis sian kontraŭulon. La laŭtaj ekkrioj de liaj ĉaskunuloj, kiuj nun vidis lin en danĝero, ne konfuzis, nek senkuraĝigis lin. Li nur konsideris sian kaptajon, kaj, kiam la apro proksimiĝis kontraŭ lin, lerte direktis sin kontraŭ ĝi. La besto al-

rapidis la ŝtuparon kaj en la manĝejon, por komenci la festenon kun kutima diboĉeco. Jam ne indiferenta kiel hieraŭ, nek minaca aŭ malserena, sed gaje kaj ridante li hodiaŭ aŭskultis la ŝercojn de siaj kunmanĝantoj kaj plimultigis kaj plifortigis ilian gajecon per malicaj rimarkoj, neatenditaj ekpensoj kaj malmolestaj rakontoj. Neniu el liaj gastoj tute forgesis certigi la daŭron de lia feliĉa humoro kaj konservi lian bonhumoron; sed kiam oni disiris por kuŝiĝi, nur tiuj, kiuj kredis esti pli intimaj kun li, riskis demandi, kion oni do entreprenos la morgaŭan matenon? — „Kion do alian ajn“, respondis Savello kun subita aliigo de sia mieno kaj konduto, ol iri preĝejon? — Ĉu vi forgesis, ke morgaŭ estas dimanĉo?“

Tiutempe, la feŭdestroj de l' Roma'a teritorio — ĉu pro pompamo, ĉu eble ankaŭ pro tio, ke la cirkonstancoj postulis atendi iel atakon kaj embuskon — kutime vizitis la ĉefpreĝejojn de siaj subulaj urbetoj aŭ vilaĝoj nur kun solena sekvantaro. Ĝenerale, ili farigis mesojn en la kapeletoj de siaj palacoj; sed tamen, laŭ kutimo kaj tradicio, ili almenaŭ unu fojon dum ĉiu restado, vizitis la publikan Dioservon. Por obei la kutimon kaj ordonon de sia familio — ĉar oni ankoraŭ daŭre adoris la „domajn diaĵojn“ de antikva Roma, kvankam ili nun estis alie nom-

ataj — Savello ordonis la sekvantan matenon frutempe, ke oni pretigu por li vestaĵon decan por la sankta okazo. Oni alportis subvestojn de nigra silkŝtofo kun velura gamaŝo, mantelon de bruna drapo kun larĝa bordero de nigra veluro, kaj simplan longan spadoŝ; la kavaliroj ja kutime ĉeestis la meson starante, kaj tial ili uzis spadojn por konvene apogi sin sur ili, kiam ili eksentis laciĝon aŭ kredis ŝajni pli graciaj per tia sinteno.

Kiam li estis vestinta sin kaj metinta sur kapon ĉapelon kun blanka plumo, li kunvenigis kaj ordigis sian sekvantaron. Oni eliris tra la unika pordego kaj iris antaŭen sur la vojo ĉirkaŭ la fortikaĵa fosaĵo, la plej mallonga vojo por alveni la urbeton. Nur unuopaj personoj vidiĝis en la stratoj, kaj ili de malproksime sekvis, per malfidaj rigardoj, la aron, ankaŭ uzis eblan okazon por eviti la okulon de la estro kaj la arogantecon de lia sekvantaro per iu flanka strato. Tamen, oni renkontis iom da interpretiĝo de en- kaj elirantoj ĉe la pordego de l' preĝejo. Kiu ajn estis prosperintaj ĉeesti la fruan matenan meson kaj nun restadi hejme kun virinoj kaj infanoj antaŭ la alveno de la estro, tiuj ŝatis sin feliĉaj.

Serioze kaj sen rigardo flanken Savello iris antaŭen sur la vojo, kiun lia armita sekvantaro

pretigis al li tra la amaso, kaj rekten proksimiĝis al la altaro, kie la pastroj jam estis komencintaj la ĉefan meson. Per malgranda genuflekso li okupis la benketon en mezo de la preĝejo kaj tiam malzorgeme restariĝis por mallaŭte interparoli kun siaj najbaroj, dum la daŭro de la meso, laŭ la maniero de nobelaj preĝantoj. Plena silentado estis ĉirkaŭe. La virinoj, aparte la maljunetaj, envolvis sin per vualoj kaj kaptukoj. „Jen nenio por mi!“ diris Savello, turnante sin al la plej proksime starantoj; „ĉu ne estas hontige, kiel la virinoj kaŝadas vizaĝojn antaŭ ni? Mi estas juĝata tiel danĝera en tiu ĉi loko, ke neniu el ili riskas eĉ rigardi min! Sed tiu maskiĝo do pruvas tion, kion ili kredas pri si mem! Kvankam en nia regiono la speco estas tre bona“, li daŭrigis kun iom da malico, „mi tamen ne kredas, ke ĉiuj tiuj manteloj kaŝas po belulinon! Kaj mi ne kredus pri tio eĉ la notarion de l' urbeto, kiu estas sufiĉe prudenta, por jam delonge mediti eblojn kaj ilojn por malutili min ĉe Lia Sankta Moŝto! Ankaŭ mi havas pli grandajn malamikojn, kiuj volonte katenus min, aŭ havigus al mi la malplezuron de edzeco, aŭ per iu alia maniero pereigus min!“

Ĉe tiuj ĉi lastaj vortoj li konfuziĝis kaj subite ĉesis paroli. Lia ĝis nun senĝene ĉirkaŭrigardanta rigardo fiksiĝis kaj ŝajnis esti altirata de

certa objekto. Liaj akompanantoj vane provis trovi tion, kio allogis lin. Estis Cassandra. Genufleksante ĉe la ekstremaj ŝtupoj de l' altaro ŝi estis, kontraŭ la ordono de sia edzo, pli dense ĉirkaŭtirinta la skarlatan drapovualon, kiam Savello sin metis kontraŭ la altaro. Sed tamen, por vidi la Dioservadon kaj pli libere spiradi, ŝi lasis frunton kaj okulojn sen kovro, tiel, ke la principdo povis vidi kelke da konturoj de ŝia vizaĝo duone turnita kontraŭ lin; tio sufiĉis por plejeble scivoligi lin, sed ne por prezenti al li precizan portreton. Vane li esperis, ke per hazarda moviĝo ŝi pli malkovros sian vizaĝon. Sed ŝi restis sur genuoj ĝis la fino de la Dioservo, kun okuloj deturnitaj de li kaj alturnitaj al la altaro. Tamen, post kiam la pastro donis la benon kaj la preĝantaro malrapide pretigis foriron, Cassandra malrapide stariĝis kaj, kun sekreta timeto, retiris la vualon por montri sin al sia edzo kaj ekkoni lin inter la amaso. Jen, ŝia rigardo senvole trafis la kavaliron, ŝia nigra, belkontura okulo trafis lian, kaj ektimigite kaj surprizite ĝi rapide rekaŝiĝis sub la nigraj okulharoj.

Tiuj, kiuj neniam antaŭe vidis sudlandan okulon, devos senti tre strange kaj suspekteme, kiam ili legos en libroj, ke unu nura rigardo povas rabi konscion de prudentaj homoj, fortiri

ilin al pereigaj ĉaroj kaj kateni ilian volon dum vivdaŭro! Sed, tamen, tio estas! Ĉu estas pro la malhela ardo, ĉu pro la vigla ruliĝo de l' okulo — neniu povas facile kontraŭstari, kies sango ankoraŭ ĉirkaŭmoviĝas fluante kun ardo kaj fluideco tra l' koro! — Cassandra trovis sian edzon, timeme rapidis trafi lin, kaj forlasis la preĝejon, irante ĉe lia flanko, antaŭ ol Savello tute rekonsciiĝis. Post forta ekĝemo li faris apenaŭ rimarkeblan riverencon al l' altaro kaj malrapide, akompanate de sia sekvantaro, eliris en la placon. Tie li faris signon al la plej akomodema kaj lerta el siaj servistoj. „Ĉu vi vidis ŝin?“ li rapide demandis lin. — „Mi vidis kaj scias kion mi devos fari!“ tiu respondis, nerimarkate forrapidante kaj malaperante en la amaso, por esplori pri la nomo kaj rango de la juna virino kaj pri tio, kio krome povis esperigi lin, pli rapide plenumi la dezirojn de sia estro.

Silente Savello estis antaŭirinta siajn kunulojn ĝis sia kastelo. Li nur pro kutimo partoprenis ilian tagmanĝon; sed jam baldaŭ li retiris sin en sian malproksiman dormoĉambron, por lasi liberon al siaj gastoj por petola plezuro. Tie, kun turmenta maltrankvilo li atendis la revenon de sia esploranto, kiu devis uzi grandan antaŭzorgon ĉe sia riska komisio, kaj tial tre malfrue revenis al la kastelo. Tuj oni lin en-

kondukis ĉe la estron. „Ŝia nomo estas Cassandra“, li diris, kiam ili estis solaj, „ŝi estas, de malmulte da semajnoj, edzino de riĉa kampara posedanto, nome Giustiniano. Oni diras, ke ŝi estas sindona al sia edzo kun kareso, kaj estas pia kaj virta kiel sanktulino! Per mono kaj afablaj paroloj“, li enpense daŭrigis, „tiukaze nenio estos atingebla, kaj, pro la defendebla situacio de la domo, la ŝatateco kaj interkomunikoj de la familio, ni ne povos uzi perforton sen la plej granda danĝero!“ Kiam li parolis tiujn ĉi parolojn, Savello rigardis la friponon kun tiel minaca rigardo, ke li ekstrems kaj silentis.

La vido de vera beleco kvietigas la animon de bonaj homoj kaj havigas al ili noblan kaj serenan senton. Sed ankaŭ malbonaj homoj sentas ĝian potencon, pli ol ili konfesas al si mem. Ili akirus per tio vere novan vivon — se la kutimo de malbono ne trompus ilin, ŝajnigante al ili trompajn dezirojn, dum ilia koro silentas. — Pro tiu memoriga parolo, la malfeliĉa, plej interne disŝirita junulo tremegis kun teruro. Sento, nova por li, estis kaptinta lin, nome: sopiranta karesa deziro de reciproka amo! Li jam estis rompinta tiom da koroj, disiginta la interkonsenton de tiom da intimaj unuiĝoj, kaj ofte krime pereiginta la florojn de amo — sed,

jen nun la horo, per kiu amo venĝu la krimojn de amo!

Post longa silentado, dum kiu la helpanto malbrue proksimiĝis al la pordo, por certigi al si eliron, Savello subite estis ekvekata el sia meditado per iu proksima bruo. „Kio estas?“ li kolere ekkriis; „kiu aŭskultas min?“ — „Nur io renversiĝis!“ respondis la servisto, elrigardante tra la pordo. „Ĉu vi ankoraŭ ordonos ion?“ li timeme demandis. „Restu!“ respondis Savello; „mi havas ankoraŭ ion por preparoli kun vi! — Ĉu vi opinias“, li meditante diris, „ke riĉaĵo ne havos potencon kontraŭ ŝi? — Vi do ne konas homojn, ne konas virinojn. Ĉio en mondo estas aĉetebla: la almozulo per kupra monero, la princo per grandaj trezoroj; diferencon faras nur la mezuro! — Vi diris, ke ŝi estas riĉa, bone, prenu tiun ĉi ornamaĵon; ĝi estas laŭprinca kaj forlogos ŝin, kiom ajn riĉa ŝi estas! Ĉu vi bezonas subaĉeti ŝiajn servistojn por proksimiĝi al ŝi? Jen sako da Hispanaj ormoneroj! Donu, donacu, forĵetu! Nur rapidu! — Sed, restu! — Ne iru tuj; ĉar estas ankoraŭ nokto kaj mallumo; eble vi prosperos, spione ekscii ion, kio povos helpu nin! Iru, iru, kaj baldaŭ revenu!“

Post nokto tute maldorme pasigita, Savello tradormis la matenon kaj stariĝis de lito nur

antaŭ ĉirkaŭ tagmezo. Oni memorigis lin pri liaj gastoj, kiuj matene kunvenis en la manĝoĉambro kaj ofte demandis pri li. Li ordonis diri, ke ili serĉu plezuron laŭ sia plaĉo; li mem ne forlasos sian ĉambron. Ofendite kaj frapite, kaj ankaŭ lacigite pro la kapricemo de sia gastiganto, ili, post mallonga interkonsiliĝo, eliris el la kastelo sen forpermeso nek adiaŭo. Ili diris al la konsternitaj servistoj, ke ili revenos, kiam ilia estro estos anime pli refortiĝinta. —

Dume la helpanto de Savello uzis la mallumon por esplori pri ĉiuj alirejoj de la ĝardeno terspaco de Giustiniano. Li trovis, ke la ŝtonegoj kiuj limis la ĝardenon kontraŭ la intermontaĵo, estis alireblaj ĉe pli ol unu loko, kaj la murego estis malalta kaj malzorgita. Enpaŝinte la ĝardenon, li konvinkiĝis, ke oni povos nerimarkite alveni al la domo sub arboj kaj arbetaĵoj. La malantaŭa pordo estis nur duone fermita. Li malfermis ĝin kaj aŭskultis internen. Ĉio estis silenta kiel morto. Jam volante retiriĝi, li ekaŭdis, ke en proksima kamero iu homo, kiu ŝajne ekvekiĝis de dormo, aŭdeble enspiris; tio kaŭzis, ke li ankoraŭ unu fojon metis oreton al pordfosto. Li aŭdis ke virina voĉo murmuretis preĝon, kaj divenis laŭ la cirkonstancoj, ke tie dormas la servistino. Liaj esploringoj estis raportintaj al li, ke Giustiniano

havas en domo servistinon, kiu estas malriĉa, avidema kaj ne malinklina partopreni riskajn entreprenojn. Nun li retiriĝis malantaŭ la muregon kiu apartigas la puton de l' domo, kaj esperis povi neaŭskultate interŝanĝi kelke da paroloj kun tiu ĉi knabino, almenaŭ konatiĝi kun ŝi.

Jam mateniĝis, kiam la servistino, portanta kupran vazon sur la kapo kaj ankoraŭ dormema kaj malvigla, proksimiĝis al la puto. Jam metinte la vazon sur tero kaj ekkaptinte la ĉenon de la tirputo, ŝi ekvidis la fremdulon kiu, tenante fingron sur buŝo, facile komprenigis ŝin, ke ŝi silentu. Li estis viro fortika kaj sciis doni al sia rigardo esprimon de karesa peto, per kiu ŝi samtempe trankviliĝis kaj sentis sin allogata. „Mariuccia“ (Manjo), li apenaŭ aŭdeble siblis, „jen mi por petegi vian amon kaj prezenti al vi ĉion kion mi havas, mian koron kaj mian havaĵon. Mi havas iom da mono“, li diris eltirante la monerujon kiun ŝi avide observis. „Prenu ĝin, ĝi devas esti via, se ne hodiaŭ, tamen do morgaŭ!“ La knabino prenis la monon, pesis ĝin en mano kaj konfuze kaj naivege diris: „Kion vi postulas de mi?“ — „Ami vin“, li diris, „kaj esti amata de vi!“ Lia libera trudemo konvinkis ŝin pri lia seriozeco; li prosperis tute proksimigi la knabinon al si. Atinginte la unuan celon, li nun senakcente demandis ŝin pri la

geedzoj, ilia maniero de kunvivado, kaj ĉu ili ĉiam estas kune? „Senĉese“, ŝi respondis, „sed tamen, hodiaŭ la estro ŝajnas intenci eliron, ĉar hieraŭ mi devis rebonigi lian mantelon, kaj mi aŭdis, ke li havas aferon ekstere!“ — „Nu, vi do povos“, li diris, „fari al mi komplezon, ĉarmega knabino, per kiu ni ambaŭ profitos. Montru al via estrino juvelon, kiun eminenta sinjoro intencas donaci al ŝi nur pro estimo, kaj demandu ŝin, ĉu eble ŝi deziras ĝin iel aliigita?“ „Ho“, ŝi diris, „ĉu vi pensas, ke mi estas svatistino? Ne, ne! Kiu petas mian amon, tiun mi aŭskultas, supozite ke li min plaĉos. Sed por svatado mi ne havas talenton nek inklinon!“ — „Ho“, malgranda frenezulino vi!“ la helpanto intermitigis, „vi do ankoraŭ ne konas la nobelajn homojn! Tiuj ĉi sopiradas hejme kaj fordonas ĉiujn trezorojn de tero por unu nura rigardo de amo!“ — „Do, ĉu mi nur vidigu la juvelon al ŝi?“ ŝi demandis. „Nu, montru ĝin al mi, tiam mi diros, ĉu — ho! Kia beleco!“ ŝi ekkriis, kiam li eltiris la broĉon, „donu ĝin do! Ŝi devos akcepti ĝin, kaj ŝi ankaŭ ĝin akceptos!“ — Estis rubeno, nekutime granda kaj malhele brilanta, ĉirkaŭita de grandaj laktoblankaj perloj; ĉe ambaŭ flankoj po sukverda smeraldo kaj ree po laŭlonge rondigita perlo kun blueta brileto! La gracia kadro ĉie estis vivigita per kolora

emajlo. Per tiu ĉi ornamajo Savello povus aĉeti la korojn de eminentaj sinjorinoj!

La tagiĝa lumo admonis la servistinon, ke ŝi faru sian laboron kaj avertu la helpanton pri la danĝeroj kiujn li eble spertos dum pli longdaŭra restado, koncerne siajn projektojn kaj eĉ sian propran personon. Ili do interkonsentis pri sia kunveno vespere, en pli certa loko ĉe la ĝardeno murego. Tiam la maltima spionanto sekrete foriris sub la arboj kaj, profunde klinante sin glitiĝis malsupren la ŝtonegojn tra la arbetoj. Antaŭ malapero en la intermontaĵo, li ankoraŭ unu fojon rerigardis: ĵus oni malfermis la fenestrojn de la domo, por permesi eniron al la matenlumo kaj al la printempaodoro de la ĝardeno. Li aŭskultis: silento estis en la domo; lia vizito do estas nerimarkita! Sur malrektaj vojoj li rapidis al la kastelo, por raporti al sia estro pri la sukceso de sia lasta risko kaj rikolti laŭdon kaj rekompencan. — Li estis prosperinta, tute submeti al si la facilaniman servistinon. Dum ŝi faris siajn laborojn, la gracia svatiĝinto senĉese okupis ŝiajn pensojn kaj ŝi sentis flaman deziron, bone plenumi lian komision.

Kiam fine la estro estis foririnta el la domo kaj ŝi ree ferminta la dompordon, ŝi iris preni el la kamero la juvelon, tenis ĝin unu mo-

menton en mano kontraŭ la sunradioj kiuj, tra la alte lokita krada fenestro, eniĝis en la malforte lumigitan kameron. Ŝi preferus konservi ĝin por si mem, sed tamen decidis, kontraŭ la sento de avidemo kaj la timeto de sia necerta koro, supreniri kun ĝi la ŝtuparon, kie ŝi trovis la noblan estrinon sidante ĉe fajro, kun ŝpinilo en manoj. Ŝia vido ŝin senkuraĝigis: Cassandra, sidante tiel laborema, serioza kaj enpena, prezentis tiel plenan portreton de virina virteco kaj beleco, ke neniu facile povis fari al ŝi malhonoran proponon sen sekreta antipatio.

La knabino, pretekste farante tiun kaj tiun laboron, ĉirkaŭpaŝis en la spaca kuirejo, tiam proksimiĝis al la estrino, nerimarkate eltiris la juvelon, kaj nun tenis ĝin alten por briligi ĝin, esperante, ke Cassandra alrigardos, kaj faciligos aŭ tute malnecesigos la prologon de ŝia sciigo.

Post iom da tempo la bela virino hazarde forrigardante de sia laboro, ekvidis la brilantan juvelon en la mano de la servistino. „Kie do vi trovis ĝin?“ ŝi demandis, „multeprezaĵo tia-speca ne povas esti via posedaĵo; ĉar juveloj kaj perloj estas tre kostaj; mi iom estas instruita pri tio, ĉar mia onklo en urbo faras komercon per juveloj, kaj li instruis min pri iliaj prezoj kaj valoroj. Kiamaniere vi ĝin havigis al vi?“ — „Ho, sinjorino Cassandra“, respondis

la servistino, „mi hontas paroli la veron; sed oni komisiis min, ke mi montru al vi la juvelon kaj demandu vin, ĉu ĝi vin plaĉos, aŭ ĉu vi volos, ke oni ankoraŭ iom aliigu ĝin!“ — „Kiu donis al vi tiun komision?“ la estrino kolere demandis, „kian intereson do havas por mi la aferoj de aliaj personoj?“ — „Mi do, ŝajnas, malkomprenis la komision“, diris la knabino, „ĉar mi kredis, ke la juvelo estas destinata por vi!“ — „Ĉu por mi?“ Cassandra kolere respondis, „neniu havas rajton, donaci al mi juvelon, krom mia edzo; kaj, se Giustiniano havas ion por donaci al mi, li ne uzos vin kiel perulinon, sed li mem demandos min, ĉu tio ĉi plaĉos min, kion li intencas doni al mi! Tial, parolu senkaŝe: kiu donis al vi tion? aŭ konfesu, ĉu vi trovis ĝin, aŭ — ĉu eĉ —?“ Ŝi severe rigardis la knabinon; sed vidante, ke tiu ĉi ne ŝanĝis sian vizaĝo-koloron, nek deturnis okulojn, ŝi ordonis, ke ŝi metu la juvelon sur tablon, iru malsupren kaj atendu pluan decidon. „Ankaŭ“, ŝi aldiris, „mi jam frumatene diris al vi, ke vi foriru al la vinberisto por tie preni kokidon kaj freŝajn ovojn. Tuj kiam la estro revenos hejmen, vi iru, por ne malfrui; kaj ne prokrastu sur vojo!“

Tuj kiam Giustiniano estis enirinta en kuir-ejon, li rimarkis la forlogan donacon de Savello.

Cassandra renkontis lin senkonfuze; ŝia mieno ne esprimis demandon, sed nur trankvilan sindonon al lia volo. La vizaĝo de ŝia edzo esprimis intiman mediton, sed ne la plej malgrandan dubon aŭ malkonfidon nek suspekton. Tiu, kiu tiumomente vidus la geedzojn, kredus, ke nur tre indiferenta zorgo mastruma ilin okupas.

„Mi komprenas“, diris Giustiniano post kelke da meditado, „ke tiu ĉi riĉa juvelo estas kaptilo, kiun pretigis al ni malico. Oni volas subaĉeti vin kaj, eble, ankaŭ min! Ĉu vi eksciis, kiamaniere ĝi alvenis tien ĉi?“ — „La servistino“, diris Cassandra, „portis ĝin en mano kaj, post miaj demandoj, konfesis, ke ĝi estas destinita por mi!“ — „Ĉu ŝi nomis Savello'n?“ li nun demandis. „Ne!“ respondis Cassandra. „Ĉu ŝi nomis neniun?“ ree demandis Giustiniano. „Neniun!“ ŝi respondis, „nek mi demandis ŝin, sed ordonis, ke ŝi foriru, ĉar mi volis antaŭe interkonsiliĝi kun vi! — Giustiniano“, ŝi denove komencis paroli, kaj kun iom da emocio; „mi ne riproĉas vin; sed, memoriĝu, ĉar tio ne estas evitebla, ke vi multon riskis per la ordono, ke mi prezentu min senvuale al la rigardoj de homoj en preĝejo; jen la efekto: la malbonulo — kiu ajn povus ankoraŭ dubi? — interesiĝas pri mi!“

„Ĉar, kiam mi, restariĝante de preĝado, serĉis vin ĉirkaŭrigardante, mi rimarkis, ke li sovaĝe kaj volupteme rigardis min. Rapide mi deturnis la rigardon de li, sed, mi estis vidinta sufiĉe, por reveni hejmen plena de zorgemo kaj ĉagreno. Ĝis tiu ĉi momento mi kaŝis mian malserenecon antaŭ vi, ĉar mi ne povis superi min por maltrankviligi vin. Sed nun, ĉar danĝero estas alveninta, mi devas diri al vi ĉion kaj peti, ke vi trankvile aŭskultu min! Ĉu vi havos paciencon? Mi ne estu intermitigota, ĉar mi havas multon por diri al vi, kaj unu vorto klarigos alian!“ — „Parolu do!“ li diris kun seriozeco kaj malkonsterno; „mi ĵuras, ke mi ne intermitigos vin!“

„Mi ĵus konfesis al vi, ke mi neprecize rigardis la malamikon de nia feliĉeco; sed mi ne diris ĝis nun, ke mi senĉese pensas pri lia eksteraĵo, de kiam mi vidis lin; mi ne povas plilonge kaŝi antaŭ vi, nek antaŭ mi mem, la fakton, ke li influis min de simpatio kaj kompatio. Lia vizaĝo estas bela; mi kredis ekkoni en ĝiaj noblaj trajtoj penton, internan malpacon, necertan kaj prokrasteman inklinon por plibono kaj bono. Dum tiu ĉi konvinkiĝo — aŭ trompiĝo (kiu do povus certigi, ĉu mi eraris, aŭ ne?) — min surprizis lia donaco, kiu estas tre multekosta, eĉ prince riĉa! Mi ja bone scias, ke la

intenco, aĉeti amon, estas la imageble plej grava ofendo, insultego kaj malhonoro por noblaj animoj! Sed, mi konfesas, ke la granda prezo, kiun kuraĝega, nenion indulganta diboĉulo proponas por mia favoro, ŝajnis al mi kiel atesto de lia pasio, multe malpli ofenda, preskaŭ flata kaj alloga! — Se vi konus virinan koron, Giustignano, vi scius, ke tiu kiu povas kaŭzi en ĝi kompatemon kaj plaĉemon kaj propetigi tiujn por si, prosperos superi multon pri ĝi! Mi mem ne estas ordinara virino, sed tamen, mia edzo, mi estas virino!“

„Kion“, li respondis, „vi intencas prologi per tiu konfeso?“

„Ke decas vin“, ŝi rapide rediris, „protekti min kontraŭ fremda malico kaj propra malforteco! — Se vi, per rifuĝiĝo kaj kontraŭstaro kaŭzos, ke tiu ardo plifortiĝu ĝis ekstremo — kiu do povos garantii, ke li ne perforte eniĝos tien ĉi kaj senhonorigos nian hejmon? Aŭ, se vi lasos al li tempon por gajni min — kiu garantios kontraŭ mia malforteco? Restas do nenio alia, ol mortigi lin!“

„Ho, bone!“ li furioze respondis, „mi iros preni mian pafilon kaj embuske atentos lin!“

„Haltu!“ ŝi intermitigis, „se eĉ vi prosperus tiel mortigi lin, kiun tiom da dungitoj ĉirkaŭadas, kaj kiu eĉ ne vizitas preĝejon sen armita

sekvantaro — se vi prosperus tiel mortigi lin“, ŝi ripete diris, „tio estus pli malbona ol mortigi min mem! Ĉu vi pripensis, kion oni diras, se vi mortigis lin? Oni diros, ke vi faris tion pro ĵaluzo kaj oni supozos certan kaŭzon! Ne, Giustiniano, mi mem devas esti konscia de lia mortigo, mi mem devos esti kunhelpinta! Tiam neniu akuzos min, sed ĉiu ajn diros: tiu edzino helpis sian edzon ĉe sanga kaj riska ago; tial ŝi necese estas fidela kaj senkulpa kiel oro ĝis morto! Diru, ĉu vi volas mortigi lin?“

„Mi volus dispecigi lin!“ ekkriis la koleriĝinta edzo. „Ho, Cassandra, nobla edzino!“ li pli dolĉe daŭrigis; „vi jam tro multe konfesis al mi! La kvieta, naiva feliĉeco de nia kunestado estas pasinta! Pasintaj estas la tagoj, dum kiuj mi, eĉ ne songe, povis imagi, ke vi povos iam rigardi kun plaĉo iun alian viron! Via konfeso donas al mi certigan garantion de via honoro kaj fideleco; ĝi plenigis min de sankta ravo — sed tamen mi eksentas en mi novan, nekonitan flamiĝon: mi kredas, ke ĝi estas tio, kion homoj nomas: ĵaluzo!“

„Bone!“ respondis Cassandra, „ke vi sentu ĵaluzon; tian mi vin amas; kaj se vi volas konservi mian amon, mortigu tiun, kiu minacas rabi de vi ne nur vian honoron, sed ankaŭ mian koron! Sed, nun aŭskultu, kiamaniere! Vi,

Giustiniano, ŝajne forlasu la urbeton, por sekrete reeniri domon dum nokto, tra la malantaŭa pordo! Mi bezonas la servistinon ankoraŭ dum kelke da horoj. Kiam mi ekscios kaj efikos per ŝi tion kion mi bezonas, mi pripensos ilon por elirigi ŝin el domo, antaŭ ol vi revenos. Se mi prosperos logi la mizerulon en domon jam dum tiu ĉi nokto, ni tuj mortigu lin, ĉar — mia patro ofte diris — oni neniam prokrastu riskajn intencojn, por ke ili ne preteriru, nek kuraĝo perdiĝu!“

„Estu kaj restu tiel!“ respondis la edzo, „kaj Dio donu Sian benon al la bona entrepreno, por ke estonte multe da malbono estu evitata, kaj venĝo almenaŭ estu donota al ĉiuj tiuj malfeliĉuloj, kies feliĉon li krime pereigis! Metu la juvelon sur bruston aŭ, pli bone, kaŝu ĝin, por ke la servistino ne rimarku, ke mi vidis ĝin! Mi ne povas aliŝajnigi min, tial mi iros en stalon por bridu la mulon. — Mi aŭdas ŝin!“ li diris, aŭskultante en koridoron, „reprenu la ŝpinilon kaj ŝajnigu, kvazaŭ nenio fariĝis inter ni!“

La domestrino jam turnis la ŝpinilon, kiam la servistino eniris ne sen iom da timo, ke ŝi estos insultata pro sia longa forestado. Ĉar dum ŝia irado al la vinberisto, ŝi renkontis, ĉe dezerta loko, la spionanton de Savello, kaj li ekhaltigis ŝin, por pluen informi sin. Ŝi raportis al li, ke ŝia estrino, kvankam ne akceptante la

juvelon, tamen ne nepre rifuzis ĝin, kaj ŝi promesis, ke, dum posttagmezo, ĉe la ĝardeno mur-ego, li ricevos, laŭ cirkonstancoj, novajn informojn. Tiam ŝi rapidis hejmen por ekscii tion, kio eble okazis dum ŝia forestado. Vidante, ke la juvelo jam ne estas tie, kien ŝi metis ĝin, ŝi plikuraĝiĝis kaj riskis, senĝene demandi la estrinon, ĉu tiu ĉi nun decidis akcepti la juvelon?

„Mi ja ne scias“, respondis Cassandra sen forrigardo de laboro, „de kiu ĝi alvenis?“ — „Mi bone scias“, diris la knabino, „sed mi ne kuraĝas diri ĝin!“ — „Kion vi timas?“ demandis Cassandra. „Mi timas vin, ĉar vi daŭre havas tiel seriozan mienon! Sed, fine, mi devos tamen diri; sciu do, ke ĝi alvenis de sinjoro Savello!“ — „Nu“, diris Cassandra, „mi ja antaŭsentis, sed, kion do mi faru? Mia edzo ja neniam eliras el domo; dum ni estas geedzoj, li ne lasis min sola eĉ unu horon!“ — „Ho“, diris la servistino, „tio finiĝos iam estonte! Ĵus mi aŭdis, ke li, en stalo, insultis la mulon; ĉu li eble ne intencus forrajdi al kampo? Mi tion jam pensis, kiam hieraŭ li donis sian mantelon por fliki ĝin. Li, alie, ja neniam demetas ĝin en domo! Ĉu mi observu, kion li faras en stalo? Eble li diros al mi, kien li intencas rajdi!“ — „Tion li ne diros al vi“, la estrino trankvile respondis sen

forrigardo de l' laboro, „li ja ne diris ion pri tio eĉ al mi! Vi konvinkiĝos, ke li nur pasigas tempon en stalo!“

La servistino senbrue proksimiĝis al la pordo, refoje rigardis la estrinon kaj, ĉar tiu ĉi ŝajne ne atentis ŝin, mallaŭte malsupreniris la ŝtuparon, por spioni en la stalo, kie Giustiniano ĵus estis fininta la bridadon de sia mulo. Vidante, ke li nun kondukas la mulon per brido al la stalpordo, ŝi demandis: „Nu, sinjoro Giustiniano, ĉu vi volas jam lasi nin, vi, juna edzo?“ — „Kiom do tio interesas vin, sorĉistino?“ li respondis, „iru al viaj aferoj kaj lasu min fari miajn!“ — „Ho, ĉu do io okazis?“ ŝi ekkriis kun ŝajna zorgeco. „Vi do revenos ankoraŭ ĝis vespero, ĉu ne?“ — „Lasu min, naivega vi! Eble morgaŭ aŭ postmorgaŭ mi revenos, laŭ cirkonstancoj; ĉar ni viroj ne agas laŭ kapricoj, sed laŭ aferoj! Mi jam delonge devis rajdi Nettuno'n, kaj mi timas, ke la prokrasto kaŭzis al mi malprofiton. Vi, Maria“, li dum preteriro, mallaŭte diris al ŝia orelo: „gardu mian edzinon, observu ĉion, kion ŝi faros, kaj rakontu ĝin al mi post mia reveno. Se vi estos observema kaj fidela, vi havos bonan profiton!“ — „Sinjoro“, ŝi diris, „fidu min entute, ne pro profito mia, sed ĉar estas mia devo, esti servema kontraŭ vi en ĉio! Ĉu vi do ne volas diri adiaŭ al

via edzino? Mi dume tenos la beston.“ — „Mi ne povas toleri la ĝemadon“, li maldolĉe diris kaj svingis sin sur la mulon; malfermu por mi la pordegon kaj diru al ŝi mian saluton, kaj diru, ke mi baldaŭ revenos! Dume vi gardu la domon kaj ne lasu eniri iun ajn!“

La servistino sentis korbataĵon pro interna ĝojego, kiam ŝi vidis, ke la estro forrajdis. „Nun do li mem prezentas al ni tempon kaj okazon por gajni favoron kaj amon!“ Same, kiel ŝi, ankaŭ la spionanto estis trompata; ĉar ĉikanemaj personoj aspiras siajn celojn kun tiom da pasio, ke ili ofte malkaŝas sin al simplaj kaj serenaj animoj kaj tiamaniere povas esti ruze superataj de tiuj ĉi sen iu peno. Tiel okazis, ke Savello jam dum la nokto, kiu sekvis tiun tagon, estis gvidata de sia perulo tra tiu intermontaĵo, supren la ŝtonegojn kaj ĝis la dompordo. Li volis tute sola fari la aventuron; tial lia akompanulo estis forpermesata de li, por ke li, kaŝita en la dornarbeto de la intermonta kavo, gardu la alirejon de la ĝardeno murego, por certigi al Savello la reiron.

Tiu ĉi ankoraŭ unu momenton aŭskultis la singarde senbruaĵajn paŝojn de la servisto, kiuj pli kaj pli ĉesis soni en malproksimo. Nun, sciante, ke li estas tute sola, li eksentis fantomecan frosttremon. Lia interna voĉo mallaŭte

diris al li, ke lia pasio ne estas amo, nek karesco, nek eĉ avido, sed ke li nur sekvas misteran por li nekompreneblan devigon. Eble tio, kio gvidis lin, estis nur ordonemo kaj uzurpemo, por praktiki potencon kaj perforton; eble ankaŭ tiu nememvola adoremo kaj respekto, kiujn beleco en plej altega grado devige gajnis eĉ de homoj malmoralaj kaj sencivilizaj. Ankoraŭ li dubis, ĉu li eniru tra la duone malfermita pordo, aŭ reiru kaj forkuru, kiam Cassandra ekvidigis sin al li sur la vestiblo super la ŝtuparo, kaj ŝajne pli ĉarma ol li unuafoje vidis ŝin. Ĝi estis ornaminta sin kun zorgemo, kaj suprentenis la lampon kun pentrinde bela sinteno, por pli oportune lumigi sian propran vizaĝon. Jen li do ne pli longe kontraŭstaris ŝian larmeme sopirantan rigardon, ŝian ensorĉe ĉarman rideton! Li rapidis supren la ŝtuparon kaj, ĉar ŝi malrapide iris malantaŭen antaŭ li, kun fingro metita sur buŝo, sekvis ŝin ĝis la sojlo de la armilara kamero. Cassandra malfermis la pordon, farante signon al li, ke li sekvu. Enirante, li lasis defali sian mantelon, eble por vidigi sian noblan staturon kaj sian artefaritan riĉan vestaĵon; sed eble ankaŭ pro forgeso kaj senintence. Des pli facile kaj certe trafis lin Giustiniano, kiu, kaŝita malantaŭ la pordo, estis embuske atendinta la eniranton, kaj nun per nur unu puŝo en-

pikis ponardon en lian bruston kaj distranĉis lian koron.

Eble jam dum la faro, sed certe senprokraste post ĝi, ambaŭ geedzojn ekkaptis necerta, duba sento. Kompato kaŭzis doloran karakteron al la ĝojo pri tiu rapida kaj facila mortigo de Savello. La nobla junulo estis falinta planken dum agonio, kun gracio, nek rigide, nek laŭkadavre; ĉar gracio akompanas homon ĝis trans la limo de vivo. Lia duone forturnita vizaĝo, pentrinde ĉirkaŭata de senordaj harbukloj, ankoraŭ nun vidiĝis bela, ordona, estra. Kun kortuŝeco, eĉ kareso, Cassandra rigardis malsupren al li. Kiu do povus tute sen iu doloro disiĝi por eterne de tiu, kiu iam estinte influis lin per iom da simpatio? — Ŝi ne kredis, ke mortinta korpo povus kaŭzi envion de vivulo, tial ŝi senzorge kaj senkaŝe donis sin al la impreso de la bela portreto, al la sentoj de tiu malofta momento. Sed homa koro sentas suspekton pli profundan kaj eminentan, kiun morto ne povas forigi; kaj al tiuj, kiuj efektive kaj fundamente amas, nenio estas pli netolerebla, ol la partopreno de inklino kaj amo kun senesencaj memoroj kaj malgravaj ombroj de la plej amata persono.

Giustiniano ekstremante levis ponardon. La mortigemo, kies estas kapabla Roma'a koro laŭ plena forteco, ŝajnis ankoraŭ arde flamadi en

li. Li estis preta ankaŭ mortpiki la edzinon kaj tiam por ĉiam forlasi la hejmon, kiu antaŭe estis scenejo de lia plej granda feliĉeco, sed nun tiu de plena malfeliĉo kaj pereco, Cassandra, kiu dume ekzamene rigardis lin, komprenis, almenaŭ divenis la sentojn, kiuj emociis lin, la dezirojn, kiuj estiĝis en li. Ŝi ne timiĝis, nek frostremis, sed senemocie kaj konscie diris al li: „Pripensu, antaŭ ol vi agos! Se vi mortigos min, ankaŭ la honoro de nia familio mortos kun mi! Ĉu tiu, kiu morgaŭ vidos min tie ĉi mortigitan, eble povos pensi alian, ol mian punon pro rompo de fidelo kaj pro malhonoro? — Nia sorto estas decidita; ni devas disiri, eble por ĉiam! Prenu tion kion mi pretigis por vi, mian juvelaron kaj malmulton da mono; prenu tion, kion vi povos kunporti, kaj forkuru malproksimen, ĝis kiam vi estos certigata, ke nia sorto fariĝis bona, pli bona, ol mi timas. Mi mem devas restadi tie ĉi, por ke mia reputacio ne estu makulata! Kiam la okazintaĵo publikigis, mi devos sciigi nian atencan kaj akuzan min mem, por purigi min de pli grava riproĉo. Ĉu mi prosperos akiri, antaŭ la potenculoj de tiu ĉi tero alian rekompencan ol la morton, kiun vi antaŭtempe kaj antaŭagante intencis doni al mi — pri tio decidu Dio! Mi donas min al Lia volo! Nun foriru, rapidu! La memoro de nia

mallonga feliĉeco fortilgu vin por persiste toleri doloron kaj suferojn! Vidu min, kiu nekonsternite kaj trankvile rezignas ĝojon kaj vivon! Ni evitis malhonoron — ĉu tio ne estas io granda? Ni danku Dion, ĉar Li donis al ni fortajn animojn, por toleri gravan sorton!“

Li forlasis la domon sen saluto nek manpremo; ŝi ankoraŭ helpis lin, interŝanĝi liajn sangajn vestojn kun aliaj, akompanis lin ĝis la pordo, kiu ebligis eliron en la straton, vigle fermis ĝin malantaŭ li kaj tiam ankaŭ la ĝardenan pordegon, kaj supreniris en sian kameron, por solece pripensi la teruran agon, la necertan estontan tempon. Neniu larmo plidolĉigis la premantan doloron, kiu ŝargis ŝian animon. Dume, lia edzo serĉis vojon en malumo, for el la urbeto, kontraŭ la marbordon. — Oni neniam plu eksciis ion pri li. —

* * *

Kiam la unua matena lumo aperis kaj Savello ankoraŭ ne revenis, la servisto, kiu dume atendis vane lin ĉe la ĝardeno murego, subite sentis atakon de antaŭseno de sia propra plej granda danĝero. Li komprenis, ke iu ajn malfeliĉo kiu eble okazis, senmanke retrafos lin mem, kaj tial, post mallonga medito, savis sin per rapida forkuro. Lia foresto plifortigis suspekton, sed, kontraŭe, plimalfaciligis la mal-

kaŝon de la sanga ago; sed fine, post kelke da tagoj, supozoj kaj duone klaraj postsignoj gvidis la policianojn al la domo de Giustiniano. La najbaroj diris, ke dum la lastaj tagoj oni ne estis vidinta, ke iu ajn persono en- aŭ eliris tie. Kiam post ripetita frapado ne fariĝis respondo de interne oni vidis la belan virinon, kvankam ali-igita pro ĉagreno kaj teruro, sed tamen ne senbeligita, sidante kun laboro ĉe fajrujo. Oni demandis pri ŝia edzo; ŝi trankvile respondis, ke li estas forvojaĝinta. Oni demandis pri Savello. Nun ŝi ekstariĝis, premis sin tra la policianoj kaj malfermis la pordon de la armilara kamero. „Jen li kuŝas!“ ŝi diris. „Mi jam du tagojn vin atendis; forigu lin, mi lin sufiĉe longtempe gardadis!“ —

De memorebla tempo, neniu tiaspeca afero kaŭzis en Roma tian sensacion, nek pli vivan intereson. La ekzameno de la cirkonstancoj ne postulis multe da tempo, ĉar Cassandra jam ĉe la unua aŭskulto libere konfesis, ke ŝi mendicis la morton de la junulo, logis lin en la domon kaj transdonis lin al sia edzo. Trankvile ŝi komprenigis, ke nur la morto de la perfortema junulo povis protekti ŝin kontraŭ lia sovaĝeco kaj certigi la honoron de ŝia familio. Ŝia beleco, la nobleco de ŝia sinteno nekontraŭstareble potencigis ŝiajn argumentojn.

Dum longa tempo oni prokrastis la juĝan decidon, ĉar troviĝis neniuj inter la juĝistoj, kiu sentis la kuraĝon, decidi tiun maloftan kazon laŭ la literoj de leĝo. Oni juĝis tiun faron kiel la grandajn antikvajn ekzemplojn; kaj la popolo, fieraj pro siaj prapatroj, ĝojege salutis ĝin kiel similaĵon de antikva tempo. Oni premis sin al la juĝaj kunsidoj, por vidi la kuraĝeman virinon, oni honoris ŝin en malliberejo. Pli ofte ol aliaj vizitis ŝin la princino Margareta kaj ŝi provis ĉion eblan ĉe sia onklo, la papo, por efiki pardonon al la nobla krimulino. Sed, kontraŭstaris ŝin la gedukoj Savello, kiuj fordonis trezorojn de longtempe amasigitajn kaj nun por ili senvalorajn, por superi la dubojn de la juĝistoj kaj plimalfortigi la influon de Margareta ĉe la reganto. Dum tuta Roma admiris ŝian faron, plendis ŝian sorton aŭ klopodis forigi ĝin, Cassandra mem kun egalanimeco atendis la juĝan decidon, kiun ŝi ne deziris esti forigota nek eĉ plidolĉigota, ĉar por ŝi, vivo delonge estis senĝoja kaj senvalora, sed morto, vere, amika.



Theodor Körner

LA ^HSTONEGOJ DE
HANS HEILING

Antaŭparolado.

Theodor Körner naskiĝis la 23-an de septembro 1791 en Dresden, kie li jam frutempe inkliniĝis al poezio, ĉar la domo de liaj gepatroj tiam estis centro de gloraj verkistoj; ankaŭ Goethe kaj Schiller honoris la patron kiel grandaniman amikon de poetoj, kiu ankaŭ mem posedis poezian talenton. Lia filo Theodor estas antaŭ ĉio fama pro siaj militaj poemoj („Liro kaj Glavo“) kaj pro tiuj li ankaŭ estis nomata „la germana Tirteo“. Li jam publikigis kolekton da junecaj poemoj („Burĝonoj“) kaj nombron da dramoj de diversaj specoj, pro kiuj li fariĝis „teatra poeto“ en Wien ĉe la „Hofburg“, kiam li, jam finanĉo de la aktorino Antonino Adamberger, forlasis Wien, por en Germanujo fariĝi ano de la libervolula taĉmento de l'majoro „de Lützow“ kaj mem batali kontraŭ la „heredan malamikon“ de la germana lando, Napoleono 1-a. La 26-an de aŭgusto 1813 ĉe Gadebusch en Mecklenburg li estis grave vundita per pavilpafo, kiu trairis lian korpon, kaj mortis jam tuj post kiam liaj kunuloj estis lin deprenintaj de l'ĉevalo. Kvankam li atingis nur aĝon de 22 jaroj, li tamen estas vera poeto, precipe laŭ siaj bonegaj patriotaj militpoemoj „Liro kaj Glavo“. Ankaŭ liaj noveloj pruvas la klaran poezian talenton de tiu junulo kaj por ĉiam restos atestoj de juna, multe promesinta, kaj bedaŭrinde tro frue formotinta juna geniulo!

M ü n c h e n .

L. E. Meier.



Antaŭ longega tempo riĉa vilaĝano vivadis en vilaĝeto ĉe la rivero „Eger“. La famo ne diras ĝian nomon, sed oni supozas, ke ĝi estis lokita ĉe ĝia maldekstra bordo, kontraŭ la vilaĝo „Aich“, kiun ĉiuj bangastoj de Karlsbad sufiĉe konas.

Veit — tiu ĉi estas la nomo de la vilaĝano — havis afablan, ĉarman filineton, kiu estis la plezuro kaj ornamo de la tuta regiono. Elsbeth vere estis tre beleta, kaj krom tio tiel bona kaj bone edukita, ke tiame ŝia egalo eble ne estis facile trovebla.

Apud la domo de Veit estis malgranda dometo, kiu apartenis al juna Arnold, kies patro ĵus estis mortinta. Arnold estis lerninta la mension de masonisto, kaj li estis unuafoje reveninta hejmen, post longa tempo de foresto, kiam lia patro mortis. Kiel bona filo, li sincere ploris sur la tombo de sia maljuna patro, ĉar, kvankam tiu ĉi postlasis al li nenion alian ol mizeran dometon, Arnold tamen havis en sia brusto silentan bonegan heredaĵon, nome honestecon kaj fidelecon kaj viglan senton de ĉio bona kaj bela.

La patro de Arnold jam estis malsanema, kiam tiu ĉi alvenis la vilaĝon. kaj la subitan ĝojon pro la revido la maljunulo ne povis trateni. Arnold, bone flegante lin, ne foriris de lia flanko, kaj tial, ne plu frue ol post la morto de sia patro, li povis vidi unu el siaj konatuloj kaj amikoj de la juneca tempo, krom tiu, kiu eble mem vizitis lin ĉe la malsanula lito de lia patro.

Pli ol pri aliaj, li ĝojis pri la revido de Elsbeth; ĉar ili ambaŭ estis grandiĝintaj kune, kaj li ĉiam ankoraŭ plezure memoris la malgrandan afablan knabinon, kiu tiom amis lin kaj tiom ploradis, kiam li devis foriri al sia majstro Praha'n.

Arnold estis fariĝinta gracia, beleta viro, kaj li jam kelkfoje imagis, ke Elsbeth nun ankaŭ devus esti grandiĝinta kaj tre beliĝinta.

La trian vesperon post la morto de la patro, la filo larmeme revanta sidis sur la freŝa tombo, kiam li ekaŭdis iun malbrue eniri post li en la tombejon. Li ĉirkaŭrigardis kaj vidis alveni inter la tomboj ĉarman knabinon kun korbeto da floroj ĉe brako.

Sambukarbeto ankoraŭ kaŝis lin antaŭ la okuloj de Elsbeth; ĉar estis ŝi, kiu volis ornamu per floroj la tombon de sia bona najbaro.

Kun larmoj en la okuloj ŝi klinis sin super ĝi, kaj, kunmetante siajn manojn, mallaŭte diris: „Ripozu dolĉe, bona viro! Tero estu pli malpeza por vi, ol estis via vivado!“ — Nun Arnold ek-saltis antaŭen de malantaŭ la arbeto. „Elsbeth!“ li ekkriis kaj ĉirkaŭprenis la estimigitan knab-inon; „Elsbeth, ĉu vi konas min?“ — „Ho, Arnold, ĉu estas vi?“ ŝi ekruĝigante diris mallaŭte, „ni ne vidis unu la alian dum longa tempo!“ — „Kaj vi fariĝis tiel bela, tiel dolĉa, tiel ĉarma, kaj vi amis mian patron kaj memoras lin tiel afable! Kara, dolĉa knabino!“ — „Vere, bona Arnold, mi tre kore amis lin“, ŝi diris, dolĉe el-ŝovinte sin el liaj brakoj; „ni ofte kune parolis pri vi; la ĝojo pri sia filo estis ja la nura ĝojo kiun li havis!“ — „Ĉu li, vere, ĝojis pri mi?“ Arnold rapide diris; „ho, nun mi dankas vin, Dio, ĉar vi konservis min brava kaj bona! — Sed, Elsbeth, pripensu, kiel ĉio aliiĝis! Antaŭe, kiam ni estis malgrandaj, kaj la patro sidis antaŭ pordo, ni ludis sur liaj genuoj; vi estis tiel kora kontraŭ mi, kaj ni ne volis esti unu sen alia; kaj nun! La bona patro dormadas ĉi mal-supre sub ni, ni estas grandiĝintaj; sed, kvankam mi ne povis resti ĉe vi, mi tamen ofte pensis pri vi!“ — „Ankaŭ mi pensis pri vi!“ Elsbeth mallaŭte diris, kaj per siaj grandaj, afablaj okuloj kore rigardis lin.

Nun Arnold entuziasme ekkriis: „Aŭskultu, Elsbeth! Ni jam frutempe amis unu la alian, kaj mi devis foriri; sed tie ĉi, retrovinte vin, ĉe la tombo de mia patro, kaj ni du estante en silenta memorado de li, nun mi sentas, kvazaŭ neniu disiĝo estis inter ni! La infana sento ekvekiĝis en mi kiel vira pasio! — Elsbeth, mi amas vin! — Kaj vi? Tie ĉi, sur tiu sankta tero, mi diras al vi unuafoje: mi amas vin! — Kaj vi?“ — Sed Elsbeth kaŝis sian ruĝiĝintan vizaĝon ĉe lia brusto kaj ploregis. „Kaj vi?“ Arnold, tre petante kaj larmeme demandis. Dolĉe levante la kapeton kaj kun larmoj rigardante lin, Elsbeth, tamen ĝoje, diris: „Arnold, mi vere amas vin kore; mi ĉiam, ĉiam amis vin!“ — Nun li ree tiris ŝin al sia brusto, kaj kisoj konfirmis la konfesojn de iliaj koroj.

Post la unua ebrieco de la feliĉa amo, ili kunsidiĝis kaj restis ankoraŭ longan tempon en dolĉa feliĉego, sur la patra tombo.

Arnold rakontis pri sia pasinta vivo kaj sia sopirado hejmen, kaj Elsbeth parolis pri lia patro kaj ilia antaŭa infaneco. Ili ne rimarkis, ke la suno jam delonge estis malleviĝinta. Fine, ia bruo de la proksima strato elrevigis ilin, kaj Elsbeth, post rapida adiaŭa kiso, tiris sin el la brakoj de Arnold kaj kuris hejmen.

Arnold estis sur la tombo de sia patro ankoraŭ dum malfrua nokto, meditante pri dolĉaj memoroj, kaj jam tagiĝis, kiam fine li, kun plena, riĉa koro, reeniris la patran domon.

La morgaŭan matenon, kiam Elsbeth alportis matenmanĝon al sia patro, maljuna Veit ekparolis pri Arnold. „Mi kompatas la bedaŭrindan viron“, li diris, „tre kore! Vi kredeble memoros lin, Elsbeth; vi ja ĉiam ludadis kune.“ — „Kial do ne?“ ekruĝigante respondis mal-laŭte Elsbeth. — „Nu, nek mi deziras, ke vi eble estu tro fiera por memori la malriĉulon. Vere, mi riĉiĝis, kaj la Arnold'oj restis malriĉaj; sed ĉiam ili estis bravaj, almenaŭ la patro; kaj ankaŭ pri la filo mi aŭdis tion kaj tion laŭdindan!“ — „Certe, patro!“ rapide intermetis Elsbeth, „juna Arnold estas tre brava!“ — „Ho Elsbeth!“, la patro respondis; „kiel do vi estis certigita pri tio?“ — „Oni rakontas tiel en la vilaĝo“, Elsbeth murmuretis. — „Nu“, daŭrigis Veit, „tio plaĉas al mi; se mi povos helpi lin per io, mi certe estos preta.“ — Sed Elsbeth volis ĉesigi la interparoladon, ĉar ŝi daŭre ruĝiĝis; tial ŝi rapide entreprenis laboron en kuirejo, kaj per tio evitis la ekzamentajn rigardojn de la kaposkuanta maljunulo.

Arnold renkontis sian knabinon ankoraŭ dum antaŭtagmezo, laŭ sia promeso, en la ĝardeno

apud la domo de Veit. Ŝi rakontis al li la tutan dialogon, el kiu li ĉerpis plej bonajn esperojn pri sia feliĉo. „Jes“, fine li diris, „mi pripensadis dum la tuta nokto, estas plej bone, ke mi tuj hodiaŭ aliros vian patron, konfesos al li senkaŝe, ke ni interamas nin kaj deziras geedziĝon, montros al li mian klientaron kaj la atestojn de miaj majstroj, kaj petos lian benon. Mia malkaŝemo ĝojigos lin, li donos al ni sian konsenton, kaj tiam mi kun nova kuraĝo foriros fremdlandon, revenos fidela kaj gaja, kaj ni estos feliĉaj! Ĉu ne vere, dolĉa, bona Elsbeth?“ — „Jes“, ekkriis la ravita knabino, pendante ĉe lia kolo, „jes, la patro certe konsentos; li ja amas min tiom!“ — Ili disiris plenaj de ĝoja espero.

Vespere, Arnold plejeble bone vestis sin, ankoraŭ unu fojon iris al la patra tombo, kie li petegis lian benon, kaj tiam, kun sekreta tremo, reiris al la domo de Veit. Elsbeth, tremante pro ĝojo, ricevis kaj tuj kondukis lin al sia patro.

„Najbaro Arnold“, ekkriis la maljunulo, „kion vi alportas al mi?“ — „Min mem!“ respondis Arnold. — „Kion vi intencas diri per tio?“ demandis Veit. — „Sinjoro najbaro“, Arnold nun komencis paroli, unue per tremanta voĉo, sed poste firme kaj kore, „permesu ke mi parolos iom detale, ĉar tiakaze vi pli bone komprenos

min. Mi estas malriĉa, sed mi lernis ion bonan; pri tio vin konvinkos jenaj atestoj. La tuta mondo estas malfermita por mi; ĉar mi ne volas resti ĉe metio, sed lerni arton; mi iam estonte estu bona arĥitekturo, ĉar tion mi promesis al mia patro. Sed, sinjoro, ĉio en mondo devas havi centron, kaj laboro devas havi celon! Kiel la domoj, kiujn mi konstruas, ne estas konstruataj por la konstruo, sed por utilo, tiel ankaŭ mia arto; mi ne faros arton nur por ĝi mem, sed mi deziras akiri ion per ĝi, kaj, kion mi deziras, tion vi povas doni! Promesu al mi, ke mi ĝin havos, kiam estonte mi estos farinta ion bonegan; tiam mi uzos miajn fortojn por plej granda celo!“ — „Sed, kion do mi havas tiel valoran por vi?“ intermitigis Veit. — „Vian filinon! Ni amas unu la alian. Mi rekte aliris la patron, kiel honesta viro, sen antaŭa svatiĝo de la knabino laŭ la maniero de aliaj. Ne, laŭ bona malnova kutimo mi alvenis al vi por peti vin, ke vi promesu, ne rifuzi vian benon, kiam, post tri jaroj, mi revenos de migrado kaj estos memstara viro, kaj permesu al la knabino resti fidela al mi fianĉino proprigita dum tiuj tri jaroj!“

„Juna viro“, la maljunulo respondis al li; „mi lasis vin libere paroli; nun ankaŭ vi lasu min paroli laŭ mia simpla kaj justa decido! —

Mi ĝojas, ke vi amas mian filinon, ĉar vi estas bonulo; kaj pli ankoraŭ mi ĝojas, ĉar vi tuj malkaŝeme aliris la patron, kaj tio honoras vin! — Sed, espero estas necerta bieno; ĉu mi do fundamentu sur ĝin la sorton de mia Elsbeth? Dum tri jaroj eble iu alvenos, kiu pli plaĉas al Elsbeth, aŭ ankaŭ pli plaĉas al mi! Ĉu mi do tiukaze rifuzu tian, ĉar eble revenos vi? Sed, se vi iam revenos, kaj Elsbeth estos ankoraŭ libera kaj vi memstara viro, tiam mi ne volos malhelpi vian feliĉon; sed nun, ni ne parolu plu iun parolon pri ĝi!“ — „Sed, najbaro Veit“, Arnold tremante petis kaj ekprenis la manon de la maljunulo, „pripensu do —“ „Nenio estas plu pripensinda“, Veit intermitigis lin, „kaj tial: adiaŭ! — Sed, se vi volas ankoraŭ restadi, vi estos mia gasto; sed vi ne plu diru unu vorton pri Elsbeth!“ — „Ĉu tiu ĉi estas via lasta decido?“ per tremanta voĉo demandis Arnold. — „Mia lasta!“ sensente respondis la maljunulo, — „Nu, Dio helpu min!“ Arnold ekkriis kaj volis elkuri tra la pordo. Rapide Veit ekkaptis lin ĉe mano kaj retenis lin.

„Junulo, ne faru sensencaĵon! Vi estas viro kun forto kaj kuraĝo; vi do kunprenu ilin kaj superu doloron! La mondo estas granda; eliru en vivadon, tie vi trankviliĝos! Nun adiaŭ! Bonan feliĉon por la migrado!“ — Kun tio li

lasis lin, kaj Arnold malĝoje reiris al sia dometo. Plorante li enpakis sian havaĵon, diris adiaŭ al la patra heredaĵo, kaj tiam aliris la tombejon, por ankoraŭ diri adiaŭ al la tombo de sia patro. Elsbeth, kiu estis duone aŭdinta la interparoladon tra pordo, ploregis. Revinte ĉion tiel bela, ŝi nun kredis ĉion perdita.

Ankoraŭ unu fojon ŝi volis vidi sian Arnold'on; ŝi stariĝis ĉe sia kamera fenestro kaj atendis ĝis la momento, kiam li elpaŝis el domo kaj aliris la tombejon. Rapide ŝi sekvis lin kaj trovis lin preĝantan sur la tombo de lia patro. „Arnold, Arnold, ĉu vi volas foriri? Ho, mi ne povas lasi vin!“ — Arnold ekstariĝis kiel el sonĝo. „Mi devas, Elsbeth, mi devas! Ne disŝiru mian koron per viaj larmoj, ĉar mi devas!“ — „Ĉu vi revenos? Kiam vi revenos?“ — „Elsbeth, mi laborados kiel homo iel povas; mi avaros ĉiun minuton; post tri jaroj mi ree estos tie ĉi. Ĉu vi restos fidela al mi?“ — „Ĝis la morto, kara Arnold!“ singultante ekkriis la knabino. — „Kaj — se via patro volos devigi vin?“ — „Tiam oni min fortrenu al preĝejo, kaj ankoraŭ antaŭ altaro mi ekkrios: ‚ne!‘ — Jes, Arnold, ni restu fidelaj unu por alia, tie ĉi kaj transe! Ie ni do iam renkontos unu la alian!“ — „Nun ni disiru!“ ekkriis Arnold, el kies okuloj brilis radio de espero tra larmoj, „ni disiru!

Mi jam ne timas malhelpaĵojn; nenio estos por mi tro granda aŭ riska! Per tiu ĉi kiso mi promesas min al vi — kaj nun: adiaŭ! Post tri jaroj ni estos feliĉaj!“ — Li eltiris sin el ŝiaj brakoj. „Arnold, ne forlasu vian Elsbeth!“ sed li jam estis ekstere. De malproksime lia blanka tuko alblovigis al ŝi lastan saluton, kaj fine li malaperis en arbaro.

Elsbeth ĵetis sin sur la tombon kaj fervore preĝis al Dio. Konvinkita de la fideleco de Arnold, ŝi plitrankviligis kaj povis pli kuraĝe prezentiĝi antaŭ sia patro, kiu severe rigardis ŝin kaj esploris plej malgrandan cirkonstancon. Ĉiun frumatenton ŝi de tiam pilgrimis al la loko, kie ŝi lastfoje estis ĉirkaŭpreninta sian Arnold'on; maljuna Veit bone rimarkis tion, sed li ne kontraŭagis; li do estis kontenta, ĉar Elsbeth povis nun esti tiel trankvila kaj eĉ kelkfoje gaja.

Tiamaniere pasis unu jaro, kaj Elsbeth tre ĝojis, ĉar ĝis nun neniu svatiĝanto estis prezentinta sin, kiu plaĉis al ŝia patro. Kontraŭ la fino de la dua jaro revenis en la vilaĝon, post longa forestado, homo kiu, dum antaŭa tempo estis foririnta pro malbonaj faroj kaj dume entreprenis multon. Hans Heiling, foririnta kiel mizerulo, revenis en tre bonaj cirkonstancoj. Ŝajnis, ke li revenis precipe por vidigi sin kiel

riĉa viro al siaj antaŭaj malamikoj. Komence li kondukis, kvazaŭ li volis restadi nur mallongan tempon, ĉar li parolis pri gravaj aferoj, sed baldaŭ oni eksciis, ke li intencis pli longdaŭran restadon. Oni rakontis mirindaĵojn pri li en la vilaĝo; kelka honesta viro ekmovis ŝultr-ojn pri tiuj, kaj multaj personoj rimarkigis sufiĉe klare, ke ili tre bone scias, de kie ĉio devenis.

Estu kiel ajn estas, tamen Hans Heiling ĉiun tagon vizitis maljunan Veit'on, rakontis al li pri siaj vojaĝoj — li estis eĉ en Egiptolando, kaj marveturis ankoraŭ pli malproksimen — kaj al la maljunulo tre plaĉis pro tio, la interrilato kun li, tiel, ke li mankhavis multon, se iufoje Heiling ne eniris, vespere, lian ĉambron. Li, estas vere, eksciis tion kaj tion de siaj najbaroj, sed li nekredeme skuis sian kapon; nur unu afero ŝajnis al li stranga; nome, ke Heiling ĉiun vendredon enfermis sin en sia loĝejo kaj dum la tuta tago restis en domo. Veit tial rekte demandis lin, kion li do faras dum tiu tempo? „Solena promeso“, respondis Heiling, „devigas min pasigi ĉiujn vendredon per silenta preĝado!“ Veit trankviliĝis pri tio; Heiling, kiel antaŭe, daŭrigis siajn vizitojn, kaj pli kaj pli klare rimarkigis la intencon, kiun li havis koncerne Elsbeth.

Sed Elsbeth sentis neklarigeblan abomenon kontraŭ tiu homo, kvazaŭ ĉe lia vido la sango malfluidiĝas en ŝiaj vejnoj. Tamen li faris al la maljunulo formalan proponon de edziĝo kaj ricevis la respondon, ke li antaŭe provu la ŝancon ĉe la knabino mem! Heiling tial uzis por tiu celo iun vesperon, dum kiu Veit ne estis en domo.

Elsbeth sidis ĉe ŝpinilo, kiam li eniris tra la pordo; ektimigite, ŝi sciigis lin, ke ŝia patro ne ĉeestas. „Ho, tiuokaze ni iom babiladu kune, mia ĉarma knabino!“ li respondis, kaj tio dirante sidiĝis apud ŝi. Elsbeth rapide forŝovis sin de li; Hans, kiu pensis, ke tio estas nur pro knabina timemo, kaj havis la principon, ke oni povas sukcesi ĉe virinoj nur per kuraĝego, rapide ŝin ĉirkaŭprenis kaj flate diris: „Ĉu bela Elsbeth ne volas sidi apud mi?“ Sed ŝi, pro malinklina sento elŝiris sin el liaj brakoj, kaj, dirante: „Ne decas min resti sola kun vi!“ rapide volis eliri ĉambron; tamen li rapidis post ŝi kaj pli kuraĝege ĉirkaŭprenis ŝin. „Patro dirus al mi jesan respondon, bela Elsbeth; ĉu vi volas fariĝi mia edzino? Mi ne forlasos vin antaŭ ol vi promesis ĝin!“ Vane ŝi kontraŭbatalis kontraŭ liaj kisoj, kiuj terure brulis sur ŝiaj vangoj. Vane ŝi kriis pro helpo; li, kies pasio estis tre arda, pli kaj pli arogantiĝis — subite li ekrimarkis

kruceton, kiun Elsbeth portis ĉe kolo de post sia infanaĝo, kaj kiu estis heredaĵo de ŝia mortinta patrino. Mirege frapite, li lasis ŝin, ŝajne tremante li elrapidis tra pordo. Elsbeth dankis Dion pro sia savo. Ŝi rakontis al sia patro, post lia reveno, pri la malnobla konduto de Heiling. Veit skuis sian kapon kaj ŝajnis tre malbonhumora. Ĉe baldaŭa okazo li riproĉis Heiling, kiu senkulpiĝis per la forteco de sia amo; sed tamen tiu okazintaĵo feliĉe efikis, ke li, dum longa tempo, evitis altrudi sin al ŝi. De tiu tempo ŝi daŭre portis la krucon, kiu, sen ŝia scio, tiam estis ŝia savanto, libere kaj malkaŝe sur sia brusto, kaj bone rimarkis, ke Heiling ne kuraĝis alparoli ŝin, kiam li trovis ŝin tiel ornamitan.

La jaro proksimiĝis al sia fino. Elsbeth sciis tre artifice prokrastigi kaj intermitigi sian patron, kiam li parolis pri unuiĝo inter ŝi kaj Heiling, kaj fariĝis pli kaj pli gaja. Ĉiutage ŝi ankaŭ aliris la tombon de maljuna Arnold kaj post tio trans Eger'on sur la vojo de Praha, supren ĝis la altaĵo, silente esperante, baldaŭ ekvidi sian fidelulon almigradi.

Dum tiu tempo ŝi, iufoje ĉe frumateno, ne trovis sian kruceton, kiun ŝi tiom amis kaj ŝatis; kredeble oni estis forpreninta ĝin de ŝia kolo dum dormado, ĉar ŝi neniam demetis ĝin; kaj ŝi efektive suspektis unu el siaj servistinoj, kiun

ŝi estis aŭdinta mallaŭte paroli kun Heiling malantaŭ la domo, dum la antaŭa vespero. Plorante ŝi tion rakontis al sia patro. Sed tiu ĉi ridis pri ŝi pro ŝia suspekto, dirante, ke Heiling do ne povas havi intereson por tiu kruceto, ĉar li jam superis tiajn amaĵajn ludojn. Certe, ŝi ĝin perdis aliloke.

Spite tio ŝi persistis ĉe sia opinio, kaj tre klare rimarkis, ke Hans nun denove faris siajn amindumojn kun granda seriozo kaj multa memfido. Ankaŭ la patro pli kaj pli severiĝis, kaj fine rekte anoncis, ke ŝi devos doni sian manon al Heiling, ĉar tio estas lia firma nealiigebla volo; certe Arnold jam forgesis ŝin kaj, krom tio, la tri jaroj jam estas pasintaj. Sed Heiling, antaŭ ŝia patro, ĵuris al ŝi eternan amon, kaj diris, ke li ne amas ŝin pro mono, kiel eble aliaj, sed nepre nur pro ŝi mem; ĉar li havas sufiĉe da mono, per kiu li riĉigos kaj feliĉigos ŝin pli ol iam ŝi revis!

Elsbeth tamen malamamis lin kaj liajn riĉaĵojn; sed, kiam ŝi, trudite de ambaŭ flankoj kaj turmentite pro la penso pri eblaj malfideleco aŭ morto de Arnold, ne vidis antaŭ si iun alian eliron el la afero, ol tiun, kiu restas malfermita por ĉiuj senesperantoj — ŝi petis nur prokraston de tri tagoj; ĉar, ho! ŝi daŭre ankoraŭ esperis la revenon de la amato.

Tri tagoj estis donataj al ŝi. Plenaj de espero, ke ili nun baldaŭ vidos siajn dezirojn plenumataj, la du viroj eliris antaŭ pordon, kaj Veit akompanis Heiling.

Jen alvenis tra la strato la pastro de la vilaĝo kaj antaŭ li la preĝejservisto; ili iris al mortanto, por alporti al li lastan konsolon. Ĉiuj pasantoj riverencis antaŭ la bildo de la Krucumito, kaj ankaŭ Veit fleksis genuojn; sed lia kunulo, kun esprimo de terurego, salte enkurgis en najbaran domon. Ekmiregante kaj kun iom da teruro, Veit postrigardis lin kaj kaposkuante reiris hejmen.

Baldaŭ alvenis iu, sendita de Heiling, por sciigi Veit'on, ke lia estro antaŭ nelonge estis ekkaptita de subita kapturino. Ke Veit vizitu lin, nek pensu ion malbonan! Sed Veit, krucigante sin, respondis: „Reiru al li por diri, ke mi vere ĝojus, se estus nur simpla kapturino!“ — Dume Elsbeth, plorante kaj preĝante sidis sur la monteto antaŭ la vilaĝo, kie ŝi povis vidi laŭlonge de la strato de Praha.

Jen, malproksime ekleviĝis nubo da polvo; forte ekbatis ŝia koro; sed kiam ŝi povis ekvidi riĉe vestitan rajdantaron, ŝia bela espero ree malaperis.

Tiun aron antaŭrajdis, je flanko de honorinda maljunulo, bela juna viro, laŭ kies mieno oni

povis supozi, ke la rapida troto de la ĉevaloj estis ankoraŭ tro malrapida por li, kaj ankaŭ la maljunulo klopodis reteni lin. Elsbeth hontis antaŭ la viraro kaj rigardis malsupren, ne plu al la rajdantoj. Subite la junulo desaltis de ĉevalo kaj, ĵetante sin genuflekse antaŭ ŝi, ekkriis: „Elsbeth! Ĉu estas vere? Mia ĉarma, kara Elsbeth!“ — Ektremante la-knabino stariĝis, kaj kun sento de plej granda feliĉego sin ĵetis al la brusto de la junulo, ekkriante: „Arnold, Arnold, mia Arnold!“ — Dum longa tempo ili tiel restis en muta raveco — buŝon ĉe buŝo kaj koron ĉe koro!

La kunuloj de Arnold staris ĉirkaŭ la feliĉa paro, plenaj de gaĝa kortuŝiteco; la maljunulo kunmetis la manojn kaj dankis Dion, kaj eble neniam antaŭe la malleviĝanta suno lumigis pli feliĉajn homojn. Kiam la geamantoj rekonsciiĝis, ili ne sciis, kiu el ili du unue parolu. Fine Elsbeth komencis rakonti per malmultaj vortoj pri sia malfeliĉa situacio kaj sia interrilato kun Heiling. Arnold preskaŭ ekrigidiĝis pro la penso, ke li eble povis perdi sian Elsbeth'on. Sed la maljunulo pli detale informiĝis pri Heiling, kaj fine ekkriis: „Ja, miaj amikoj, tiu estas la sama fripono, kiu en mia hejma urbo faris senhontajn krimojn kaj nur per plej rapida forkuro povis eviti la manon de justeco! Ni danku Dion, ke

ni tie ĉi neniigos unu el liaj krimoj!“ — Post ankoraŭ ĉiuspecaj interparoladoj pri Heiling kaj Elsbeth, ili fine, sed tre malfrue, alvenis la vilaĝon.

Triumfe Elsbeth kondukis sian Arnold'on al la patro, kiu ne volis fidi siajn okulojn, kiam li vidis la nombron de riĉe vestitaj viroj enirantaj sian ĉambron. — „Patro de mia Elsbeth“, diris Arnold, „jen mi petas la manon de via filino! Mi fariĝis viro bonstata, ĝuante la favoron de eminentaj sinjoroj, kaj povas plenumi pli ol mi promesis!“ — „Kiel?“ miregante respondis Veit, „ĉu vi vere estas malriĉa Arnold, filo de mia mortinta najbaro?“

„Jes, li estas!“ respondis la maljuna sinjoro, „li estas la sama junulo, kiu, antaŭ tri jaroj elmigris, malriĉa kaj senespera, el tiu ĉi vilaĝo. Li venis al mi; mi baldaŭ ektrovis, ke li povos fariĝi majstro de sia arto, kaj mi donis al li laboron. Li plenumis ĝin, kontentigante ĉiujn, kaj post mallonga tempo mi povis uzi lin kiel ĉefan observiston de la plej eminentaj laboraĵoj. En multe da grandaj urboj li akiris eternan gloron, kaj nun li plenumu en Praha la plej grandan laboron de sia arto! Li fariĝis riĉa, estas amata de dukoj kaj grafoj kaj riĉe donacita. Donu al li vian filinon kaj per tio plenumu vian malnovan promeson! — La fripono, al kiu

vi volis donaci vian filinon, milfoje meritis pendigilon! Mi konas lin!“

„Ĉu tio, kion vi diris, estas vera?“ demandis mireganta Veit. „Vera, vera!“ ĉiuj ekkriis. „Nu, tiukaze mi ne volas malhelpi vian feliĉiĝon, brava majstro!“ diris Veit turnante sin al Arnold; „prenu la knabinon! Beno de Dio estu kun vi!“ Nekapablaj, danki per vortoj, la feliĉa paro sin ĵetis antaŭ liaj piedoj, sed li altiris ilin al brusto, kaj tiel fideleco estis rekompencata. —

„Sinjoro Veit“, la maljuna sinjoro ekdiris post longa silentado, kiu nur intermitis pro la feliĉa plorado de la geamantoj, „mi ankoraŭ havas unu peton al vi: geedzigu la ambaŭ geamantojn tuj morgaŭ, por ke mi havu la ĝojon, vidi mian bonan Arnold'on — kiun mi amas kiel mian filon, ĉar ĉielo ne donis al mi iun — tute feliĉa! Postmorgaŭ mi devos reiri Praha'n.“ — „Ho!“ respondis Veit, kiu estis fariĝinta tre gajega, „ĉar tio tiom plaĉas al vi, ni ja povas aranĝi ĝin por morgaŭ! — Infanoj“, li alkriis la gefeliĉulojn, „morgaŭ estu la edziĝa festo! Ekstere, en la bieneto ĉe „Eger“-monto, ni ĝin aranĝos! Mi tuj informos la paroĥestron, kaj vi, Elsbeth, eniru la kuirejon por regali la honorindajn gastojn laŭ deco!“

Elsbeth obeis, kaj mi opinias ke estas tre kompreneble, ke Arnold tuj sekrete ŝin sekvis, kaj baldaŭ poste ambaŭ ili estis, intime karesante, en ĝardeno.

De kiam Arnold estis rekonsciiĝinta post la ĝoja ebrieco, la bona filo daŭre pensis pri la tombo de la patro; ili do, brakon en brako, pilgrimis al la loko, kiun ili lastfoje estis lasintaj senespere. Ĉe la tombo, ili renovigis siajn ĵurojn, kaj ambaŭ ili sentadis sin mirinde edifitaj. „Ĉu tiu ĉi momento de feliĉego“, diris Arnold, fervore ĉirkaŭprenante sian fianĉinon, „ne valoras tri longajn jarojn da doloro? Ni atingis la celon kaj vivado ne donos pli grandan feliĉon; nur transe, super tero, estos pli granda!“ — „Ho, ke ni do povu estonte tiel morti, brakon en brako kaj koron ĉe koro!“ diris Elsbeth. — „Ĉu morti?“ respondis Arnold; „jes, morti ĉe via brusto! Bona Dio, ne riproĉu nin pro tio, ke ni, spite supermezero da ĝojo, ankoraŭ tamen havas senton por pli altaj! Ni ja kun dankemaj koroj atestas, kiun grandan bonon vi donacas al ni! Vere, Elsbeth, ni preĝu tie ĉi, ĉe la tombo de la patro, kaj danku pro la ĉiela favoro!“ — Ilia preĝo estis silenta, sed intima kaj sankta, kaj kun nedirebla kortuŝiteco la geamantoj reiris al la domo. —

La sekvanta mateno estis bela kaj ĉarma; estis vendredo kaj la festo de Sankta Laŭren-tius'. La tuta vilaĝo estis vigla, en ĉiuj pordoj staris ornamitaj knabinoj kaj junuloj; ĉar Veit estis riĉa, kaj ĉio estis pretigita por la edziĝa festo. Nur la pordo de Hans Heiling restis ŝlos-ita; ĉar, estis ja vendredo, tago dum kiu li, laŭ scio, ne vidiĝis.

Baldaŭ la procesio, kiu alkondukos la super-feliĉan paron al la plej bela festo, ordiĝis por aliri la preĝejon. Veit kaj la majstro de Arnold iris kune kaj kore ploris pro ĝojo pri la feliĉo de siaj infanoj. Por la tagmanĝo Veit estis elektinta la placon sub la granda tilio, en mezo de la vilaĝo. Tien moviĝis la procesio post finita solenaĵo. Ĉielo brilis el la okuloj de la geamantoj. La festa manĝado daŭris kelke da horoj, kaj ofte eksonis de la multekoloraj tabloj la ekkrio: „Vivu Arnold kaj lia ĉarma fianĉino!“ — De la tilio, la gefeliĉuloj kun la du patroj, la amikoj de Arnold kaj kelke da kunludintinoj de Elsbeth, iris al la bieneto ĉe la „Eger“-monto. La domo tie estis tre ĉarme lokita, inter arb-etaro, sur la alta deklivo, kaj en tiu, pli mal-granda, sed pli intima rondo, la horoj preter-flugis Arnold'on kaj Elsbeth'on, ebriaj de feliĉ-ego, kiel minutoj. En la bieneto estis ankaŭ preparita la eleganta fianĉa kamero, kaj inter

la riĉaj fruktolaŭboj de la ĝardeno estis pretigita ĉarma noktomanĝo, kaj bonega vino alridis la gastojn el plenaj pokaloj. Fariĝis jam krepusko en la valo, sed la gaja rondo ne atentis ĝin. Fine, ankaŭ la lasta brileto de taglumo perdiĝis, kaj stelara nokto salutis la feliĉan paron.

Maljuna Veit ĵus komencis paroli pri sia juneco, kaj per tio li fariĝis tiel parolema (ĉar vino estis parolemiginta lin!) ke noktomezo proksimiĝis, kaj Arnold kaj Elsbeth kun arda deziro atendis la finon de la rakontado. Fine, Veit ĉesis kaj ekkriis: „Nu, bonan nokton, infanoj!“ kaj volis ankoraŭ akompani la gefianĉojn al la fianĉa kamero. Nun, malsupre en la valo, ekbatis la dekdua horo — terura ventego ekbruegis supren el profundo, kaj jen: Heiling, kun terure grimaca vizaĝo, starante en mezo de la ĉeestantoj, ekkriis: „Diablo, mi redonas vian servan tempon — neniigu tiujn ĉi!“ — „Tiam vi estos mia!!“ ekkriegis voĉo el ventego. — „Se eĉ mi apartenos al vi; se eĉ ĉiuj turmentoj de l' infero atendas min — neniigu por mi tiujn ĉi!“ — Nun, flama brulaĵo transblovis la monton, kaj Arnold kaj Elsbeth, Veit kaj la amikoj — staris ŝtonigitaj, la fianĉa paro amante ĉirkaŭprenante unu la alian, la ceteraj kun preĝe kunmetitaj manoj. „Hans Heiling!“

moke ridanta voĉego eksonis el la ventego: „Tiuĉi estas benitaj en morto; iliaj animoj alflugas al ĉielo! Sed, la limtempo de via kulpo estas pasinta — vi estas mia!“ — Hans Heiling deflugegis de la ŝtonego malsupren en ŝaŭmantan riveron Eger, kiu siblante ricevis kaj englutis lin — nenia okulo iam revidis lin. —

La sekvantan frumatenton la amikinoj de Elsbeth alvenis kun floroj kaj kronoj, por ornamu la novajn geedzojn, kaj la tuta vilaĝanaro sekvis ilin. Jen, ili trovis ĉie la efekton de la ruinigo: ili ekkonis la mienojn de la amikoj en la ŝtonegaj grupoj kaj laŭte plorante ili ĉirkaŭplektis siajn florojn ĉirkaŭ la ŝtonaj figuraĵoj de la geamintoj. — „Savon al ili!“ fine honorinda maljunulo intermitigis la profundan silentadon. „Savon al ili, ĉar ili estas foririntaj en ĝojo kaj amo; kaj kun brako en brako kaj koro ĉe koro ili estas mortintaj! Ornamu do daŭre iliajn tombojn per freŝaj floroj; tiuj ĉi ŝtonegoj restos por ni memoraĵo de tio, ke neniu malbona spirito havas potencon kontraŭ puraj koroj, kaj fidela amo pruviĝas en morto!“

De tiu tago ĉiu amanta paro pilgrimis al la regiono de la ŝtonegoj de Hans Heiling kaj petis benon kaj ŝirmadon de la gloritaj. Tiu pia kutimo jam ne ekzistas; sed la legendo restis viva en la koroj de la popolo, kaj ankoraŭ hodiaŭ la

kondukisto, kiu kondukas la fremdulojn al la ŝtonegoj de Hans Heiling, en la terura valo de Eger, citas la nomojn de Arnold kaj Elsbeth, kaj montras la ŝtonajn figuraĵojn, kiuj reprezentas ilin ŝanĝitaj, kiel ankaŭ la fianĉinan patron kaj la ceterajn gastojn.

Ankoraŭ antaŭ kelke da jaroj oni diris, ke la Eger terure kaj mireginde bruadas ĉe tiu loko, kie Hans Heiling estis defaligita, kaj neniu tiam preteriris, kiu ne faris krucon al si kaj rekomendis sian animon al Dio!



Johann Gabriel Seidl

A BLUULINO
A INVALIDO




Antaŭparolo.

J o h a n n G a b r i e l S e i d l, aŭstria poeto kaj verkisto, naskiĝis en Wien, la 21-an de julio 1804, studadis jurajn kaj filozofion, fariĝis 1829 gimnazia profesoro, 1848 membro de l' akademio de sciencoj, kaj 1856 i. r. kortega trezorestro. Li mortis en Wien la 18-an de julio 1875. Ĉiuj liaj poemoj interesas per sia profunda kaj varma sento, pureco de senco kaj gusto, kaj bonsoneco. Same ankaŭ liaj noveloj, kiujn li nomis „noveletoj“, kaj kiuj estis la unua tiama speco de malgrandaj noveloj, kiun tiam preferis la literaturama societo de Wien. El tiuj noveloj la du plej plaĉaj estas „la Invalido“ kaj „la Blulino“, kiujn ni jen prezentas al la Esperantista legentaro.

M ü n c h e n .

L. E. Meier.



LA BLUULINO

Denove du flamaj nigraj okuloj rigardis tra la lada kribileto de la pordo, apenaŭ ke mi tiris la sonorilon ĉe la loĝejo de mia amiko, la juna doktoro B., kaj hela voĉeto demandis min: „Kiu deziras eniri?“ — Kaj la pordo malfermiĝis kaj gracia knabino respondis, post kiam mi diris mian nomon: „Ho, kara sinjoro, hodiaŭ vi, bedaŭrinde, vane alvenis; lia doktora moŝto estas invitita en urbo!“

Kiom do diferencas tia rifuza informo de la naive insolenta sciigo de tromemfidaj ĉambristoj kaj la malĝentilaj nekontentigaj respondoj de pordistoj ekskuantaj ŝultrojn, kiujn oni ofte renkontas ĉe la limoficejo de tiu kaj tiu antaŭĉambro. Ofte, mi devas konfesi, mi ne kontentiĝis per tiu ĉi ĝentila rifuzo, sed mi demandis pri la detaloj de la invito, la loko, la horo de la reveno, tio kaj tio, kio

estis sufiĉe interesa por ne kaŭzi seninteresan respondon. Kaj tiuokaze mi ĉiam sentis, kvazaŭ mi ne starus antaŭ servistino, sed antaŭ fraŭlino; kun sekreta timemo mi rigardis la ĉarman palan vizaĝon kun la sufereca trajto super la okuloj, rimarkis kun indulga scivolo, ke ŝi evitis miajn demandojn pri sia antaŭa sorto, kaj mi ne povis kuraĝi meti ĉapelon sur kapon, dum mi, ĉe la sojlo, interparolis kun la agrabla pordistino kaj parolante prokrastis.

Jam delonge mi intencis demandi la doktoron mem pri tiu „knabino el fremdlando“ (ĉar tion pruvis dialekto kaj vestaĵo); sed, spite la fido, kiun mi sentis tiel kontraŭ li kiel ankaŭ kontraŭ la ĉarma knabino, mi tamen ne kuraĝis; ekzistas ja certaj cirkonstancoj kiuj nur tiam fariĝas ofendaj, kiam oni aludas ilin, kaj mi nepre ne volis, ke oni interpretu tiel mian demandon pri la knabino. Fine, dum horo de ĝoja kunesto, kiam mi parolis pri la enueco kaj necerteco de fraŭla vivo, kiun mi tiam havis, la okazo per si mem prezentiĝis.

„Koncerne mia fraŭla vivo“ diris la doktoro, „mi tre bone fartas; mi spertas ĉiujn agrablaĵojn, kaj kontraŭ ĝiaj maloportunoj, kiujn viro, kiel senekzerca, ne akomodabla

homo, ofte renkontas, min protektas mia — Henjo!“

„Ĉu via Henjo?“ mi diris; „la delikata, bonmora knabino, kiu ĉiam malfermas por mi la pordon? Ĝi kredeble estas tre bonanima, mastrumema persono; almenaŭ oni tion laŭ ĉio supozas!“

„Kaj por mi ĝi eĉ oferus sin“, respondis la doktoro; „mi propre ne diru ĝin; sed, vere, mi ĝuas la sinceran inklinon de la knabino pro mia bonanimeco kaj miaj senantaŭjuĝaj opinioj pri certaj cirkonstancoj de kutima antaŭjuĝo. Ĝi estas Rejnlandanino; — la hazardo renkontigis min al ĝi dum mia lasta vojaĝo tra Germanlando!“

„Tion mi tuj supozis; nome ke ĝi estas el tiu regiono; kredeble, ĝi estas orfino, ĉu ne? Mi delonge konjektis, ke ĝi estas, certe, laŭ apartaj cirkonstancoj, kaj ĝia tuta esteco min strange impresas!“

„Mi volas al vi rakonti la historion de la bedaŭrinda knabino, kondiĉe, ke vi ne supozas malserenajn motivojn de miaj honestaj intencoj. Aŭskultu do! Dum mia vojaĝo mi, ĉe la Rejno, trapasis vilaĝon, kiu havas ĉe tri flankoj montojn, ĉe la kvara la majestecan riveregon kiel naturajn limojn. Estis dimanĉo; la sonoriloj per ĉarma harmonio al-

vokis la vilaĝanaron el ĉiuj direktoj. Junuloj kaj junulinoj, solene vestitaj, aliris la preĝejon. Tre ĉarmaj vizaĝoj rigardis kaj afable salutis min. Bonstato kaj precipe puremo vidiĝis per kostumoj kaj sintenoj. Aparte frapis min la brile blankaj antaŭtukoj de la knabinoj, pro kiuj ili, ŝajne, tre gloriĝis, kvankam tiuj estis nur malmulte valora aldono al la simpla, bongusta festa vestaĵo, kiu ĉirkaŭis iliajn staturojn. Tiom pli surprizis min, kiam mi vidis ĉirkaŭ angulo de la preĝejo beletan, palvizaĝan knabinon — estis Henjo — kiu tute sola havis bluan antaŭtukon. Kun gaja saluto ŝi aliris la ceterajn, sed, tiuj ĉi, kvazaŭ vipero alvenus ilin, repuŝiĝis kaj, kun la malestima ekkrio: „Bluulino!“ lasis ŝin stari flanke. Plorante ŝi ŝancele foriris, apogis sin ĉe la vilaĝa tilio — malantaŭ kiu mi stariĝis, por pli precize vidi ŝin — kaj, laŭte singultanta, tordis la manojn. Mi vidis, ke la preterirantaj knabinoj mallaŭte interparolante kaj mokante deturnis sin de ŝi, sed plaĉeme kaj fiere ludetis kaj ŝiretis ĉe siaj blankaj antaŭtukoj, dum sur la blua antaŭtuko de Henjo defalis la larmoj de senkonsola malespero. Mi ja supozis, ke la koloro de antaŭtuko havas specialan signifon, sed mi ne povis diveni ĝian interrilton kun la publika opinio.

Unu el la junuloj, kiuj, dum preteriro, incitetis ŝin per insolentaj mokoj, proksimume supozigis pri la motivo. La bedaŭrinda knabino toleris ĉiun mokadon trankvile kaj longtempe rigardis antaŭ si fikse kaj senmove. Subite, kiel ekkaptata de rapida decido, ŝi, preskaŭ ne plu povanta paŝadi, ŝanceliĝe foriris tra flanka strateto. Mi ŝin tuj sekvis. Ĉe la bordo de l' Rejno ŝi ekhaltis. Mi staris malantaŭ ŝi, sed ŝi ne vidis min. Nun ŝi kunmetis la manojn, preĝis mute kaj fervore, tiam deŝiris de si la bluan antaŭtukon, ekmoviĝis per salto en la ondojn — kaj, post longdaŭra mortosimila sveno, ekvekiĝis nur en mia ĉambro, kien mi portigis ŝin, senkonsidere de la diroj de la vilaĝanaro, kiuj tute ne interesis min. Kiam ŝi rekonsciiĝis, mi malkovris al ŝi mian profesion kaj petis, ke ŝi estu trankvila kaj senzorga kaj, provizore, vidu en mi neniun alian, ol nur kuraciston.

Ŝi senvole cedis miajn petojn, kvazaŭ tiuj ĉi estus ordonoj kaj, tre ĝojige por mi, baldaŭ ĝuis refreŝigan dormon, dum kiu mi trovis okazon, pli detale informi min pri ŝia sorto. Mia gastejestro, el kies domanoj Henjo estis unu, ne rifuzis sciigi min pri ŝia sufereca historio, detale, kun kelke da malafablaj glosoj kaj mokaj maldelikataj aldonoj. Estis,

vere, ne malfacile, diferencigi veron kaj aldonojn de komuna antaŭjuĝo, kaj, laŭ tio, jena rakonto estas la vera raporto pri la sorto de Henjo:

La vilaĝo, kie mi fariĝis la savanto de ŝia vivo, estas ŝia naska vilaĝo, loko, kiu, pro ĝia ĉirkaŭlimiteco, havas ankaŭ certan limitecon kaj apartecon de la moroj de la loĝantoj, nome — kiel facile okazas — certaj proverboj, kutimoj kaj spritaĵoj nur kompreniĝas interne de la ĉirkaŭbarita valo, en kiu situacias la beleta vilaĝo. Fintempe senigita de siaj gepatroj, malriĉaj gefarmistoj, ŝi estis akceptata en la hejmo de la posedantino de proksima kastelo, maljuna, legema, sed bona kaj bonkora sinjorino, kiu traktis ŝin kiel propran filinon. La spirita karaktero de ŝia edukantino ne restis sen postefiko. Ankaŭ Henjo baldaŭ ĉerpis, el diversspeca, neelektita kaj sentendenca legado en romantika soleco, venenon de trofantazieco kaj revemo. Rigora izoleco, plena senkono de l' mondo kaj manko de pli fortika kaj spirita subteno, kreskigis tiun elkreskon de viva fantazio. Jen, subite mortis ŝia bonfarantino, antaŭ ol tiu ĉi legitime prizorgis la estontecon de Henjo. Nun tiu ĉi estis la duan fojon orfiniĝinta, kaj dum la plej aktiva disvolviĝo de sia interna esteco.

Nun lasata al sia sorto, al kutimata je pli dolĉa traktado, ol oni povas supozi ĉe neklera vilaĝanino, ŝi dungigis kiel servistino en la malgranda sed bone ordigita hotelo de l'vilaĝo, kie mi enloĝigis. Tie, kie vojaĝantoj, migrantaj malsupren, laŭlonge de l'Rejno, ofte gastadas, ŝi trovis sufiĉe da okazo, amatigi ĉe vojaĝantoj kaj ankau, komence, ĉe siaj gemastroj, pro sia nekutima klereco.

Iufoje, kaj tion ŝi, pli poste, mem konfesis al mi, kiam mi certigis ŝin, ke mi precize scias ŝian sorton — alvenis vojaĝanta pentristo, juna viro kun brunaj bukloj, mentona barbetoj kaj lipharoj, flamaj okuloj, alta frunto, sur kiu larĝa ĉapelo, sub kiu la bukloj eligis, estis profunden premita, kun vigla sinteno kaj bonanima parolmaniero — Wien'ano! Henjo ne malpli impresis lin ol li impresis ŝin. Ĉar li estis akompananto de nobelulo, li ne povis mem fiksi la templimon de sia restado. Sed tiu ĉi do daŭris sufiĉe longtempe por ebligi la pentradon de du portretoj, la interŝanĝon de du ringoj kaj trorapide interligigi per dolĉa ligilo, kies konsekvencoj venenis la feliĉon de l'vivo de Henjo. La pentristo forvojaĝis — malvolonte, laŭ lia diro, kaj kun disŝirita koro — kaj estis jam malproksima, kiam la famo sciigis la mondon pri la kulpo

de bedaŭrinda, trompita Henjo! Baldaŭ komenciĝis nun la veraj turmentoj de ŝia animo. Post kiam ŝi, malforta dum longa tempo, restadis en domo kaj pacience toleris kelkan ŝercan flankan rigardon de la domanoj kaj kelkan maldolĉan parolon de la najbaroj, ŝi fine, la unuan fojon devis eliri domon — tiun saman dimanĉon de mia alveno. Jam la orgeno de l' proksima preĝejo vokis al Dioservo. Dolĉa interna puŝo, forigi de sia koro ĉiun ŝarĝon de peko, devigis ŝin, fari la unuan paŝon sur sankta tero, por penti, pentofari. Ŝi petis, ke oni donu al ŝi ŝian festan vestaĵon. Silente la dua servistino ĝin metis sur seĝon. Jam la falda jupeto ĉirkaŭis ŝiajn koksojn; jam la beleta ĉapeto estis sur la bele dislimigita hararo; jam ŝi volis ĉirkaŭligi la blankan antaŭtukon — jen ŝi ekvidis, — kaj terure emociite repuŝiĝis ke oni estis metinta bluan anstataŭ blankan antaŭtukon. Nur nun ŝi komprenis la signifon de esprimo, kiun ŝi jam ofte aŭdis citi kiel fortan malhonoron, sen antaŭsento de ĝia senco.

Nome, en ŝia naska vilaĝo tiel, kiel en Bavarujo kaj aliaj germanlandaj provincoj oni, de antikva tempo, kutimas, ke tiuj knabinoj, kiuj same pekis kiel Henjo, ne povas plu vesti sin per blanka, sed nur per blua antaŭtuko.

Per tio, ilia peko daŭre estas kvazaŭ al ili mem prezentata; en preĝejo neniu permesas al ili eniron en sian preĝan benkon; ĉe solenaj procesioj ili ne trovas iun akompanantinon, ĉe kirmesaj festoj neniun kundancanton; ili devas toleri ĉiun arogantan ŝercon; ke, se iam ili plendas pro sia malĝojiga sorto, oni nur respondas: „Lasu ŝin! Ŝi estas bluulino!“

Vere, tre dolore ankaŭ Henjo spertis, kiel terura povas fariĝi peko per la alie indifera koloro de senvalora vestaĵa peco; ke la venĝo nenion estimas kiel tro sensignifa por per ĝi puni sian oferaĵon! Devigite (ĉar neniu plenumis ŝian petegon, ke oni donu al ŝi la plej eluzitan, malpuran, sed tamen do blankan, antaŭtukon) ŝi ĉirkaŭligis la bluan tolpecon, eliris en straton, mezen inter la junulinojn, kiuj aliris la preĝejon, por kvazaŭ kontrabande eniri la lokon de pentofaro inter puraj. Bele ornamitaj per neĝoblankaj antaŭtukoj, la junulinoj de la vilaĝo alvenis, plejparte kunludantinoj dum ŝia juneco, gaje duope, intime interbrake, feste edifitaj. Ŝi ne povis plu reteni la puŝon de sia koro; la konscio de resaniĝo post dolora batalado kontraŭ la morto, la espero, ke la ĝojo de revido ne permesos riproĉon, por momento forgesigis

ŝin pri ŝia malhonora versigno. Kiel dolorige oni ŝin memorigis pri ĝi — tion mi rimarkis mem.

Ankoraŭ la bedaŭrinda knabino dum maldormo kaj febra dormo batalis kontraŭ la turmentaj postsuferoj de sia, estas ja vere, meritita, sed tamen maldolĉega puno, kiam mi sciigis ŝin, ke mi estas preta por revojaĝi Wien'on, ke mi volas kunpreni ŝin kaj, tute honore, translasi al ŝi mian mastrumon.

Mia simpla konduto, sincera kompatato kaj subita propono — ĉio kaŭzis, ke ŝi sekvis min. Mi honeste plenumis mian promeson — tion ĉi mi devas mem konstati; ŝi ne sentas iun mankon ĉe mi — nenium — krom —“

„Eble la ebleco“ mi intermetis, „revidi tiun, kiu estas la kaŭzinto de ŝia malfeliĉo —?“

„Tiu ĉi ebleco ja estas tie ĉi multe pli verŝajna, ol iel ajn alie“, diris la doktoro.

„La pentristo estas Wien'ano kaj lia koro — ŝi ankoraŭ nun ĝin fidas — ne malbona. Se mi prosperus ankoraŭ pli ol mi mem unuamomente intencis — kion vi pensas pri tio?“

„Ke tiu estus unu el viaj plej bonegaj kuracoj! — Resanigi disŝiritan koron, doktoro — kia bela triumfo! — Kvankam mi neniam havis aferon kun arestletoj, mi tamen, se mi eĉ trovos la junan pentriston kun brunaj

bukloj, mentona barbeto kaj lipharoj kaj flamaj okuloj, mi klopodos fariĝi lia amiko, esplori lian koron dum horo de intima kunesto kaj tuŝi la plej dolĉan kordon de lia interna sento, kaj revoki al lia memoro la kulpon de pasinta tempo. Se tiam li dezirus, rebonigi sian pekon, ho, kiom afable mi prenis lin sub brako kaj kondukus lin al vi, kara doktoro! Tia interkvitiĝo de sorto do, vere, estus ĉieleca momento!“

La doktoro skuis mian manon; Henjo ĵus eniris la ĉambron. Ŝi kredeble rimarkis, ke niaj okuloj malsekiĝis, kiam ni ŝin rigardis.





LA INVALIDO

Estis ĉirkaŭ la kvara horo posttagmeza — (rakontis al mi amiko kiu revenis de vojaĝo tra Nordgermanujo) — kiam mi alvenis S...’on, ĉefurbon de malgranda princolando. Kvankam ĝi estas flanke de mia tiama vojo, tamen la famo de ĝia princa parko, kiu, en sia unikeco, ornamas tiun urbon antikvecan, ne pentigis min pro la malgranda dedirektiĝo de kelke da mejloj. Mi ekvojiris kelke da horoj pli frue ol kutime, kaj per tio kompensis la perdon de tempo.

La famo pruviĝis kiel vera: la ĝardeno, ĉirkaŭanta la princan someran palacon, enhavis ĉion graciegan kaj interesan, kion angla kaj franca gusto ajn povas prezenti. Laŭ tiu romantika intermikso de rigora reguleco kaj ŝajne senregula libereco oni ne povas plu dubi, ke la hortikulturo ankaŭ estas unu el la liberaj artoj, kvankam la moderna estetiko ne volas tion konsenti.

Kun vigla impresebla animo mi nun paŝis laŭlonge de cirkele mezuritaj muroj kaj arb-
etaj de bukso, nun mi kvazaŭ perdiĝis en labir-
inta sovaĝejo, kaj subite kaj senatende el-
venis sur liberan placon kun invitanta font-
ano kaj aeruma kiosko; jen, inter balanciĝ-
antaj poploj albriletis min gracia obelisko,
tie blanka marmora ŝtuparo leviĝis supren,
per moderaj intermitaj gradaroj, al la supro
de monteto, de kie ĉarma templo ĉirkaŭ-
briletis trans la tuta malaltaĵo. Miaj rigardoj,
kvankam ili plejeble avide ĉirkaŭvagadis,
apenaŭ sufiĉis, por akcepti la pli kaj pli
multiĝantajn impresojn, kiuj de ĉiuj flankoj
invitis kaj allogis. Tamen, ankaŭ beleco fine
lacigas, se ĝiaj diversaj formoj preteriras nin
senintermite, sen decaj paŭzoj, kaj la animo
apenaŭ trovas la tempon por memori ilian
nombron, malpli ankoraŭ reteni la karakter-
izajn ecojn de la unuopaj aĵoj. Laŭ
tio sentis mi mem, precipe, ĉar mi estis sola
havante neniun, kiu partoprenus la ŝanĝon
de la multego da scenoj kaj vidoj aŭ kvazaŭ
servi min kiel subteno. Preskaŭ malbonhumor-
iĝa pro mi mem, ĉar la plej afabla societo de
arto kaj naturo ne povas sufiĉi min por kon-
servi mian bonhumoron, mi fine fetis min
kontraŭ arte farita ruinaĵo, sur ĝardeno



sofo kaj, kun stranga mikso da trosatiĝo kaj soleco senpense rigardis antaŭ mi.

Flanke, sur fragmento de kolono, sidis grizbarba invalido, kiu per sia bastono desegnis figurojn en la sablon. Li estis unu el tiuj gardistoj kiujn mi jam ripete renkontis dum mia promenado tra la ĝardeno, unu el tiuj eluzitaj, per pulvo brunigitaj staturoj, kiuj, per siaj dekoloriĝintaj, malmodernaj uniformoj pruvas, ke ili, iam estinte, multe pli sentis sin komfortaj en batalaj tumultoj, ol en la nuna enuiga, unuforma estado de paco, dum kiu ne eĉ ekzistas kardoj senkapigeblaj. Inter tiu speco de homoj ekzistas du klasoj; tiuj el la unua klaso jam tute forgesis parolon; la dumjara interrilato kun mutaj statuoj, silentaj grotoj, sekrete siblantaj arboj kaj mal-laŭte plaŭdantaj fontanoj kutimigis ankaŭ al ili tian silentemon, ke ili nun avertas per movo de mano, minacas per levita bastono, senparole interkomunikas kun bone konataj objektoj kaj, se oni ilin demandas, nur respondas mallonge kaj malbonhumore. La individuoj el la dua klaso ĵus estas ĉe la limo kiu apartigas babilemon de malparolemo. Ne ankoraŭ ili povas forgesi la gajajn babiladojn kun kamaradoj, la multespecan vivon kazernan, la grandan societemon de la milit-

isteco ; ili kredas devi ekparoli al ĉiuj monu-
mentoj kaj arabaj trunkoj, al ĉiuj ŝtonoj kaj
kaskadoj de sia nova ĉirkaŭaĵo, kaj rigardas
ĉiun homon, kiu proksimiĝas ilin, tiel parol-
emaj, ke oni necese devas kompreni ilin, se
eĉ oni havas nur tre malmulte da fiziono-
miaj konoj.

Tiu invalido, kiu evidente volis atentigi
min pri si, ŝajnis pli aparteni al tiu ĉi ol
al tiu klaso. Mi jam mem sentis la mankon
de interparolo, per kiu mi povus forigi mian
malbonhumoron. Ofte oni kunsidas kun du-
dek homoj ĉe tablo kaj silentas, sed tamen
estas tre bonhumora, ĉar oni scias, ke oni
povus paroli laŭ plaĉo ; kontraŭe, oni multon
oferus, se oni povus paroli eĉ unu parolon al
iu, kiam oni estas soleca kaj ne povas trovi
eĉ unu homon alparoleblan. Mi tiuokaze ĉiam
memoras pasintan spertaĵon. Nome, iam, dum
karnavalo, malfrue post noktomezo, mi reiris
al mia loĝejo ; mia vojo kondukis min trans
soleca ponto, sur kies mezo staris posteno.
Kiam mi proksimiĝis la soldaton, li alkriis
al mi duonlaŭtan „Haltu!“ Surprizite mi ek-
haltis, post kio la soldato diris al mi afablan
„Bonan nokton!“, kion mi same afable re-
donis. Certe, li jam enuis post du horoj da
gardostaro sen iu homa alparolo ! Tiel mi

ankaŭ divenis la parolemon de tiu invalido. Bonvole mi komencis, demandante lin pri tio kaj tio, kaj li paroleme diris respondojn. Unu parolo kaŭzis alian, kaj baldaŭ la parolado transiris la limojn de la ĝardena koncerno, kaj gvidis nin al pure homaj temoj, kiuj ĉiam dum vojaĝoj min pli interesas, ol pentrindaj vidoj. Per flama esprimo la maljuna lipharulo donis al mi mallongan, sed interesan skizon de sia biografio, kies ekscio fine min pli amuzis, ol la princa parko kaj ĉiuj ceteraj rimarkindaĵoj de la urbo.

Hans Krock fariĝis invalido dum la lasta laŭdira liberiga milito. La lasta batalo de la uzurpinto en Germanlando kaŭzis ankaŭ, ke la bataliono, kies ano estis Krock, devis fari, sub la komando de eminenta generalo, mortigan bataladon. Ĝi devis protekti la intermonton, malantaŭ la urbeto H..., tra kiu la malamika armeo da 48 000 infanterianoj kaj 12 000 kavalerianoj intencis trarompi, por atingi la transan bordon de la lima rivero. Tiu afero estas kolosa por tiel malgranda korpuso kiel tiu de la generalo — „Ni staris“, li rakontis kun pli kaj pli multiĝanta viveco, „sur monteto; malantaŭ ni estis kruta monta muro kiu ne estis ĉirkaŭirebla; sub ni la strato de la urbeto, kiu ĵus estis la duan fojon atakata

de la malamiko, kaj antaŭ ni la intermontaĵo kiu direktiĝis al la rivero. Estis frua mateno; terure tondradis proksimaj kanonoj. La bruado alsonis; brulaodoro kaj pulva fumo plenigis la aeron kaj, alportita de la vento, alblovigis al nia vico! — Bataleto aŭ eĉ batalo, sinjoro, ne estas granda afero; — mi scias, ĉar mi trabatalis kelke da tiaj — sed la atendado ĝis kiam ĝi komenciĝos, estas terura afero; precipe se oni devas antaŭe rigardi la terurajn prologojn de la komenco, se oni staras en ordo kaj unu trupo post alia marŝas antaŭen kaj unuopaj soldatoj estas, vunditaj aŭ senmembrigitaj, portataj malantaŭen, aŭ revenas lamantaj kaj al la tima demando: „Nu, kiel estas?“ ili respondas ĝemantaj, „malbone, malbone:“ se la bruado tiam pli kaj pli proksimiĝas kaj jam unuopaj kugloj alflugegas kaj tie kaj tie kaŭzas breĉon, kaj, dum oni sin turnas al kamarado ĉe dekstra flanko, kamarado ĉe maldekstra falas kun dispafita kapo! Kiam oni fine estas mem en aktiveco, la afero jam estas pli bona; ĉar tiam konsidero kaj pripenso ĉesas kaj estas anstataŭataj per kolero kaj blinda fervoro. — Tiel ankaŭ ni staris kun maltrankvila kuraĝeco kaj estis trompataj pli ol dekfoje per la proksimiĝo de la batala tumulto, ĝis kiam fine la batalado eksplodis ĉiuflanke.

Algalopis adjutanto kaj transdonis ordonojn al nia generalo. La interligitaj armeoj estis okupintaj la urbon. Almarŝis la malamiko; ni lin haltigu ĝis kiam nia ĉefa korpuso kolektiĝis por energie persekuti lin kaj plejeble longtempe reteni lin de la transiro trans la lima rivero. — „Nun atentu!“ kriis al ni la generalo, faris siajn aranĝojn kaj mallonge, sed imprese paroladis al ni, kaj ĉiu el ni entuziasmiĝis. Jen la malamikaj disvarmantoj senorde alatakis. La kanonoj, kiuj estis starigitaj por trafi la intermonton, pafis inter ilin tiel ke ili kiel grenventumaĵo disflugis. Sed nun de ĉiuj partoj pli densaj aroj, multeforme kunmiksitaj, almarŝegis kaj dum senĉesa batalado, atako de nia posteno, retirigo, antaŭeniĝo, kaj reŝveliĝo direktiĝis kontraŭ la intermonton. Jen eksonis la komanda alvoko: „Antaŭen!“ — Nun ni atake formarŝis antaŭen, tra pulva fumo, trans ŝtonoj kaj fosoj, mortintoj kaj mortantoj, ĉiu post sia antaŭulo, sen scio kien? La kanonoj estis almenaŭ ŝajnis laŭ la sonado, metitaj pli antaŭen. Kiu estas venkanta, ne estis distingebla pro la intermiksado. Ĉirkaŭfajfitaj de flugantaj kugloj, nun renkontantaj niajn kunbatalantojn, nun interbatalantaj kun la malamikoj, ni, kiel jam dirita, premis nin mal-

supren. Longtempe tio daŭris — kiom da tempo? kiom da horoj? — kiu povus juĝi pri tio dum tia sentado? Fine la fumado disŝiriĝis, kaj ni ekkonis, ke ne nur pulva fumo, sed ankaŭ la densa oktobra nebulo estis barinta la elvidon: hele lumis la suno super ni. Ni jam atingis la riveron, kie fariĝis obstina interbatalado. Jam parto de la malamikoj transiris la lignan ponton de la rivero, kiu ligis ambaŭ la bordojn, kiam ĝi ekbrulis kaj samtempe taĉmento da husaroj enrajdis la akvon kaj atakis ilin flanke. Nun oni ambaŭflanke fervorege interbataladis. Nur posttagmeze la afero finiĝis. Atako kaj transiro kostis al la malamiko ĉirkaŭe 15 000 mortintojn kaj 10 000 kaptitojn kun la perdo de 200 oficiroj. Ankaŭ ni kalkulis 9000 mortintojn, inter kiuj estis la glora ĉefgeneralato, la ĉefkomandanto. La nombro de niaj vunditoj estis granda; bedaŭrinde inter ili estis ankaŭ mi. Jus antaŭ la fino de la batalo la diablo alsendis kuglon kiu tiel maldolĉe tuŝis mian dekstran brakon — jen, vidu! — ke ĝi restis por ĉiam lama. — Sed tamen, kara sinjoro! — oni preskaŭ ne kredus — en tiu mizera situacio, mi kuŝanta inter kadavroj, mem duone kadavra, travivis grandan, belegan scenon, scenon de entuziasmo, kiun mi longtempe

kredis la ĉefan momenton de mia vivo! Dorse apogita kontraŭ la fragmento de afusto, mi sidis, prizorganta laŭ eblo mian brakon, kiam subite formiĝis rondo; la restantaj trupoj, starantaj dissemitaj ĉirkaŭen, stariĝis laŭ ordo, kaj nia generalo, kun siaj oficiroj algalopis, por, en tiu ĉi loko, kvazaŭ la centro de la ĉiama batalado, prividi la efikojn kaj rezultatojn. De ĉiuj partoj alvenis la plej kontentigaj raportoj. Subite alvenis la nova ĉefgeneralo mem, kiu, meze de l' batalo, anstataŭis la antaŭan, mortigitan; li alrajdis al mia generalo, klinis sin transen al li, kaj, post kiam li kore ĉirkaŭprenis lin, ekriis: „Via generala moŝto, la germanlanda tero estas purigita de malamikoj! Decas al vi la gloro de tiu ĉi tago! Gloron al viaj bonegaj trupoj, gloron al vi, gloron al nia princo!“ — Tiu ĉi venka saluto kaŭzis milvoĉan eĥon; dum malpli ol kvin minutoj laŭta nehaltigebla ĝojego de ne aranĝita triumfa festo bruadis trans terspacon da mejloj ĉirkaŭe, kaj pafiloj kaj kanonoj kunsonis kun la hura-kriado de l' armeoj, kiuj, kun ne hipokrita entuziasmo, kriis la gloron de nia generalo, la heroo de tiu tago, supren al la nuboj!

Sinjoro! — kiam mi tie sidis, nerimarkita, apogita ĉe la afusto, kaj vidis la bravan ge-

neralon, superpolvumitan, kaj sangomakulitan, konservatan kaj protektatan meze de kugla pluvo per la propra mano de Dio, kun brilantaj, larmaj okuloj, gloratan de miloj, ĉirkaŭĝojegatan eĉ de tiuj, kiuj trovis nur vundojn kaj dolorojn sub lia komandado, kaj kiam li tiam rigardis ĉirkaŭ si, kaj al kamaradoj skuis la manojn, ne nur de oficiroj, sed ankaŭ de simplaj soldatoj kaj dankis ilin pro ilia kuraĝo, kaj tiam, fortirante la ĉapelan ligilon, levis la plumĉapelon kaj dankis Dion por la venko, kaj la tuta armeo, kun tambura trilado, kundiris la dankan preĝon — sinjoro! — ankoraŭ hodiaŭ mi sentas ploreme, kiam mi tion memoras — estis momento, vere, dum kiu mi, spite mia paralizita brako, — pro Dio! — sentis min pli feliĉa, ol iam dum mia vivo! Kaj mi tiam jam havis preskaŭ kvardek jarojn! — Feliĉa viro, mi ekkriis, „kies nura vido jam feliĉigas! Kiu estas pli granda ol vi? — Enviinda vi — tia momento, vere, valoras tutan vivon! — kaj laŭta „vivu!“ eliĝis el miaj lipoj, kaj favora venteto portis ĝin al lia orelo; li ĝin aŭdis, alrajdis al mi, demandis pri mia nomo, informis sin pri mia vundo kaj ordonis, ke mi, post mia resaniĝo, prezentu min ĉe li! Mi sentis min feliĉega, ĉar mia generalo, kun sia tuta gloro, indigis min de alparolo, kaj sin interesis pri mi!

Oni sendis min en malsanulejon. Mia resaniĝo estis malrapida. Fine mi estis tiel resaniĝinta kiel vi min vidas nun. Mi, estas vere, povas levi kaj movi mian brakon — sed nur pene, kaj nur malmulte; por porti pafilon ĝi ne plu taŭgas. Oni do sendis min en la invalidejon, kie mi restis ĝis la interkonsento de paco, daŭre esperante favoran lokazon, por ree vidi mian generalon. Fine, kiam la diversaj korpusoj ree marŝis hejmen, la ŝanco ebligis, ke la atendita viro alvenis, dum marŝo, nian urbon. Mi prezentis min ĉe li kaj estis afable ricevata. Li promesis, doni al mi taŭgan oficon en sia domo. Apenaŭ alveninte sian hejmon, li plenumis sian promeson kaj venigis min al li. Mi fariĝis speco de ĉambristo aŭ pordisto kaj sentis min sufiĉe feliĉa, esti tiel proksima ĉe tiel glora viro kaj ĉiutage esti permesata vidi lin. Nenio mankis al mi en lia domo kaj mia estonteco estis prizorgata de li kiel de patro.“

La invalido ĉesis paroli; sed laŭ la sono de lia voĉo, li ne estis tamen ankoraŭ fininta la rakonton. Mi demandis lin, ĉu la generalo, kiu donis al li servon, jam mortis, kaj li pro tio ree spertis sian antaŭan sorton?

„Li ankoraŭ vivas“, li respondis; „mi mem estas la kaŭzo de la perdo de mia ofico!“

Li evidente ne povis decidiĝi, pluen rakonti. — „Supozeble, tiu kvieta ofico ne plaĉis vin daŭre; jen la kutima sorto de homoj, kiuj kutimis pli viglan vivadon, laŭ la militista!“

La grizulo preskaŭ ofendiĝis pro tiu diro. — „Sinjoro“, li respondis; „vi eraras, se vi opinias, ke mi estis malkvietulo, aŭ, pli bone dirita, malkontentulo, kiu ne povas toleri tro bonan situacion, laŭ la karaktero de kelka homo! — Tute ne! sinjoro! — Tio, kio forpelis min, estas tute alia kaŭzo! — Mi ne rakontas ĝin volonte, ĉar oni povas facile juĝi malĝuste pri mia karaktero! Sed ĉar vi postulis, mi do devas!“

Tion mi ja intencis; tial mi ankoraŭ pli urĝe petis lin.

„Vi scias“, li diris, „kiom mi ŝatis la generalon! Li ŝajnis al mi kiel pli supera estaĵo, kaj mi nepre pensis, ke neniu ajn povus superi, nek eĉ egali lin. Se tia kvazaŭ idoleca respekto iam estis kontraŭtuŝata, — la kaŭzo necese devas esti tute aparta afero — sed tiuokaze ĝi ankaŭ por ĉiam estis nuligata! Tia estas mia okazo. — Inter aliaj devoj, mi ankaŭ havis tiun, anonci al li la personojn, kiuj havis ion por peti de li.

Iun tagon venis virino kun siaj du infanoj. Ŝi sajnjis al mi konata, kaj ankaŭ mi ŝajnis

konata al ŝi. Vere, ŝia edzo iam estis mia leŭtenanto, kies loĝejon mi ofte vizitis. Li mortis dum la sama batalo, dum kiu mi perdis mian brakon. Ŝi estis, laŭ ofta okazo de amaj aferoj, tute ne pripensanta eblan estontecon, edziniĝinta sen iu pretendo de ŝtata pensio, kaj la subita morto de ŝia edzo kaŭzis al ŝi plej grandan mizeron; oni povis jam supozi tion laŭ la ekstero de ŝi kaj ŝiaj infanoj. Ĉar ŝi sciis, ke la generalo ĉiam estis afabla kontraŭ siaj subuloj, ŝi riskis laste rifuĝi ĉe lin.

Ŝi estis akceptata. Mi ĵus devis ion ordigi en la ĉambro. Ĉar tiuĉiokaze la generalo havis aferon kun petantino, li ne konsideris la kutiman etiketon kaj toleris mian ĉeeston. Ŝi memorigis lin pri sia edzo kaj lia servado; mia estro havis tre bonan memoron, kiu nur malmulte bezonis helpon.

„Mi precize konis vian edzon“, li iom afable respondis, „li estis brava oficiro! Domaĝe, ke li ne povis progresi!“

La bedaŭrinda vidvino kredis, ke tiu diro estus bona antaŭsigno; ŝi fariĝis pli kora kaj komencis priskribi sian mizeron. Mi sentis vere larmojn en la okuloj. Sed ju pli ŝi fariĝis sentema, des pli la generalo fariĝis nesentema. Kun mieno, kiun mi neniam antaŭe vidis ĉe li,

kun preskaŭ timema mieno, li provis ĉesigi la interparoladon aŭ gvidi ĝin al alia temo. Li kvazaŭ pli kaj pli malvarmiĝis. Mi miris ke li tiom devigis sin anstataŭ, se la afero tedas lin, tuj forigi ŝin; ŝajnis, vere, kvazaŭ al li mankas por tio kuraĝo!

Sed la bedaŭrinda virino pli kaj pli fervoriĝis kaj kuraĝiĝis; oni vidis, ke precipe la viva konscio de sia mizereco plikuraĝigis ŝin. Ŝi rakontis al li, ke nun subite prezentiĝas al ŝi, kvazaŭ per miraklo, elturneblo el ŝia nekonsoleca situacio.

„Tion vi do tuj uzu!“ la generalo rapide intermetis, kvazaŭ li nun trovis okazon por liberigi sin. „Pro Dio! Brava virino, kiu ion lernis, ne povas pereii, certe ne!“

„Iu societo da virinoj de tiu ĉi urbo“, la vidvino daŭrigis, „interkonsentis, puŝata de bonfaremo, dediĉi la liberajn horojn dum tago al virinaj laboroj kaj vendi la rezultatojn de tiuj klopodoj por la bono de bezonantoj. La afero progresis, kaj nun ili estas pretaj aranĝi vendejon kaj konfidi la vendadon de la komercaĵoj al malriĉa virino, kiu pro tiu ofico ricevos loĝejon, nutraĵon kaj moderan salajron laŭ la procentoj de la enspezo.“

„Nu do — jen do bonega afero por vi!“ diris la generalo; „certe, vi ricevos tiun

oficon; ĉar oni ĉiam konsideras la vidvinojn de bravaj militistoj!“

„Vere“, respondis la petantino, „oni ankaŭ estas inklina, akcepti min, kaj mi, per tio, estus almenaŭ, kun miaj du infanoj, protektata kontraŭ plej urĝa mizero ĝis kiam mi havos pli bonan eblon por gajni porvivon; — sed — la regularoj de la societo postulas kiel garantiaĵo por la ĉiufoja komercaĵo, kaŭcion da sesdek taleroj!“

„Sesdek taleroj!“ ripetis la generalo; „Tiu estas, vere, malmulte da mono!“

„Via generala moŝto“, intermitigis lin la vidvino; „por tiu, kiu ne havas tiom, ili estas pli ol miliono! Mi ne havas tiom da mono! — La malgranda kapitalo, kiun miaj gepatroj testamente postlasis al mi, elspeziĝis dum la unua jaro post la morto de mia edzo; la laboraĵo, kiun mi faris per miaj manoj, apenaŭ sufiĉis por tiom pligrandigi la malgrandan sumon enspezitan per la vendo de tolaĵo, vestaĵo kaj aliaj restoj de nia malmulta havaĵo, ke mi povis protekti nin kontraŭ malsato! Nun mi ne plu havas iom, tute nenion, krom miaj manoj, kiuj, eĉ kun plej granda diligenteco, ne povas sufiĉe labori, por nutri tri personojn, kaj miaj infanoj, kiuj nur povas preĝi, ke Dio sendu al ili patron! — Via generala

moŝto — estu vi ilia patro! — Sesdek taleroj — ne donacitaj, nur pruntitaj — povos savi tri homojn de la plej urĝa mizero! — Ne estas nun la demando pri momenta helpo, kiu post kelke da monatoj ree necesiĝos, kiel ĉe kelka malriĉulo, kaj tiam daŭre ripetiĝos — Ne! per sesdek taleroj oni helpos min por ĉiam entute! Per ili mi povos envicigi min inter komercantaj homoj, mi akiros interrilatojn, konatiĝos, trovos okazon por perlabori monon kaj gajni estonte porvivon! — Kompatu la vidvinon de viro, pri kies morto vi mem ja diris „domaĝe!“

„Sinjorino, mi estas generalo“ respondis mia estro, sensenteme fortunante sin, „sed ne monpruntisto! Se via edzo transvivus la batalon, li nun estus kapitano — kapitano per mi! — Por lia vidvino mi ne povas fari ion, ĉar por virinoj ne ekzistas rangaltigo!“

Jen la parolo, kiu ekskuegis mian ŝaton de la generalo, kiun mi iam konsideris kiel duondion; iu voĉo en mi mallaŭte diris al mi: „Krock — nun li estas sub vi, nun vi povas superi lin!“ — La viro, kiun lia kuraĝo faris grandegulo, jen, pro lia avareco malgrandiĝis antaŭ mi kiel malgrandegulo! Mi nur vidis ke ŝi, kun siaj infanoj, ĵetis sin antaŭ liaj piedoj kaj mi nur aŭdis ankoraŭ, ke

li forigis ŝin de li kun la riproĉo: „Vi kaŭzis ĝin mem — kial vi edziniĝis?“ Nun mi ne povis plu reteni min; kvazaŭ mi finis mian laboron, mi eliris el la ĉambro, por ekstere atendi la bedaŭrindan rifuzitan virinon.

Post malmulte da minutoj ŝi elvenis kun mieno de malespereco; fikse rigardanta antaŭ si, ŝi lasis pendi la brakojn, ĉe kiuj la infanoj plorantaj timeme kore alkroĉiĝis. Mi stariĝis antaŭ ŝi.

„Sinjorino“, mi diris; „vi bezonas sesdek talerojn, ĉu ne? — Tiom, ĉirkaŭe, mi reportis el la milito. Ĝis nun mi ne bezonis ilin uzi. Via mortinta edzo iam savis min de degrado, kiam mi estis en lia taĉmento kaj, pro eraro, ne povis ĝustigi la kompanian kalkulon; mi do ŝuldas repagon! Mi prunte donas al vi la sesdek talerojn, se vi ne rifuzos ilin!“

„Sinjoro, laŭ mia rakonto, mi iam travivis momenton, kiam mi kredis, ke mi neniam plu povos ĝisvivi pli emocian aferon! — Sed, pro Dio! Sinjoro, kiam la bona bedaŭrinda virino rigardis min tiel melankolie nekredema, kvazaŭ ŝi ne scius, ĉu mia propono estas vera aŭ moka, kaj kiam fine ŝiaj rigidaj ŝtonecaj trajtoj aliĝis kiel per tiu nevola, konvulsia ekstremo, kiu kutime antaŭiras ploradon, kaj ŝi, fine eksplodanta, ekprenis mian manon

kaj volis kisi miajn, la manojn de invalido, kaj, ĉar mi nepre ne permesis tion, ŝi incitis la infanojn, ke tiuj ĉi alkroĉis al mi tiel, ke mi apenaŭ ne povis deigi ilin, pro mia unu brako — sinjoro! tiam mi levis la okulojn al la ĉielo kaj, la unuan fojon dum mia vivo! fariĝis tromemfida kaj demandis Dion, ĉu por simpla suba soldato kiel mi, kiu ne povas fariĝi heroo, tia momento ne ĝuste tiom valoras, kiom gajnita batalo? — Sinjoro — kaj mi sentis, kvazaŭ Dio per mia konscio respondas al mi: „Hans Krock, jes!“

Singultante la grizulo ekhaltis kaj per la maniko de la maldekstra brako forviŝis larmojn el okuloj, dum por mi malaperis ĝardeno kaj princa palaco, kaj mi nur vidis la invalidon, kiu nun subite ŝajnis al mi kiel homo tuta, spite lia lama brako!

„De tiu tempo“, li daŭrigis post paŭzo, „la domo de l' generalo ne plu plaĉis min. Mi sentis, kvazaŭ mi devus eltranĉi el mia vivo, aŭ tiun unuan, aŭ tiun ĉi lastan scenon, por pli longtempe povi restadi ĉe li; — kaj, ĉar ne estis ebla la unu nek la alia, mi, en nomo de Dio, decidiĝis, interŝanĝi mian oficon de ĉambristo kun tiu de invalideco. Mi prefekstis postsuferojn de mia vundo kaj eksigis, kiu mi de tiam fariĝis, vi jen vidas, sinjoro M.



vivas trankvile, ricevas mian ŝalajron kaj povas ankaŭ kelkfoje fari al mi plezuron per la ŝparita mono, kiun la bona virino, kiu nun vivas sufiĉe bone, jam de longe repaĝis!“

„Tion vi ankaŭ faru, brava maljunulo!“ mi diris, „sen uzo de via ŝparita mono!“ kaj volis premi en lian manon arĝentan moneron.

„Kiel rekompencan pro via raporto!“ mi diris, kiam li rifuzis akcepti.

„Via intereso, nobla sinjoro, estas sufiĉe da rekompenco por mi!“ li respondis.

„Nu, do akceptu almenaŭ memoraĵon!“ mi urĝe diris kaj eltiris mian kapon de pipo.

„Kiel soldato, vi do certe ankaŭ fumas!“ — Prenu, brava viro — kaj, ĉiun fojon, kiam vi el ĝi blovos nubeton da fumo, — pripensu, ke gloro ofte estas fumo sen flamo; — sed humaneco estas flamo sen fumo!“

Dankeme li akceptis mian donacon — kaj mi, ĝoja, ĉar mi trovis en la bela ĝardeno ankoraŭ pli belan koron, mi, dum krepuskiĝo rapide aliris al mia hotelo.“

* * *

La rakonto de mia amiko denove firmigis mian konvinkon, ke estas pli kontentige, vojaĝi por konatiĝi kun homoj ol kun pejzaĝoj.



Franz Grillparzer

MALRIĈA MUZIKISTO

Antaŭparolo.

Franz Grillparzer naskiĝis la 15-an de januaro 1791 en Wien, kaj tie mortis la 21-an de januaro 1872. Li estis ŝtata oficisto kaj membro de la Akademio de Sciencoj en Wien. Grillparzer apartenas, kiel dramverkisto, al la granda majstraro de germana poezio, kaj same pro lia aparta, poezia koncepto de temoj, kiel pro la certa konstruo de la dramoj, la bona karakterizo de la personaro kaj la spritecaj tekstoj, kie mankas patoso kaj kiuj tial eikas laŭnature. La plej konataj el liaj dramoj estas: „Medeo“, „De l' maro kaj de l' am' ondaro“, „Sappho“, „De l' reĝo Ottokar feliĉ' kaj fino“, „Ve al mensogulo!“ „Songo estas vivo“, „La judino de Toledo“. Krom dramoj li publikigis nur du novelojn, nome „La monaĥejo ĉe Sendomir“, unue publikigita en la ĵurnalo „Aglaja“ en jaro 1828, kaj kies esperanta traduko, verkita de mi, aperis ĉe „Franck'sche Verlagsbuchhandlung“ en Stuttgart, jam antaŭ kelke da jaroj. Jen la dua novelo „Malriĉa muzikisto“, unue publikigita en la gazeto „Iris“ de Mailáth en jaro 1848. Ĝi estas kortuŝe melankolia rakonto, kiu certe interesos la esperantistaron; ankaŭ ĝia konstruo kaj procedo pravas la klasikan majstron.

M i n c h e n .

L. E. Meier.



La dimanĉo post plenluno en monato julio de ĉiu jaro, kun la sekvanta tago kune, estas en Wien originala popola festo, se iu ajn festo meritas tiun nomon; ĉar popolo mem vizitas ĝin kaj festas ĝin, kaj, kiam pli eminentaj personoj ĝin vizitas, ili nur povas partopreni ĝin kiel membroj de popolo. Tie ne ekzistas apartiĝo; almenaŭ antaŭ kelke da jaroj tia ne estis ebla.

Brigittenaŭ, interligata kun Aŭgarten, Leopoldsstadt kaj Prater per neintermitanta serio da amuzaĵoj, ĉe tiu tago festas sian kirmeson. De la kirmeso de Brigittenaŭ de unu jaro ĝis longe atendita. Nun estiĝas tumulto en la bonanime trankvila urbo. Ondiĝanta popolamaso ado de parolantoj, tiam kaj tiam trafultmata de laŭta ekkrio, trasonadas ilin. La diferenco de socia stato estas malaperinta, burĝo kaj soldato tagojn; la saturna festo, fine aperanta, estas detiu de alia, la labora popolo kalkulas siajn bonajn partoprenas la movadon. La interpremo pliplenigas stratojn, bruado de piedirado, murmur-

multiĝas ĉe la pordegoj de la urbo; diversfoje gajnita kaj ree perdita, eliro fine estas batale atingita, sed la Danuba ponto prezentas novajn malfacilaĵojn. Ankaŭ tie venkinte, fine du riveregoj, nome la pli ŝveliĝanta de l' popolo kaj la maljuna de Danubo, kruciĝantaj supere kaj sube fluas antaŭen, dum Danubo sekvas sian malnovan fluejon, sed la popola riverego, liberigita de ponta mallarĝigo, fariĝas vasten ondiĝanta lago, kies superfluo ĉion kovras. Iu nove alveninta kredeble juĝus tiujn signojn dubaj; sed ili nur anoncas tumulton de ĝojo kaj liberemon de plezuro.

Jam inter urbo kaj ponto korboveturiloj stariĝas por la propraj hierofantoj de tiu solena festo, nome: la infanoj de servemo kaj laboro. Superplenigite, sed tamen galope, tiuj traflugas la amason, kiu seninterspace antaŭ ili malfermiĝas kaj post ili refermiĝas, senzorge kaj sen difektiĝe. Ĉar, en Wien ekzistas silenta interkonsento de veturiloj kaj homoj, laŭ kiu oni ne surveturas iun, eĉ dum plej rapida kurado, nek iu estas surveturata eĉ sen ia antaŭgardo.

La interspaco inter la veturiloj plimalgrandiĝas de sekundo al sekundo. Jam kelkaj kaleŝoj de pli eminentaj personoj intermiksiĝas en la ofte intermitanta veturilaro. La veturiloj ne plu flugas; kaj kvin aŭ ses horojn antaŭ nokto,

fine la unuopaj atomoj de ĉevaloj kaj veturiloj densiĝas, fariĝante kompakta amaso, kiu, mem malhelpanta kaj malhelpata de alveturantoj el flankaj stratoj, evidente malpravigas la malnovan popoldiron: „Plivaloras malbona veturo ol piediro!“ Oscede rigardate, bedaŭrate, mokate la ornamitaj sinjoroj sidas en la ŝajne malmoviĝaj kaleŝoj. Nekutima je daŭra starado, la Holstein'a nigra ĉevalo obstinstariĝas, kvaŭzaŭ ĝi intencus vojiri antaŭen super la antaŭstarantaj kontraŭaj korboveturiloj, kaj la krieganta popolo da virinoj kaj infanoj de la kanajlaraj veturiloj ankaŭ ŝajnas efektive timi tion. La rapide antaŭenfluganta fiakro, unuafoje neante sian naturon, furioze kalkulas la malprofiton de restado de tri horoj sur vojo, kiun li antaŭe traflugis dum kvin minutoj. Disputo, kriado, interŝanĝaj honorofendoj de kondukistoj, kaj, de tempo al tempo frapo de vipo!

Fine — ĉar en tiu ĉi nia mondo ĉiu starado, eĉ plej persista, tamen estas nur senrimarka antaŭeniĝo — ankaŭ en tiu ĉi „status quo“ aperas radio de espero, nome: vidiĝas la unuaj arboj de Aŭgarten kaj Brigittenaŭ. Tero! Tero! Tero! Ĉiuj suferoj estas forgesitaj. La veture alvenintaj eliras el la veturiloj kaj miksiĝas inter la piedirantoj, sonoj de malproksima danca muziko alsonas, al kiuj respondas la ĝojego de

la nove alvenintaj. Kaj tiel nun oni antaŭen-
iras, ĝis kiam fine malfermiĝas la vasta haveno
de plezuro, kaj arbaro kaj herbejo, muziko kaj
danco, vino kaj manĝaĵo, silenta teatro kaj ŝnur-
ekvilibratoj, iluminado kaj fajraĵo unuiĝas far-
iĝante „pays de Cocagne“, „El Dorado“, propra
„Ŝlarafolando“, kiu, bedaŭrinde aŭ feliĉe, mal-
aperas la sekvantan tagon, kiel sonĝo de somera
nokto, kaj restos nur en memoro aŭ eble en
espero!

Nur devigate mi lasas preterpasi la okazon,
ĉeesti tiun feston. Estante amanto de homaro,
precipe de popolo, tiel, ke mi, eĉ kiel drama
poeto, tiufoje preferas la senĝenan babiladon
de superplenigita teatro al la juĝo, kunmetita
de la saĝaĵo de literatura matadoro, kiu, kripla
laŭ korpo kaj animo, ŝveliĝis kiel araneo per
la sango de elsuĉitaj de li aŭtoroj — estante, mi
diras, amanto de homaro, aparte kiam la popol-
amasoj, forgesante por kelke da tempo la apart-
ajn celojn, sentas kiel partoj de la tuto, en kiu
fine ja estas la dieco, eĉ Dio mem — mi sentas,
kvazaŭ ĉiu popola festo estas propra festo de
animoj, pilgrimado, Dioservado! Kiel en grand-
ega disvolvita pergameno de Plutarĥo, mi legas
en ĝojaj kaj sekrete ĉagrenaj vizaĝoj, viglaj aŭ
timemaj paŝadoj, reciproka konduto de famili-
anoj, unuopaj, duone nevolaj diroj, la biografion

de negloraj personoj, kaj, vere! oni ne povos kompreni la glorajn homojn, se oni ne travivis la sentojn de la malgloraj! De la disputo de veturistoj, ekscititaj de vino, pluen ŝpiniĝas nevidebla, sed senintermita fadeno ĝis la malkonsento de diaĵaj filoj, kaj en la juna servistino, kiu duone kontraŭvole sekvas la urĝantan amanton flanken de la amaso da dancantoj, kuŝas la embrioj de Julia, Dido kaj Medea.

Antaŭ du jaroj, mi ankaŭ, kiel kutime, estis aliĝinta la plezuremajn kirmesgastojn kiel piediranto. Jam mi estis superinta la ĉefajn malhelpaĵojn de la migrado kaj alveninta la finon de Aŭgarten, kaj antaŭ mi estis la deziregita Brigittenaŭ. Tie ĉi oni devas lastfoje batali; ĉar mallarĝa digo inter netraireblaj bariloj estas la sola interligo de la du plezuraj lokoj, kies komuna limo estas signita per meze staranta krada pordego. Dum ordinaraj tagoj kaj por ordinaraj promenantoj tiu interliga vojo prezentas superfluan spacon; sed dum kirmesfesto eĉ ĝia kvarobla larĝo tamen estus tro mallarĝa por la senfina amaso, kiu, forte premanta antaŭen kaj trakrucita kontraŭdirekten de revenantoj, nur pro la ĝenerala bonanimeco de la promenantoj tamen fine trovas sufiĉan spacon.

Lasinte min al la antaŭentirado de la amaso, mi estis en mezo de la digo, jam sur

klasika tero, sed, bedaŭrinde, devigata, ĉiam denove ekhalti, evite deflankiĝi kaj atendi. Mi do havis sufiĉan okazon por rigardi tion, kio estis flanke, laŭlonge de l' vojo. Nome: por ke al la plezurema amaso ne manku antaŭsigno de la atendebla feliĉego, unuopaj muzikistoj estis stariĝintaj maldekstre de la altigita diga vojo, kiu, kredeble pro timo de konkurantoj, volis tie, ĉe la „propileoj“, atendi la unuaĵojn de la ankoraŭ ne eluzita donacemo: harpistino kun malplaĉe fiksantaj rigardoj; maljuna invalido kun ligna kruro kaj kiu, per abomena instrumento, kredeble farita de li mem, kaj estante duone cimballo, duone gurdy, evidente volis sentigi al la ĝenerala kompatemo la dolorojn de sia vundo laŭ analoga maniero; lama, malrekte kreskinta knabo, kiu kune kun sia violono formis unuopan ne diskoneblan bulon, kaj kiu, kun la kutima ftiza fortego de sia kripla brusto ludadis senfine rulantajn valsojn. Fine — kaj tiu ĉi altiris mian tutan atenton — maljuna, kredeble sepdekjara viro en fadenmontra, sed ne malpura moltona surtuto, kun ridetanta, sin mem apiaŭdanta mieno. Li staris, kun senkovra, senhara kapo, laŭ kutimo de tiuspecaj personoj, ĉapelon kiel kolektujon antaŭ siaj piedoj, kaj tiel manuzis malnovan, multfoje disfenditan violonon, dum li indikis takton, ne per levo kaj mal-

levo de piedo, sed per akordiĝanta movo de la tuta kurbita korpo. Sed lia tuta klopodo unuecigi sian ludadon, estis vana; ĉar tio kion li ludis, ŝajnis kiel neinterligita sekvo da tonoj, sen takto nek melodio. Per tio, li tute estis ensorbita de sia laboro: liaj lipoj tremadis, liaj okuloj fikse rigardis la notfolieton antaŭ si — jes, vere notiolieto! Dum ĉiuj aliaj muzikistoj, multe pli dankinde ludantaj, fidis siajn memorojn, la maljuna viro havis antaŭ si malgrandan porteblan pupitron meze de la amaso, kun malpuraj disŝiritaj notfolieto, kiu, kredeble, enhavis tion plej bone ordigita, kion li aŭdigis sen interrilato. Ĝuste la nekutimeco de tiu aranĝo estis altirinta al li mian atenton, kaj ankaŭ la gajecon de la preterondiĝanta amaso, kiu ridis pri li kaj lasis lian ĉapelon, metitan por kolekto, malplena, dum la alia orkestro enpoŝis verajn kuprominojn. Por sen malhelpo observi tiun originalon, mi iom interspace estis alpaŝinta la flankan deklivon de la digo. Ludinte ankoraŭ iom da tempo, li ekhaltis, rigardis, kiel rekonsciiĝinte post longa senkonscieco, al firmaĵo, kiu jam komencis montri signojn de vesperiĝo, tiam malsupren al sia malplena ĉapelo, kun tamen ne aliigita gajeco metis ĝin sur kapon, la arĉon inter la kordojn, kaj dirante: „certi sunt denique fines“, ekprenis sian pupitron, kaj

klopode trairis la amason alfluegantan al festo, kontraŭ ĝia direkto, kiel iu, kiu reiras hejmen.

La tuta esteco de la maljuna viro propre estis kiel farita por ekstreme inciti mian antropologian malsaton, nome: la mizera, sed tamen nobla staturo, lia nesuperebla gajeco, tiom da arta fervoro kun tiom da nelerteco, lia reiro hejmen ĝuste tiam, kiam por aliaj liaspeculoj la propra rikolto vere komenciĝis, fine la multaj, sed kun tute ĝusta akcento parolitaj latinaj vortoj! Tiu viro do ĝuis pli zorgeman edukon, alpropriigis al si sciencojn, kaj nun — almozula muzikisto! Mi, vere, tremis pro avido ekscii interrilaton.

Sed jam densa homara remparo estis inter mi kaj li. Malgranda, kaj ĉiuflanke malhelpata, pro pupitro en mano, li estis ŝovata de unu al alia, kaj jam li estis atinginta la enirejan kradon, dum mi ankoraŭ bataladis kontraŭ la alfluantan amason, meze de la digo. Tiel mi perdis lin; kaj kiam mi fine mem alvenis trankvilan liberan lokon, mi nenie ĉirkaŭe povis revidi mian muzikiston.

La malprosperinta aventuro malplaĉigis al mi la popolan feston. Trairinte la Aŭgarten ĉiudirekten, mi fine decidis reiri hejmen.

Alveninte proksimen ĉe la malgranda pordo, kiu elirigas de Aŭgarten al la Tabor-strato,

subite mi reaŭdis la konatan sonon de la malnova violono. Mi duobligis la paŝojn, kaj jen: la objekto de mia scivoleco staras en rondo de kelkaj knaboj, kiuj senpacience postulis, ke li ludu valson. „Ludu valson!“ ili kriis; „valson! Ĉu vi ne aŭdas?“ La maljunulo daŭrigis ludi, ŝajne ne atentante ilin, ĝis kiam la malgranda aŭskultantaro insulte kaj moke forlasis lin, kolektiĝante ĉirkaŭ iu gurdisto kiu estis stariginta sian gurdon proksime.

„Ili ne volas danci!“ la maljunulo diris kiel malĝojigite, dum li kolektis sian muzikilaron. Mi estis alpaŝinta lin tute proksime. „La infanoj do ne konas alian dancon, ol valson!“ mi diris. „Mi ludis valson!“ li respondis, montrante per arĉo la lokon de la ĵus ludita muzikaĵo.

„Oni devas ankaŭ kunportadi tiun specajon — pro la popolamaso; sed, infanoj ne havas orelon“ (t. e. „ne komprenas muzikon.“ L. t.) — „Permesu, ke mi almenaŭ rebonigu ilian sendankecon!“ mi diris, eltirante arĝentan moneron el poŝo kaj prezentante ĝin al li.

„Pardonu!“ ekkriis la maljunulo, timeme rifuzante per gesto. „En ĉapelon, en ĉapelon!“ — Mi metis la moneron en la ĉapelon, el kiu li senprokraste elprenis kaj tute kontentigite enpoŝigis ĝin. „Jen do reiro hejmen kun riĉa profito!“ li ridete aprobante diris. — „Ĝuste per

tio vi memorigas min pri cirkonstanco, kiu jam antaŭe incitis mian scivolon“, mi diris. „Via hodiaŭa enspezo ne ŝajnas esti tre bona, sed tamen vi foriris en momento, kiam la propra rikolto komenciĝis. La festo daŭras, vi bone scias, dum la tuta nokto, kaj dum tiu vi facile povus gajni pli da mono, ol dum ok ordinaraĵ tagoj! Kiel tion klarigi al mi?“

„Kiel tion klarigi al vi?“ respondis la maljunulo. „Pardonu! Mi ne scias, kiu vi estas; sed vi certe estas bonfarema sinjoro kaj amiko de muziko!“ Kun tio, li eltiris la moneron ankoraŭ unu fojon el poŝo kaj, inter liaj levitaj manoj premis ĝin kontraŭ bruston. „Tial mi nun diros al vi la kaŭzojn, kvankam oni ofte ridis min pro ili. Unue: mi neniam estis nokto-plezurema, kaj mi ankaŭ pensas, ke ne estas bone, inciti aliajn al tia nedeca faro per ludo aŭ kanto; due: homo devas ĉiuokaze fiksi por si certan ordon, alie li fariĝos sovaĝa kaj nehaltiĝema. Fine, trie: sinjoro — mi ludas dum tuta tago por la bruanta popolo, kaj apenaŭ gajnas per tio malriĉan profiton; sed la vesperoj estas por mi kaj mia arto! Vespere mi restadas hejme, kaj —“ dume lia parolo fariĝis pli kaj pli mallaŭta; li ekruĝiĝis kaj rigardis malsupren — „tiam mi ja ludas laŭ imago, sen notoj! „Fantazio“, mi kredas, nomas tion muzikaj libroj.“

Ni ambaŭ silentis; li, pro honto pri la malkaŝita sekreto de sia intimeco; mi, pro mirego, ĉar mi aŭdis paroli pri la plej alta grado de la arto viron, kiu ne estas kapabla, kompreneble reprezenti plej simplan valson! Dume li pretigis sin por foriro.

„Kie vi loĝadas?“ mi demandis. „Mi do deziras iam ĉeesti viajn ekzercadojn!“ — „Ho“, li preskaŭ petegante respondis, „vi eble scias, ke preĝo estu farata en kamereto!“ — „Mi tamen vizitos vin iufoje dum tago!“ mi diris. — „Dum tago“, li respondis, „mi serĉas mian porvivon ĉe popolo.“ — „Matene do!“ — „Vere, ŝajnas preskaŭ“, la maljunulo ridetante diris, „kvazaŭ vi, estimata sinjoro, „estas la donacito, kaj mi, se vi permesas diri, la bonfaranto; ĉar vi estas tiel afabla, kaj mi tiel malafable rifuzanta! Via eminenta vizito ĉiam estos por mi honoro en loĝejo; nur mi petas, ke vi grandanime favoru min per antaŭsciigo, por ke vi ne estu iel ĝenota per nedecaĵo, nek mi devigota, eble intermitigi jam komencitan aferon. Nome, miaj matenoj ankaŭ havas siajn destinojn. Ĉiuokaze mi sentas la devon, prezenti al miaj favorantoj kaj bonfarantoj ne tute senvaloran interŝanĝan donon; ĉar mi ne volas esti almozulo, sinjoro! Mi bone scias, ke la ceteraj publikaj muzikistoj kontentiĝas per daŭra ludado de kelkaj parkere

lernitaj trivialaĵoj, kiel germanaj valsoj, eĉ ankaŭ melodioj de nedecaj kantoj, kiujn ili ĉiam denove ripetas; ĉar, oni donas al ili monon, por ke ili ĉesu, aŭ pro la rememoro de ĝuitaj festenoj aŭ aliaj nedecaj plezuroj. Tial ili ankaŭ ludas parkere, kaj tiam kaj tiam, eĉ ofte, tuŝas falsajn kordojn! Sed trompo estu for de mi! Pro tio, parte ĉar mia memoro entute ne estas tre bona, parte ĉar estas do malfacile por iu ajn, precize reteni en memoro komplikajn kunmetaĵojn de estimindaj komponiciistoj, mi mem nete skribis tiujn ĉi kajerojn!“ Nun li, trafoliante, montris muziklibron, en kiu mi, ekfrapite, vidis malfacilajn muzikaĵojn de malnovaj gloraj majstroj, tute nigraj pro „pasaĝoj“ kaj „duoblaj tuŝoj“, skribitaj per zorgema, sed malplaĉa rigida skribo! Kaj tiajn pecojn la maljunulo ludas per siaj nelertaj fingroj! „Dum mi ludis tiujn ĉi pecojn“, li daŭrigis paroli, „mi atestas mian estimegon por delonge mortintaj majstroj, estimitaj laŭ stato kaj indoj, kontentigas min mem kaj ĝuas la agrablan esperon, ke la donaco, favore donita al mi, ne restos sen rekompenco, nome plibonigo de gusto kaj koro de la, vere, de multaj flankoj distrita kaj erarigita aŭskultantaro! Sed, ĉar — por resti ĉe la temo de mia diro“ — kaj nun memplaĉa rideto kovris liajn trajtojn — „ĉar tia afero devas esti

ekzercata, mi destinis miajn matenajn horojn, senescepte, al tiu ekzercado. Doni la tri unuajn horojn de tago al ekzercado, ĝian mezon al perlaboro de porvivo, kaj la vesperon al mi kaj al bona Dio — tio ne estas malhonesto divido“. li diris, kaj kun tio liaj okuloj brilis kiel malsekaj; sed li ridetis.

„Bone“, mi diris; „mi do iam matene surprizos vin. Kie vi loĝas?“ — Li nomis „Gärtnerstraße“. — „Kia domnumero?“ — „Numero 34 en la unua etaĝo.“ — „Vere“, mi diris, en etaĝo de nobeluloj?“ — „La domo“, li respondis, „verdire, nur havas teretaĝon; sed supre, apud la subtegmenta kamero, estas ankoraŭ malgranda ĉambro, „kie mi loĝas kun du metiistaj submajstroj.“ — „Ĉu unu ĉambro por tri?“ — „Ĝi estas dividita, kaj mi havas mian propran liton!“

„Malfruiĝas“, mi diris, „kaj vi volas iri hejmen. Ĝis revido do!“ Kun tio mi metis manon en poŝon, por eble duobligi la antaŭe donitan, do tro malgrandan, donacon. Sed li, tenante per unu mano la pupitron, per la alia sian violonon, rapide ekkriis: „Tion mi tre humile devas malpermesi! La honorarion por mia ludo mi jam ricevis, kaj alian perlaboron mi momente ne povas memori!“ Tion dirinte, li, per varianto de nobla gracio, faris al mi sufiĉe helertan riverencon kaj foriris laŭ povo de siaj maljunaj kruroj.



Laŭ jama diro, mi estis perdinta emon, pli-
longe ĉeesti la popolan feston dum tiu ĉi tago,
tial mi direktiĝis hejmen sur la vojo al Leo-
poldstadt, kaj fine, elĉerpante pro polvo kaj
varmego, eniris iun el la multaj tie troveblaj
gastejaj ĝardenoj, kiuj, dum ordinaraĵoj tagoj
troplenigitaj, hodiaŭ estis transdonintaj sian
ĉioman gastaron al Brigittenau. La kvieteco
de la loko, kontrastante de la bruiganta popol-
amaso, komfortigis min, kaj, dum mi donis min
al diversaj pensoj, kiuj ne plejmal multe kon-
cernis la maljunan muzikiston, jam tute estis
noktiĝinte. Mi fine decidis iri hejmen, metis
la pagon de mia kalkulo sur tablon kaj alpaŝis
la urbon.

La maljuna viro diris, ke li loĝas en „Gärt-
nerstraße“. „Ĉu estas ĉirkaŭ tie ĉi iu strato
nomata ‚Gärtnerstraße‘?“ mi demandis mal-
grandan knabon, kiu ĵus transkuris la straton.
„Tie, sinjoro!“ li respondis, montrante diametre
disflankiĝantan straton, kiu de la domamaso de
l' antaŭurbo direktiĝis kontraŭ kampojn. Mi
sekvis la montritan direkton. La strato kon-
sistis el dissemitaj unuopaj domoj, kiuj lok-
itaj inter grandaj kuirejaj ĝardenoj, evidente
klarigis la okupadon de la loĝantaro kaj la de-
venon de la nomo „Gärtnerstraße“ (strato de
ĝardenistoj). En kiu el tiu mizeraj dometoj eble

loĝas mia originalulo? Mi, malfeliĉe, forgesis la domnumeron, nek mi povis esperi ekkoni iun signon, pro la mallumo. Jen, iu viro, peze ŝargita de legomoj, alvenis kontraŭ min kaj preterpasis. „La maljunulo ree gratadas“, li murmuris, „ĝenante la noktanojn de la najbaroj!“ Samtempe, dum mia iro antaŭen, la mallaŭta longdaŭra sono de violono trafis mian orelon, ŝajne sonanta el malfermita subtegmenta fenestro, de iu sufiĉe proksima mizera dometo, kiu, malalta kaj sen superetaĝo, kian havis la aliaj domoj, distingiĝis inter tiuj ĉi precipe pro frontona fenestro en la rando de l' tegmento. Mi ekhaltis. Mallaŭta, sed certe tuŝita tono ŝveliĝis ĝis fortegiĝo, malplilaŭtiĝis kaj tuj ree ŝveliĝis ĝis laŭtega kriado — daŭre de sama tono, ripetata kun speco de ĝuanta restado sur ĝi. Fine fariĝis tona interspaco, nome kvarto. La ludanto, antaŭe ĝuinte la sonon de unuopa tono, nun kvazaŭ volupte ĝuadis tiun harmonian interspacon kun multe pli sentebla energio. Laŭsalte tuŝitaj, samtempe strekitaj, la du tonoj de tiu kvarto kuniĝis per la tre malglate ludita serio de la intertonoj, kun signita tercio kaj ripetito; tiam aliĝis al ili la kvinto. Ĉio nun estis ludata, tiam kun tremanta sonado, kiel kvietaj plorado, daŭre tenata kaj forsonanta, tiam ripetata kun furioza rapideco — daŭre ripetata

— ĉiam la samaj tonoj, la sama interspaco! —
Kaj tion ĉi la maljunulo nomis „fantazio!“ —
Verdire — fundamente tio estis fantazio; sed
nur por la ludanto, nepre ne ankaŭ por la aŭs-
kultanto!

Mi ne memoras la daŭron kaj plilaŭtiĝon de
tiu ludado; sed iufoje subite la pordo de l' domo
malfermiĝis, viro, vestita nur per ĉemizo kaj
malzorgeme butonitaj kalsonoj, elpaŝis trans
sojlo ĝis mezo de l' strato kaj kriis supren al
la frontona fenestro: „Ĉu do tio hodiaŭ ne fine
ĉesos?“ — La sono de tiu voĉo, kvankam ne-
bonhumora, tamen ne estis sensentema aŭ
ofenda. La violono eksilentis antaŭ ol tiuj vortoj
estis parolitaj. La viro reiris en domon, la
frontona fenestro fermiĝis, kaj baldaŭ estis ĉir-
kaŭ mi morta silentado, de nenio intermitigata.
Pene trovante ĝustan revojon el tiuj nekonataj
stratoj, mi reiris hejmen. Mi ankaŭ fantaziis,
sed ne ĝenante iun ajn, por mi mem, nur interne.

Matenaj horoj de ĉiam havas apartan va-
loron por mi; mi kvazaŭ sentas la bezonon, per
iu edifa, grava okupiĝo dum la unuaj horoj de
tago sanktigi ĝian reston por mi. Tial mi nur
malfacile povas decidi forlason de mia ĉambro
frumatene, kaj, se tamen mi devigas min per
negrava kaŭzo, mi, dum la resto de tiu tago
sentas aŭ senpensan distrecon aŭ memtur-

mentan melankolion. Tial mi ankaŭ, dum kelke da tagoj prokrastis la viziton ĉe la maljunulo, ĉar ĝi devis, laŭ promeso, esti farota dum matenaj horoj. Fine, senpacienco superis min, kaj mi eliris. Ankaŭ tiun ĉi fojon mi povis aŭdi la sonojn de la violono, sed apenaŭ kompreneblaj, pro la fermita fenestro. Ĝardenista edzino, duone senparola pro mirego, montris supren al subtegmenta ŝtuparo. Alveninta antaŭ malalta kaj duoble fermebla pordo, mi ekfrapis, ne ricevis respondon, fine premis la anson kaj eniris. Jen mi en preskaŭ spaca, sed por la resto tre mizera kamero, kies muroj ĉiuflanke estis laŭ la konturoj de la pintiĝe leviĝanta tegmento. Seninterspace apud la pordo estis malpura, malplaĉe senorda lito, ĉirkaŭita de ĉiuj akcesoraĵoj de senordeco; kontraŭ mi, seninterspace apud la mallarĝa fenestro, estis alia kuŝejo, mizera, sed pura kaj tre zorgeme ordigita kaj kovrita. Ĉe la fenestro estis malgranda tableto kun notopaperoj kaj skribilaro, en la fenestro kelkaj florpotoj. La mezo de la ĉambro, de muro al muro, estis signita, sur la planko, per dika kreta streko, kaj oni apenaŭ povos imagi pli akran kontraston de malpureco kaj malpureco ol tiun, kiu estis inter tiu ĉi flanko kaj transe de la streko, ekvatoro de miniatura mondo.

Seninterspace apud la ekvatoro, la maljuna

viro estis metinta sian pupitron kaj, tute kaj zorgeme vestita, staris, ludante violonon, antaŭ ĝi. Mi jam tiom, preskaŭ naŭzige, rakontis pri la malbonsonoj de mia — kaj mi timas, ke li ankaŭ estis nur mia — karulo, ke mi volas indulgi la leganton per nepriskribo de tiu infera koncerto. Ĉar lia ekzercaĵo plejparte estis nur pasaĝoj; ekkono de la ludataj pecoj tute ne estis ebla; kvankam kredeble ĝi alie ankaŭ ne estus ebla. Post kelke da aŭskultado fine mi ek-trovis la fadenon de tiu ĉi labirinto, kvazaŭ la inetodon de tiu frenezeco: La maljunulo ĝuadis dum sia ludo; sed lia percepto diferencigis nur du sentojn, nome bonsono kaj malbonsono; tiu ĝojigis, eĉ ĝojegigis lin, dum li plejeble evitis tiun ĉi, eĉ kvankam ĝi, cetere, estis ankaŭ harmonie kaŭzita. Tial, anstataŭ ol, en muzikaĵo, akcenti laŭ senco kaj ritmo, li akcentis, kaj plilongigis tiujn notojn kaj interspacojn, kiuj bonsonis al orelo, eĉ senĝene ripetis ilin laŭ plaĉo, kaj tiukaze lia vizaĝo efektive vidigis la esprimon de raveco. Ĉar li, kontraŭe, plej eble rapide forludis malbonsonaĵojn, kaj multe tro malrapide ludis la tro malfacilajn pasaĝojn el kiuj li, cetere, ne forlasis eĉ unu noton, oni, kredeble, povos imagi la konfuzon kiu rezultis de tio! — Fine mi mem ne povis plu toleri ĝin; tial, por ekveki lin el lia spirita forestado, mi

lasis defali mian ĉapelon, post kiam mi jam vane provis diversajn aliajn rimedojn. La maljuna viro ekskuiĝis, liaj genuoj tremis, kaj apenaŭ li povis teni la malsuprenigitan violonon. Mi alpaŝis lin. „Ho, ĉu estas vi, via sinjora moŝto?“ li diris kvazaŭ nur nun rekonsciiĝante. „Mi ne fidis la plenumon de via estimegata promeso!“ Li devigis min sidiĝi, ordigis, metis tion kaj tion, kelkajn fojojn rigardis ĉirkaŭen en la ĉambro, tiam subite ekprenis teleron, kiu estis sur tablo apud la pordo, kaj eliris kun ĝi. Mi aŭdis, ke li ekstere parolis al la ĝardenista edzino. Baldaŭ poste li embarasite reeniris, kaŝante la teleron post dorso kaj sekrete remetante ĝin. Evidente li postulis fruktojn por regali min, sed ne ricevis. „Vi loĝas tie ĉi tre bele!“ mi diris por senembarasigi lin. „Malordo estas malpermesata; ĝi retiriĝas tra pordo, kvankam ĉimomente ĝi ankoraŭ ne tute transiris sojlon.“ — „Mia loĝejo etendiĝas ĝis tiu ĉi streko“, diris la maljunulo, montrante la kretan linion meze de l' ĉambro; „jen, transe, loĝadas du metiistaj submajstroj.“ — „Kaj — ĉu ili respektas vian signon?“ — „Ili ne respektas, sed mi!“ li respondis. „Nur la pordo estas komuna.“ — „Ĉu viaj najbaroj ne ĝenas vin?“ — „Apenaŭ“, li diris; „ili revenas hejmen malfrue dum nokto, kaj, kvankam ili tiam iom

ekvekas min en lito, la ĝojo de reekdormo estas des pli granda. Sed matene mi vokas ilin, kiam mi ordigas mian ĉambron. Ili do tiam iom insultas kaj poste foriras!“

Dume, mi estis observinta lin. Li estis tre pure vestita; lia staturado sufiĉe bona, kompare de lia aĝo; nur liaj kruroj iom tro mallongaj, sed piedoj kaj manoj estis frapante delikataj. — „Vi min rigardas“, li diris, „kaj kredeble meditas?“ — „Ĉar mi estas avida ekscii vian historion“, mi respondis. — „Ĉu historion?“ li rediris. „Mi ne havas historion. Hodiaŭ, kiel hieraŭ, kaj morgaŭ kiel hodiaŭ. Postmorgaŭ tamen kaj pluen — kiu scias? Sed, Dio zorgos, li scias!“ — „Via nuna vivo do kredeble estas tre unuforma!“ mi daŭrigis parolon; „sed viaj antaŭaj sortoj — — kiel okazis —“ — „Ke mi fariĝis unu el muzikistoj?“ li intermitis dum mia nevola paŭzo. Mi nun rakontis al li, ke li frapis min ĉe la unua vido, ĉar la latinaj vortoj, kiujn li parolis, impresis min. „Ĉu latinajn?“ li diris. „Latine! Tion ĉi, vere mi lernis, aŭ — ĝuste dirote — devis lerni. Loqueris latine?“ li demandis, turnante sin al mi. „Sed mi ne povus daŭrigi parolon, pasis tro longa tempo de tiam. Tion vi kredeble nomas mia historio? Ĉu? Kiel okazis? — Jes, vere! Okazis ĉiuspecaĵoj; nenio aparta, sed tamen ĉiuspecaĵoj. Vere, mi

mem deziras iufoje rerakonti ĝin al mi! Ĉu eble mi ĝin forĝesis? — Ni havas tempon; estas ankoraŭ frua mateno“, li daŭrigis, enmetinte fingrojn en veŝtopoŝon, en kiu tamen li ne havis horloĝon. — Mi eltiris mian, estis apenaŭ la naŭa horo. — „Ni havas tempon, kaj mi preskaŭ sentas inklinon, iom babiladi.“ Dum tiuj lastaj paroloj li evidente fariĝis pli senĝena. Lia staturaro plilongiĝis. Sen tro da ĝeno li ekprenis la ĉapelon el mia mano kaj metis ĝin sur la liton. Tiam li sidiĝis, metis unu kruron sur l' alian kaj entute alprenis la situacion de rakontonto.

„Sendube“, li komencis, „vi jam aŭdis paroli pri la kortega konsilisto **?“ Li nomis la nomon de ŝtata oficisto, kiu, dum la duono de la pasinta jarcento, kvankam havante la modestan titolon de oficejestro, efikis kolosan, preskaŭ laŭministran influon. Mi jesigis mian konon de tiu viro. „Li estas mia patro“, li diris. — Ĉu lia patro? Patro de la maljuna muzikisto, almozulo? Tiu influinta, potenca viro — lia patro? — La maljunulo ne ŝajnis rimarki mian miregon, sed, evidente amuzite, daŭrigis sian rakonton. „Mi estis la meza el tri fratoj; du el ili atingis altajn ŝtatajn oficojn, sed estas de longtempe mortintaj; nur mi sola vivas ankoraŭ“, li diris, kaj kun tio ŝiretis ĉe siaj fadenmontraĵoj pantalonoj, deprenante de ili kelkajn plumetojn, kun

malevitaj okuloj. „Mia patro estis ambicia kaj kolerema. Miaj fratoj kontentigis lin; sed mi estis nomata malrapida kapo; kaj mi estis malrapidema. Se mi ĝuste memoras“, li diris, kiel por forvidi malproksimen apogante kapon sur subtenanta maldekstra mano — „se mi ĝuste memoras, mi bone povis lerni ĉiuspecaĵojn, se oni lasis al mi tempon kaj ordon. Miaj fratoj ĉirkaŭsaltis inter instruaj objektoj, kiel ĉamoj de montpinto al montpinto; sed mi tute ne povis lasi ion post mi; se iu ajn vorto mankis al mi, mi devis denove komenci. Oni ĉiam urĝe admonis min, novaĵoj okupu la lokon kiun malnovaĵoj ne ankraŭ forlasis, kaj mi obstiniĝis. Tiamaniere oni, vere, malamigis al mi la muzikon, kiu nun estas efektive la ĝojo kaj samtempe la subteno de mia vivo. Se, vespere, dum krepusko, mi ekprenis la violonon por, laŭ mia maniero, amuzi min sen notoj, oni forprenis la instrumenton, dirante, ke per tio mi ne lernos teknikon, plendis pro orelturmento kaj memorigis al mi la lecionon, kiu estis por mi turmento. Dum mia vivado mi neniam ion malamis tiom, kiom tiutempe mi malamis violonon!

Mia patro, treege malkontenta, ofte insultis min kaj minacis, lernigi min iun metion. Mi ne riskis konfesi, ke mi per tio fariĝus vere

feliĉa; mi tre deziris fariĝi tornisto aŭ kompostisto. Sed li tamen ne permesus, pro fiereco. Fine, publika lerneja ekzameno, ĉe kiu mia patro, laŭ peto, ĉeestis, decidis pri mi. Malhoneste instruisto antaŭe destinis tion, kion li demandos min, kaj tial la afero fariĝis tre bone. Sed fine — mi devis parkere diri kelke da versoj de Horatius — mi mankiĝis unu vorton. Mia instruisto balancante kapon kaj alridetante mian patron, aŭskultis, helpis mian prokraston kaj mallaŭte diris la vorton al mia orelo. Sed mi, serĉante la vorton en mia interno kaj laŭ ĝia interrilato kun la ceteraj, ne aŭdis. Vane li kelkajn fojojn ĝin ripetis. Fine, mia patro senpacienciĝis. “Cachinum!” (jen la vorto!) li tondre alkriis min. Nun la afero estis decidita! Sciante la unu vorton, mi tamen nun estis forgesinta la ceterajn kaj ĉiu klopodo, helpi min, estis vana. Mi devis ekstariĝi kun honto, kaj kiam mi, laŭ kutimo, aliris mian patron, por kisi lian manon, li repuŝis min, faris mallongan riverencon al la societo, kaj foriris. „Ce gueux!“ (tiu ĉi almozulo!) li insultis min; mi tiam ne estis almozulo, sed estas nun! Gepatroj parolante profetas! — Cetere, mia patro estis bona viro, nur kolerema kaj ambicia.

De tiu tago li ne parolis plu vorton al mi. Liaj ordonoj estis transdonataj al mi per dom-

anoj. Tiel oni, tuj morgaŭ, anoncis al mi, ke mia studado ĉesis. Mi forte ektimiĝis, ĉar mi sciis, ke mia patro certe forte ĉagrenas. Dum la tuta tago mi nur ploradis kaj intermite deklamis tiujn latinajn versojn, kiujn mi nun sciis tre precize, kune kun la antaŭaj kaj postaj. Mi promesis, anstataŭigi mankon da talentoj per diligento — sed mia patro neniam nuligis iun faritan decidon.

Dum iom da tempo mi nun restis senokupita en domo. Fine, oni prove donis al mi oficon ĉe kalkula oficistaro. Sed, kalkulo neniam estis mia forto. La proponon, fariĝi militisto, mi kun teruro rifuzis. Ankaŭ hodiaŭ mi ne povas vidi militistan uniformon sen ekstremo. Protekti karajn parencojn, eble ankaŭ kun vivdanĝero, estas, vere, bona kaj komprenebla; sed sangigo kaj kripligo kiel stato, profesio — ne, ne, ne!“ Kaj dirante tion, li frotis ambaŭ brakojn per manoj kvazaŭ li sentas proprajn kaj fremdajn vundojn.

„Nun oni donis min en oficejon inter kopiistoj. Tiu estis situacio taŭga por mi. Mi ĉiam sentis plezuron en skribado, kaj ankaŭ hodiaŭe mi ne scias pli agrablan amuzadon por mi, ol kunmeton de delikataj kaj fortikaj strekoj por formi vortojn aŭ eĉ nur literojn. Muziknotoj, vere, estas treege belaj; sed tiutempe mi ne pensis ankoraŭ muzikon.

Mi estis diligenta, sed tro precizema. Iu malĝusta interpunkcio, nelegebla aŭ forgesita vorto de l' malneto, kvankam tiu estis facile anstataŭigebla laŭ senco, kaŭzis al mi maltrankvilajn horojn. Dubante, ĉu mi akurate skribu la originalon, aŭ almetu proprajn vortojn de mi mem, mi pasigis tempon kun maltrankvilo kaj estis juĝata kiel maldiligenta, dum mi, kontraŭe, turmentiĝe laboradis kiel neniu alia. Tiamaniere mi pasigis kelke da jaroj, kaj, verdire, sen iu salajro; ĉar, kiam estis mia vico, ricevi oficon, mia patro voĉdonis por alia, kaj la ceteraj personoj voĉdonis kiel li, pro respekto.

Ĉirkaŭ tiu tempo — vidu do!“ li intermitis, „estas tamen historio! Mi rakontu tiun historion! — Ĉirkaŭ tiu tempo okazis du aventuroj, la plej malĝojiga kaj la plej ĝojiga de mia vivo; nome mia forigo el la patra domo, kaj la reveno al la dolĉa muzika arto, mia violono, kiu restis fidela por mi ĝis la hodiaŭa tago!

Mi vivis en la domo de mia patro, ne atentata de la domanoj, en malantaŭa ĉambreto, kiu havis perspektivon en najbaran korton. Komence mi manĝadis ĉe la familia tablo, kie neniu parolis eĉ unu vorton al mi. Sed, kiam miaj fratoj ricevis oficojn ekster la urbo, kaj mia patro preskaŭ ĉiutage estis invitata kiel gasto — la patrino estis jam mortinta antaŭ longa tempo —

oni pensis, ke estas maloportune, kuiradi por mi sola. Tial la servistoj ricevis manĝopagon; mi ankaŭ, sed oni ne donis ĝin en miajn manojn, sed pagis ĝin ĉiumonate al la koncerna restoracio. Pro tio mi nur malmulte da tempo pasigis en mia ĉambro, ĉar mia patro ordonis, ke mi revenu plej malfrue duonhoron post fermiĝo de l' oficejo. Jen mi do sidadis dum krepusko kaj, verdire, sen lumo, pro miaj okuloj, kiuj, jam tiutempe, estis malsanetaĵoj. Mi meditadis tion kaj sentis nek malĝoje nek ĝoje.

Dum mia tia sidado, mi iufoje ekaŭdis, ke en la najbara korto oni kantis kanteton; propre dirite: diversajn kantetojn, sed el kiuj unu precipe plaĉis min. Ĝi estis tiel simpla kaj kortuŝanta, havante akcenton ĉe propra loko, tiel ke oni tute ne bezonis aŭdi tekston. Cetere, mi vere kredas, ke paroloj malbonigas, difektas muzikon!“ Nun li malfermis la buŝon kaj aŭdigis kelke da raŭkaj tonoj. „Mi nature ne havas kantovoĉon“, li diris, ekprenante la violonon. Li ekludis, kaj, tiun ĉi fojon, vere, kun ĝusta esprimo, la melodion de komforta, cetere tute ne distingita kanteto, dum kio liaj fingroj tremadis sur la kordoj kaj fine unuopaj larmoj defluis sur liaj vangoj.

„Tiu ĉi estas la citita kanteto“, li diris, remetante la violonon. „Mi ĉiufoje reaŭdas ĝin

kun nova plezuro. Kvankam mi tre bone memoris ĝin, mi tamen ne prosperis, iam ĝuste kanti eĉ du tonojn el ĝi. Pro multa aŭskultado mi preskaŭ senpacienciĝis. Jen, mi ekvidis mian violonon, kiu, de mia juneco, pendadis neuzate ĉe muro, kiel malnova trofeo. Mi ĝin ekprenis kaj trovis, ke ĝi estas ĝuste agordita; eble la servisto, dum mia foresto, uzis ĝin. Kiam mi nur tuŝis la kordojn per la arĉo, sinjoro, mi, vere, eksentis, kvazaŭ fingro de Dio estas tuŝinta min! La sonoj interniĝis en min kaj reelsonis el mia interno. La aero ĉirkaŭ mi estis kiel plenigita de ebrieco. La kanto malsupre en korto, kaj la sonoj, faritaj per miaj fingroj, ĉe mia orelo, estis miaj kunuloj en soleco. Genufleksante mi laŭtvoĉe preĝis, nek povis kompreni, kial mi iam tiom malmulte ŝatis, eĉ malŝatis, tiun dolĉan diecaĵon, dum mia infanaĝo! Kisante la violonon kaj premante ĝin al mia koro, mi alterne ludadis kun la kanto.

La kanto en korto — estis virina persono, kies kanto dume daŭris senĉese; sed ludante imiti ĝin, ne facile prosperis.

Precipe mi ne posedis la kanteton skribitan; ankaŭ mi bone konvinkiĝis esti forgesinta la malmulton, kiun mi iam sciis da violona ludarto. Tial mi ne povis ludi tion aŭ tion, sed nur ludi entute. Tamen, la unuopa peco de mu-

ziko ĉiam estis kaj ankoraŭ hodiaŭe estas por mi senvalora. Oni ludas Wolfgang Amadeus Mozart'on kaj Johann Sebastian Bach'on, sed ne niu ludas bonan Dion! Nome: la eternan bonfaraĵon kaj favoraĵon de la sono, ĝian miregindan akordiĝon kun la soife sopiranta orelo, per kiu“ — li nun mallaŭte, kaj honte ruĝiĝinte daŭrigis parolon — „la tria sono akordiĝas kun la unua, same la kvina, la ‚nota sensibilis‘ supren leviĝas kiel plenumita espero, dum la malakordo estas mallezata kiel konscia maliceco aŭ aroganta fiereco; la miregindaĵoj de interligo kaj renverso, per kiuj ankaŭ la sekundo estas favorata en la tuto de bonsonado! — Iu muzikisto klarigis ĉion al mi, kvankam multe pli poste, kaj ankaŭ — sed tion mi ne komprenas — la ‚fuga‘ kaj ‚punctum contra punctum‘ kaj ‚canon a duo, a tre‘ kaj aliaj — tuta ĉieleca konstruaĵo, unu intertuŝante kun alia, interligata senmorteco, kaj tenita de Dia mano! Tio nenium interesas, escepte malmultajn homojn! Kontraŭe: oni distradas tiun en- kaj elspiradon de animoj per aldono de eble paroleblaj vortoj, kiel la infanoj de Dio interligiĝis kun la filinoj de tero, por ke la ludado bone tuŝu krudajn animojn! — Sinjoro“, li fine diris, „parolo estas necesa por homo kiel manĝaĵo; sed oni do ankaŭ konservu dura la trinkaĵon, kiu devenas de Dio!“

Preskaŭ mi ne reekkonis tiun viron, pro lia nuna vigleco. Li iom paŭzis. „Kie do mi intermitigis mian historion?“ li fine demandis. „Vere do! Ĉe la kanto kaj mia provo, ludante imiti ĝin! Sed mi ne prosperis. Mi alpaŝis la fenestron, por pli bone aŭskulti. Jen la kantantino ĵus transpaŝis la korton. Mi vidis ŝin nur dorse, sed tamen ŝi ŝajnis konata al mi. Ŝi portis korbon, en kiu, ŝajne, estis nebakitaj kukoj. Ŝi enpaŝis en pordeton, en angulo de l' korto, kie eble estas bakforno; ĉar mi aŭdis, ke ŝi manuzis lignajn ilojn kaj daŭre kantis; la voĉo nun sonis pli surde, nun pli klare, kiel de iu, kiu, klinante sin, kantas en kavaĵon kaj tiam reekstariĝas kaj sin tenas rekte. Post iom da tempo ŝi revenis, kaj nur nun mi rimarkis, kial ŝi ŝajnis konata. Efektive mi konis ŝin de pli longa tempo, nome de la oficejo!

La afero estas jena: la oficaj horoj komencis matene kaj daŭris pli longtempe ol ĝis tagmezo. Kelkaj oficistoj, kiuj aŭ efektive estis malsataj, aŭ almenaŭ volis pasigi duonan horon per manĝo, kutime manĝis malmulton ĉirkaŭ la dekunua horo. La komercistoj, sciante uzi ĉion por sia profito, ŝparis vojon al la frandemuloj per alporto de siaj komercaĵoj al la oficeja domo, kie ili stariĝis sur ŝtuparo kaj en koridoro. Panfaristo vendis blankan panon, fruktovendist-

ino ĉerizojn. Antaŭ ĉio, tamen, estis amataj certaj kukoj, kiujn la filino de najbara butik-havanto faris mem kaj ankaŭ alportis ankoraŭ varmaj. Ŝiaj klientoj eliris al ŝi en koridoron; kaj nur malofte ŝi, alvokita, envenis la ofican ĉambron, kie tiam la iom malbonhumora oficej-estro, tuj kiam li rimarkis ŝin, ĉiufoje ordonis ke ŝi reeliru tra pordo; tiun ĉi ordonon ŝi nur obeis kun kolero kaj murmurante kelkajn malbonhumorajn parolojn.

Tiu knabino ne estis juĝata bela de miaj kolegoj. Ili diris, ke ŝi estas tro malgranda kaj ŝia hararo havas nedifineblan koloron. Kvan-kam ili interdisputis, ĉu ŝi havas okulojn kiel kato, ili tamen ĉiuj interkonsente konstatis, ke ŝia vizaĝo havas variolajn cikatrojn. Sed ĉiuj laŭde parolis pri ŝia fortika staturo, kaj unu el ili sciis multe rakonti pri iu vangofrapo, kies postsignojn li ankoraŭ sentis post ok tagoj, laŭ lia certigo.

Mi mem ne estis ŝia kliento; parte mankis mono, parte mi, vere, ĉiam — ofte eĉ tro — devis juĝi manĝaĵon kaj trinkaĵon kiel neces-aĵon; sed serĉi en ili ĝojon aŭ plezuron, mi neniam ekpensis. Ni ignoris nin unu alian. Iufoje do miaj kolegoj, por inciteti min, kredigis al ŝi, ke mi postulus manĝaĵon de ŝi. Ŝi alpaŝis mian labortablon kaj prezentis sian korbbon al mi.

„Mi ne aĉetas ion, fraŭlino!“ mi diris. — „Nu, kial do vi mendis min?“ ŝi kolere ekkriis. — Mi pardonigis min, kaj tuj divenante la maliceton, plejeble bone klarigis ŝin. — „Nu, almenaŭ donacu al mi unu folion da papero por meti ĝin sur miajn kukojn“, ŝi diris. Mi komprenigis ŝin, ke tiu ĉi estas oficeja papero, sed ne mia; sed mi alportos iom da papero, kiun mi havas hejme. — „Hejme, mi havas sufiĉan mem!“ ŝi moke respondis kaj, ekridante, foriris.

Ĉar tio estis okazinta antaŭ malmulte da tagoj, mi nun ekdecidis tuj uzi tiun interkonatiĝon, por utiligi mian deziron. Tial, morgaŭ matene, mi enbutonigis sub vesto tutan dudek kvinon da paperaj folioj kiuj hejme ne mankis iel, kaj foriris al oficejo, kie mi, pro nemalkovro gardis mian kirason kun granda malkomforteco sur korpo ĝis tagmezo. Kiam la el- kaj eniro de miaj kolegoj kaj la maĉado de iliaj vangoj sciigis min, ke la kukovendistino estis alveninta, kaj mi kredis, ke la ĉefa amasiĝo de klientoj estas pasinta, mi eliris, eliris mian paperaron, ekkuraĝiĝis kaj alpaŝis la knabinon, kiu, kun korbo metita antaŭ si sur planko kaj dekstra piedo sur benketo, staris, mallaŭte zumante kaj per la piedo sur la benketo signante takton. Ŝi rigardis min de kapo al piedoj, kiam mi proksimiĝis kaj per tio ankoraŭ mi embarasiĝis.

„Kara fraŭlino“, mi diris; „vi antaŭ nelonge petis paperon de mi, sed mi ne havis iom da mia; tial mi nun kunportis paperon de hejme, kaj — mi prezentis al ŝi mian paperon. — „Mi jam tiufoje diris al vi“, ŝi intermetis, „ke mi mem havas paperon hejme, sed, tamen — oni povas uzi ĉion!“ — Kun tio ŝi, kun malgranda balanco de kapo, prenis mian donacon kaj metis ĝin en korbbon. „Ĉu vi ne deziras kukon?“ ŝi demandis, pririgardante siajn komercaĵojn; „ankaŭ la plej bonaj jam estas prenitaj!“ — Mi dankis, sed diris, ke mi havas alion por peti. — „Ĉu eble?“ ŝi diris, rapide submetante brakon sub la tenilon de l' korbo kaj rekte stariĝante, dum ŝi per fikse brilantaj okuloj min rigardis. Rapide mi respondis, ke mi estas amanto de muziko, kvankam nur de mallonga tempo, kaj aŭdis ŝin kanti tiel belajn kantojn, aparte unu. „Ĉu vi — min — kantoj“, ŝi ekmirante demandis; „kaj kie?“ — Mi plue rakontis al ŝi, ke mi, loĝante najbare ĉe ŝi, sekrete aŭskultis ŝin dum ŝia laborado en korto, kaj, ĉar unu el ŝiaj kantoj precipe plaĉis min, mi jam provis ĝin lude imiti. „Ĉu eble vi estas tiu, kiu tiel gratas sur violono?“ — Mi tiam, laŭ jama diro, estis nur komencanto kaj nur pli malfrue akiris la necesan lertecon de fingroj“, intermitante diris la maljunulo, agitante en aero per maldekstra mano, kiel violon-

ante. — „Mi tute ekruĝiĝis“, li daŭrigis la rakonton, „kaj mi ankaŭ vidis, ke ŝi bedaŭris la malĝentilan diron. — ‚Kara fraŭlino‘, mi diris, ‚tiu gratado devenas de tio, ke mi ne havas la kantajn notojn skribitaj; tial mi plej ĝentile petas kopion!‘ — ‚Kopion!‘ ŝi diris; ‚la kanteto estas presita kaj aĉetebla ĉe iu strata angulo!‘ — ‚Ĉu la kanto?‘ mi respondis; ‚kredeble nur la teksto!‘ — ‚Vere do, la teksto, la kanto!‘ — ‚Sed la tonoj, laŭ kiuj oni kantas ĝin!‘ — ‚Ĉu oni do ankaŭ tiujn skribas?‘ ŝi demandis. ‚Ja‘, mi respondis; ‚tio do estas la ĉefaĵo! Kiel do vi lernis tiun kanteton, kara fraŭlino?‘ — ‚Mi aŭdis, ke oni kantis ĝin, kaj tiam mi imitis ĝin kantante!‘ — Mi ekmiregis pro tia natura ‚ingenium‘ (talento); cetere, ofte, plej neinstruitaj personoj havas plej multe da talentoj! Sed tio tamen ne estas la ĝusta, propra arto. Mi denove senesperigis. ‚Kian kanteton vi do propre pensas?‘ ŝi demandis, ‚mi scias nombron da kantoj.‘ — ‚Ĉu ĉiuj sen notoj?‘ — ‚Ja! Sed, kia estas tiu kanteto?‘ — ‚Ĝi estas tre bela‘, mi diris; ‚ĝi tuj komence leviĝas supren, tiam revenas mezen, kaj tute mallaŭte finiĝas!‘ — ‚Ho, kredeble estas jena!‘ ŝi diris, ree demetante la korbon kaj metante la piedon sur la benketon, ŝi nun per tute mallaŭta, sed klara voĉo kantis la kanteton, kaj dume mallevis la kapon tiel

bele, tiel ĉarme, ke mi, ankoraŭ antaŭ ol ŝi finis, volis ekpreni ŝian manon. „Ho“, ŝi diris, retirante la brakon, ĉar ŝi kredeble, kredis, ke mi volus nedece preni ŝian manon; sed ne, mi nur volis kisi ĝin, kvankam ŝi estis nur malriĉa knabino. — Nu, ankaŭ mi nun estas malriĉa viro!


Kiam mi nun metis manon en hararon, pro avido, havi la kanteton, ŝi konsolis min dirante, ke la orgenisto de la preĝejo de Sankta Petro ofte eniras la butikon de ŝia patro, por aĉeti muskaton, kaj ŝi volas peti lin, ke li skribu la kanteton per notoj. Post kelke da tagoj mi tien venu por preni ĝin. Tiam, ekprenante la korbbon, ŝi foriris, kaj mi akompanis ŝin ĝis la ŝtuparo. Lastfoje riverencante, sur la plej supera ŝtupo, mi estis surprizata de l' oficejestro, kiu ordonis, ke mi aliru al mia laboro, kaj insultis pri la knabino, kiu, laŭ lia certigo, estas tute sentaŭga. Mi pro tio forte ekkoleriĝis, kaj ĵus volis respondi, ke — se li favore permesas — mi estas konvinkata de l' malo, kiam mi rimarkis, ke li jam estis enirinta sian ĉambron. Mi tial re-trankviliĝis kaj ankaŭ iris al mia skribotablo. Sed de tiu tempo li estis firme konvinkita, ke mi estas maldiligenta oficisto kaj diboĉa homo.

Efektive do, tiu kanteto tiel okupis mian animon, ke mi dum tiu tago kaj sekvintaj apenaŭ

povis prudente labori, mi estis tute kiel perdita. Post kelke da tagoj mi ne sciis ankoraŭ, ĉu estas jam la ĝusta tempo por tie preni la notoĵn. La knabino ja diris, ke la orgenisto eniras la butikon de ŝia patro, por aĉeti muskaton; tiun ĉi li nur povis uzi por trinki bieron. Ĉar nun, de kelke da tagoj, la vetero estis malvarmeta, li, brava muzikartisto, kredeble preferos vinon, kaj tial ne baldaŭ bezonos muskaton. Mi ne kuraĝis paroli al la knabino en koridoro, ĉar nia unua kunveno fariĝis konata de la kolegoj, kaj tiuj ĉi estis avidegaj kaŭzi ion malagrablan al mi.

Dume, mi kun fervoro rekomencis ludadi violonon, kaj provizore ekzercadis la fundamenton; sed dum tio mi zorgeme fermis la fenestron; ĉar mi sciis, ke mia ludo malplaĉis. Sed, kvankam ankaŭ mi malfermis la fenestron, mi tamen ne povis reaŭdi mian kanteton. La najbarino aŭ tute ne kantis, aŭ kantis tiel mallaŭte malantaŭ fermita pordo, ke mi apenaŭ povis distingi du tonojn.

Fine — ĉirkaŭe tri semajnoj estis pasintaj — mi ne povis plu toleri atendon. Verdire, mi jam dufoje, vespere, estis sekrete elirinta en straton — sen ĉapelo, por ke la servistoj pensu, ke mi nur serĉas ion en domo — sed, ĉiufoje, kiam mi proksimiĝis la butikon, mi tiom ekstremis, ke mi, vole — nevole, devis reiri hejmen.



Sed fine — laŭ mia jama diro -- mi ne povis plu toleri atendon. Mi ekkuraĝiĝis, kaj, iun vesperon — ankaŭ tiun ĉi fojon sen ĉapelo — iris el mia ĉambro malsupren la ŝtuparon, kaj firme paŝis tra la strato ĝis la butikoj, kie mi provizore ekhaltis, por pripensi, kion fari pluen? La butikoj estis lumigita, kaj mi aŭdis voĉojn en ĝi. Post iom da prokrasto mi klinis min antaŭen kaj enrigardis de flanko. Mi vidis la knabinon, sidantan antaŭ la butikaj tablo ĉe lumo, elektante pizojn aŭ fabojn. Antaŭ ŝi staris malgracia, fortika viro kun jako pendanta sur ŝultro kaj speco de bastonego en mano, preskaŭ kiel buĉisto. Ambaŭ ili, evidente bonhumore, interparoladis, ĉar la knabino kelkajn fojojn ekridegis, sed sen intermito de ŝia laboro aŭ eĉ levo de kapo. Jam mi sentiĝis kiel baldaŭ ree ektremona, ĉu pro mia nekutima kliniĝo, ĉu pro iu alia kaŭzo, kiam, subite, mi sentis, ke iu fortika mano ekprenis min de dorse kaj trenis min antaŭen. Momente mi estis en la butikoj, kaj returnante min, vidis, ke estis la butikisto mem, kiu, revenante el ekstere, estis surprizinta min dum mia spionado kaj ekkaptis min kiel suspektan. ‚Elemento!‘ li ekkriis; ‚nun mi scias, kien malaperis prunoj, manplenoj da pizoj kaj grio, kiujn oni ŝtelis el elmetuoj dum malhelo! Ke fulmo frakasu vin!‘ Kun tio li aliris min kiel efektive volante min ataki.

Kvankam tute konsternite, mi tamen baldaŭ regajnis kuraĝon pro lia dubo de mia honesteco. Ĝial, mallonge riverencante, mi diris al la malĝentilulo, ke mi ne volis viziti liajn prunojn, nek grion, sed lian filinon. Nun la buĉisto, starante meze de la butikoj, ekridegis kaj mallaŭte diris kelkajn parolojn al la knabino, kiujn tiu ĉi, ankaŭ ridante, respondis per sonanta manfrapo sur lia dorso, kun kio li turnis sin por foriri. La butikisto akompanis lin ĝis la antaŭpordo. Dume, mi jam ree perdis mian kuraĝon kaj staris kontraŭ la knabino, kiu seninterese elektis pizojn, kvazaŭ la tuta afero nepre ne koncernus ŝin. Nun la patro brue revenis en la butikon. ‚Pro diablo‘, li diris. ‚Kian aferon vi havas kun mia filino?‘ Mi entreprenis klarigi al li la interrilaton kaj kaŭzon de mia vizito. ‚Ho, kantojn! Mi ne bezonas kantojn, tute ne!‘ Kaj tion dirante, li tre dube agitis la dekstran brakon.— ‚Jen ĝi!‘ diris la knabino sen demeto de la korbo da ŝelfruktoj, klinante sin kun seĝo flanken kaj montrante la tablon. Mi aliris kaj tie vidis notofolieton. Estis la kanteto. Sed la maljunulo antaŭvenis min. Li tenis la paperon, ĉifonante ĝin, en mano. ‚Mi eksciis‘, li diris, ‚kion tio signifas! Kiu estas tiu ĉi homo?‘ ‚Li estas sinjoro de oficejo‘, ŝi respondis, forĵetante malbonan pizon iom pli malproksimen.



de si. — ‚Sinjoro de oficejo!‘ li ekkriis, ‚en mal-
lumo, sen ĉapelo!‘ Mi klarigis la mankor de
ĉapelo per la sciigo, ke mi loĝadas tute prok-
sime, kaj nomis la domon. — ‚Tiun domon mi
konas‘, li ekkriis. ‚Neniu alia loĝas en ĝi, ol la
kortega konsilisto ** (li nomis la nomon de mia
patro) — kaj mi ankaŭ konas ĉiujn servistojn!‘
— ‚Mi estas filo de la kortega konsilisto‘, mi
mallaŭte diris, kvazaŭ parolante mensogon. Mi
jam spertis multajn aliiĝojn dum vivado, sed ne-
niam tian subitan, kia ĉe tiuj vortoj fariĝis en
la tuta esteco de tiu ĉi viro! Lia buŝo, mal-
fermita por insulto, restis tia, ke liaj okuloj
daŭre ankoraŭ minacis, sed la malsupran parton
de lia vizaĝo komencis vivigi speco de rideto,
kiu pli kaj pli disvastiĝis. La knabino restis en
sia kurbata sinteno kaj nur iom remetis siajn
disligitajn harojn malantaŭ la orelojn. ‚Filo de
l' kortega konsilisto!‘ fine ekkriis la maljunulo,
kies vizaĝo nun estis tute sereniĝinta. ‚Ĉu via
fila moŝto eble volas sidiĝi? Barbara, almetu
seĝon! — Atentu, kaŝemulino!‘ li diris, mem de-
metante korbon de ĝia loko, kaj de ĝi forviŝante
sablon per antaŭtuko. ‚Granda honoro!‘ li diris.
Sinjoro kortega konsilisto — lia fila moŝto, mi
volis diri, ĉu ankaŭ praktikas muzikon? Kiel mia
filino, aŭ, pli bone diri, tute alimaniere, nome
laŭ notoj, laŭ arto?‘ Mi sciigis, ke mi nature ne

havas kantovoĉon. ‚Aŭ ĉu vi ludas klavicembalon laŭ kutimo de nobelaj personoj?‘ Mi diris, ke mi ludis violonon. ‚Mi ankaŭ, dum infaneco, gratis violonon‘, li ekkriis. Ĉe la vorto ‚gratis‘ mi nevole rigardis la knabinon kaj vidis, ke ŝi moke ridetis, tio do tre min ĉagrenis.

‚Do okupiĝu pri la knabino, tie estas muzika loko!‘ li diris; ‚ŝi kantas per bona voĉo kaj, krom tio ŝi ankaŭ havas aliajn talentojn; sed, delikatecon, pro Dio! de kie ŝi havus tion?‘ kion dirante, li ripete frotis dikan fingron sur montra. — Tute honteme, ĉar oni aljuĝis al mi tiel signifan muzikan talenton, mi ĵus volis klarigi la veran estecon de l’ afero, kiam iu ekstere pasanta viro enkriis en la butikon: ‚Bonan vesperon al ĉiuj kune!‘ Mi ektremis, ĉar, laŭ la voĉo, tiu estis unu el la servistoj de mia domo. Ankaŭ la butikisto estis ekkoninta lin. Antaŭmetante langon kaj levante ŝultrojn, li mallaŭte diris: ‚Estas unu el la sinjoroj servistoj de lia patra moŝto; sed li ne ekkonis vin, ĉar vi staris dorse kontraŭ la pordo.‘ Tio ĉi estis vera. Sed la sento de kaŝema, malĝusta faro turmente okupis min. Balbutante kelkajn parolojn de adiaŭo mi foriris. Mi eĉ forgesis kunpreni mian kanteton; sed la butikisto kuris post mi en straton kaj metis ĝin en mian manon.

Tiel mi revenis hejmen, en mian ĉambron

kaj nun atendis la aferojn, kiuj pluen sekvas. Nek ili mankis. La servisto, tamen, estis ekkoninta min. Post kelke da tagoj, la sekretario de mia patro eniris mian ĉambron kaj anoncis, ke mi forlasu la patran domon! Ĉiuj miaj kontraŭdiroj estis sensukcesaj. Oni jam luis por mi ĉambreton en antaŭurbo, kaj per tio mi nun estis tute ekzilata de la proksimo de miaj parencoj. Nek mi povis revidi mian kantantinon, ĉar oni malpermesis ŝian kukovendadon en la oficejo, kaj mi ne povis decidiĝi eniri la butikon de ŝia patro, ĉar mi sciis, ke tio malplaĉus mian patron. Plue, kiam iufoje mi, okaze, renkontis la butikiston en strato, li kun kolera mieno deturnis sin de mi, kaj mi sentis min kiel frapita de fulmo. Nun mi do, estante soleca, dum duontagoj uzis mian violonon kaj ludadis ekzercante.

Sed, okazis ankoraŭ pli grandaj malfeliĉoj. La feliĉo de mia familio malboniĝis. Mia pli juna frato, obstina kaj malkvieta homo, dragona oficiro, devis pagi per vivo senpripensan veton, laŭ kiu li, varmegita per rajdado, transnaĝis la Danubon kun ĉevalo kaj armilaro — estis malproksime en Hungarlando. — La pli aĝa, plej amata, havis oficon en provinco ĉe konsilistaro. Daŭre kontraŭstarante sian superulon kaj, laŭ diro, sekrete incitita de mia patro, li

eĉ permesis al si malĝustajn sciigojn pri lia konduto, por malutili lin. Fariĝis esplorado, kaj mia frato sekrete forlasis la landon. La malamikoj de mia patro, estante multaj, uzis tiun ĉi okazintaĵon, por forigi lin de lia ofico. Atakate de ĉiuflanke, kaj, krom tio, kolerigata pro la malpliigo de sia influo, li ĉiutage faris la plej ofendajn paroladojn kontraŭ la registaro en la kunvenoj de l' konsilistaro. Meze de tia, li estis ekfrapata de apopleksio kaj, senparola, reportata hejmen. Mi mem ne eksciis ion pri tio. La postan tagon mi rimarkis en oficejo, ke oni sekrete interparolis mallaŭte kaj montris min per fingroj; sed jam kutima de tiaj faroj, mi ne pensis malbonon. Tio estis merkrede — vintan vendredon oni alportis al mi en ĉambron nigran vestaĵon kun krepo. Mi ekmiregis, demandis, eksciis. Kvankam mia korpo estis fortika kaj kontraŭstarema, tamen mi nun estis superata. Senkonscie mi defalis plankon. Oni portis min en liton, kie mi febris kaj fantazie parolis dum tago kaj nokto. Poste tamen naturo estis superinta — sed mia patro estis mortinta kaj enterigita.

Mi ne povis plu paroli al li, peti lian pardonon pri ĉiu ĉagreno, kiun mi kaŭzis al li, nek danki lin pro la nemerititaj favoroj — ja, favoroj! Ĉar, lia intenco estis bona, kaj mi

esperas retrovi lin tie, kie ni estos juĝataj laŭ niaj intencoj, sed ne laŭ niaj faroj!

Dum kelke da tagoj mi restadis en mia ĉambro, apenaŭ prenante nutraĵon. Fine mi tamen reeliris, sed tuj post tagmanĝo revenis, kaj nur vespere mi ĉirkaŭvadis en stratoj kiel Kain mortiginta fraton. La patra loĝejo estis por mi teruraĵo, kiun mi ĉiam plej zorgeme evitis dum miaj promenadoj. Sed iufoje, senpense rigardante fikse antaŭ min, jen subite mi staris proksime ĉe la timita domo! Miaj genuoj ektremis tiel, ke mi devis ekhalti. Palpante muron post mi, mi ekkonis la pordon de la butikoj kaj vidis, ke Barbara sidis en ĝi kun letero en mano; ĉe ŝi estis lumo sur tablo, kaj apud ŝi rekte staris ŝia patro, kiu ŝajnis admoni ŝin. Se eĉ mi riskis mian vivon, mi devis eniri, ĉar mi ja havis neniun, al kiu mi povus plendi mian ĉagrenon, neniun kiu sentus kompaton! La maljunulo, mi bone sciis, estis kolera kontraŭ mi, sed la knabino do parolos al mi bonanime! Tamen, okazis tute male. Kiam mi eniris, Barbara ekstariĝis, ĵetis al mi fieran rigardon kaj eniris apudan kameron, kies pordon ŝi ŝlosis post si. Sed la maljunulo, ekprenante mian manon, sidigis kaj konsolis min, sed ankaŭ diris, ke mi nun, estante homo riĉa, ne bezonos plu atenti iun. Li demandis min, kiom mi estas he-

redinta. Mi ne sciis. Li admonis min, ke mi aliru juĝistaron, kaj mi promesis. Oficeja laborado, li diris, ne estas profitiga; mi procentigu mian monon per komercado. Per vendado de gajloj kaj fruktoj oni povas gajni bonan profiton; taŭga kunulo povus ŝanĝi groŝojn en oron. Li mem, antaŭe, tre okupis sin per tia komercado. Dum tio li ofte alvokis sian filinon, kiu, tamen, ne iel respondis; sed, ŝajne, mi tiam kaj tiam aŭdis brueton ĉe ŝia pordo. Sed, ĉar ŝi ne alvenis, kaj la maljunulo nur parolis pri mono, mi fine diris adiaŭ kaj foriris, kaj la maljunulo bedaŭris, ne povante akompani min, ĉar li estis sola en la butikio. Kvankam malĝoja pro mia neplenumita espero, mi tamen estis mirinde konsolata. Ekhaltante kaj rigardante, trans la strato, mian patran domon, mi subite ekaŭdis, ke iu voĉo post mi mallaŭte kaj kolerete parolis jenon: „Ne tuj fidu ĉiun! Oni ne havas bonan intencon pri vi!“ Kvankam mi rapide returnis min, mi tamen ne povis vidi iun; nur ekbruo de fenestro de l' teretaĝo, kiu apartenis al la loĝejo de la butikisto, sciigis min, krom la ekkono de la voĉo, ke Barbara estas la sekreta admonintino. Ŝi do tamen estis aŭdinta tion, kion ni parolis en la butikio. Ĉu ŝi intencis averti min pri sia patro, aŭ eksciis, ke, tuj post la morto de mia patro, parte kolegoj de l' oficejo, parte

aliaj tute nekonataj personoj atakis min per petoj de subteno kaj helpo kontraŭ mizero, kaj mi ankaŭ promesis por la tempo, kiam mi havos monon? Kvankam mi devis plenumi tion, kion mi estis promesinta, mi tamen decidis, estonte esti pli singardema. Mi prezentis min pro mia heredaĵo. Ĝi estis pli malmulta, ol oni supozis, sed tamen tre granda, nome preskaŭ dekunu mil florenoj. La tutan tagon petantoj kaj helpon serĉantoj vizitis min, sed mi fariĝis preskaŭ sensentema kaj donis nur al tiu, kies mizero estis plej granda. Alvenis ankaŭ la patro de Barbara. Li plendis, ke mi jam de tri tagoj ne vizitis lin. Laŭ vero mi respondis, ke mi kredis ĝeni lian filinon; sed li respondis, ke mi ne zorgu pro tio, ĉar li jam estis prudentiginta ŝin, kaj ekridis tiel mallice, ke mi ekfrapiĝis. Per tio memorigata pri la admono de Barbara, mi ankaŭ ne diris al li la sumon de mia heredaĵo, kiun li baldaŭ citis dum nia interparolado; mi ankaŭ lerte evitis liajn komercajn proponojn.

Vere, mi jam pensis aliajn projektojn. Mi jam estis anstataŭita per alia oficisto en la oficejo; sed tio malmulte interesis min, ĉar mia ofico ja estis senpaga. Sed la sekretario de mia patro, perdinte vivtenon per la lastaj okazintaĵoj, sciigis al mi projekton, fondi kontoron de informo, kopio kaj traduko. Pro mia postulo

la kopiaj laboroj enhavus ankaŭ la kopiadon de muzikaĵoj, kaj nun mi sentis min feliĉa. Mi donis la necesan monon, sed, jam estante singardema, mi donigis lin al mi skribitan ateston pri ĝi. La garantia kapitalo, kiun mi ankaŭ antaŭdonis, ŝajnis ne grava, ĉar ĝi devis esti deponata ĉe juĝistaro kaj tial restis mia tiel certe kiel en mia ŝranko.

Post kiam tiu ĉi afero estis finita, mi sentis senŝargita, pli vivama; unuafoje dum mia vivo memstara — viro! Mi apenaŭ memoris ankoraŭ mian patron. Mi enloĝiĝis en pli bona loĝejo, iom aliigis mian vestaĵon kaj, vespere aliris tra tre bone konataj stratoj al la butikoj, svingante piedojn kaj zumante inter la dentoj mian kanteton, kvankam ne tre ĝuste. Precipe la „Bes“ en ĝia dua duono mi neniam povis kanti. Gaje kaj bonhumore mi alvenis, sed glacieca rigardo de Barbara tuj reĵetis min en mian antaŭan senkuraĝecon. La patro tre bone ricevis min, sed ŝi aspektis, kvazaŭ neniue estus veninta, daŭrigis fari paperajn ujojn kaj nepre ne partoprenis la interparoladon. Nur tiam, kiam ŝia patro komencis paroli pri mia heredaĵo, ŝi duone ekstariĝis kaj preskaŭ minace diris: „Patro!“ post kio la maljunulo tuj aliigis la temon. Krom tio ŝi ne parolis iom dum la tuta vespero, ne donis al mi duan rigardon, kaj, kiam mi fine

adiaŭis, ŝia ‚bonan vesperon!’ preskaŭ sonis kiel ‚Dank’ al Dio!

Sed mi ripete revenis, kaj ŝi fine, iom post iom, cedis. Tamen, mi ne povis fari ion kontentigan por ŝi. Ŝi senĉese insultis kaj mallaŭdis min. Ĉio estis mallerta; Dio estis doninta al mi du maldekstrajn manojn; mia vesto pendis ĉe mi kvazaŭ ĉe birdotimigilo; mi paŝadis kiel anaso kun simileco de virkoko. Sed plej malmulte malplaĉis ŝin mia ĝentileco kontraŭ la aĉetantoj. Nome, ĉar mi estis senokupa, antaŭ la komenciĝo de la kopia instituto, kaj pripensis, ke tie mi devos havi aferon kun publiko, mi, pro antaŭa ekzercado, vigle partoprenis la detalan vendadon en la butiko, kaj per tio ofte restadis tie duontagon. Mi pesis spicojn, kalkulante donis al knaboj nuksojn kaj sekprunojn, redonis monerojn al iu aĉetanto, sed tion ĉi mi ne faris ĉiam senerare, kaj tiaokaze Barbara intervenis, perforte forprenis tion, kion mi ĵus tenis en mano, kaj ridis aŭ mokis min antaŭ klientoj. Se mi faris riverencon al iu aŭ rekomendis min al li, ŝi malĝentile kaj antaŭ ol la persono estis el pordo, alkriis al mi: ‚La komercaĵo rekomendas!’ kaj deturnis sin de mi. Sed, kelkfoje ŝi ree estis bonegeco mem. Tiam ŝi aŭskultis mian rakonton pri tio, kio okazis en urbo, pri la interkonduco de la oficistoj

en la oficejo, kie ni unuafoje interkonatiĝis. Sed dum tio ŝi lasis min ĉiam paroli sola kaj nur per unuopaj vortoj sciigis sian aprobon aŭ — kaj tio fariĝis plej ofte — sian malaprobon.“

„Pri muziko aŭ kanto ni neniam parolis. Unue ŝi diris, ke oni aŭ kantu, aŭ silentu; paroli pri tio ne estas ebla. Sed kanto ne estis permesata, ĉar ĝi ne decas en butikoj, kaj la malantaŭan ĉambron, kie ŝi loĝadis kun sia patro, mi ne havis permeson eniri. Tamen, iufoje, kiam mi nerimarkite eniris la butikon, ŝi staris sur piedfingroj, kaj turnante al mi dorson, ŝi kiel serĉante palpis sur supra tabulo de breto. Kun tio ŝi mallaŭte kantis al si mem. Estis mia kanto, mia! — Ŝi pepadis, kiel silvio lavante koleton ĉe rivereto, ĉirkaŭskuas kapeton, starigas plumojn kaj ree ilin glatigas per beketo. Mi sentis min kiel promenanta sur verda herbejo. Pli kaj pli proksimiĝinte, mi jam estis tiom proksima, ke la kanto ŝajnis jam ne alsoni de ekstere, sed elsoni el mi, kvazaŭ kanto de animoj.

Mi do ne povis reteni min, ĉirkaŭpreni ŝian, meze kliniĝantan, sed ŝultre malsupreniĝantan al mi, korpon. Jen, aventuro! Turnante sin kiel turbo, brulruĝa en vizaĝo pro kolero, ŝi staris antaŭ mi; ŝia mano ekleviĝis, kaj, antaŭ ol mi povis senkulpigi min — —

Laŭ mia jama diro, oni kelkfoje rakontis en

la oficejo pri vangfrapo, kiun Barbara, estante ankoraŭ kukvendistino, donis al iu aroganta oficisto. Ilia diro pri la forto de la tre malgranda knabino kaj la svingforto de ŝia mano, tiam ŝajnis al mi ŝerce trograndigita. Sed, estas vere, ke ŝia forto estis preskaŭ grandegula. Mi staris kiel frapita de fulmo. Lumoj dancis antaŭ miaj okuloj. — Sed tiuj ĉi estis lumoj de ĉielo, luno kaj suno kaj steloj, kaj anĝeloj ludantaj kaŝiĝon kaj serĉon inter si, kaj dume kantantaj! Mi havis aperaĵon kaj sentis min ravita. Sed ŝi, apenaŭ pli malmulte ekfrapita, ol mi, kun ŝia mano trankvilige frotis la batitan lokon. „Ĝi eble estis tro forta!“ ŝi diris, kaj — alia fulmo! — subite mi eksentis ŝian varman spiron sur mia vango kaj ŝiajn du lipojn, kaj ŝi kisis min — nur malforte, dolĉe; sed estis vera kiso sur mia vango, jen!“ Kun tio li frapis al sia vango, kaj larmoj vidiĝis en liaj okuloj. —

Kio fariĝis pluen, mi ne scias“, li daŭrigis parolon. „Mi nur memoras, ke mi ĵetis min al ŝi; sed ŝi enkuris en la ĉambron, kies vitran pordon ŝi firme tenis fermita, dum mi alpremis min kontraŭ ĝi. Kiam ŝi nun, kurbita kaj, kun ĉiu ebla forto kontraŭapoganta sin, kvazaŭ estis algluita al la porda vitro, mi ekkuraĝiĝis, plej estimata sinjoro, forte redoni al ŝi la kison tra la vitro.

„Ho, kia gajega amuzado!“ mi ekaŭdis iun ekkrii post mi. Estis la butikisto, ĵus revenanta hejmen. „Nu, kiuj incitetas unu alian, tiuj — li diris; ,elvenu do, Barbara! Ne estu naivega! Kisi kun honesteco — ne estas malboneco!“ — Sed ŝi ne revenis. Mi mem, post kelkaj, duone senkonscie balbutitaj paroloj, foriris, erare kunprenante la ĉapelon de la butikisto, kaj li ridante interŝanĝis ĝin en mia mano. Tiu do, laŭ mia jama diro, estis la feliĉa tago de mia vivo! Preskaŭ mi volis diri: mia unua! Sed tio ĉi ne estus vera, ĉar homo ĝuas multajn favorojn de Dio!

Mi ne bone sciis, kion la knabino eble nun pensis pri mi; ĉu ŝi estas pli kolerigita aŭ pli afabligita; tial mi malfacile ekdecidis, revidi ŝin. — Sed, ŝi estis bona. Humile kaj kviete, nek ekkoleriĝante kiel antaŭe, ŝi sidis laboranta. Per kapobalanco al apuda benketo, ŝi komprenigis min, ke mi sidiĝu kaj helpu ŝin. La maljunulo volis foriri. „Restu do tie ĉi, patro!“ ŝi diris. „Tio, kion vi volas fari, jam estas farita!“ Forte puŝante piedon sur planko, li restis. Promenante, li parolis pri tio kaj tio, sed mi ne riskis, partopreni la paroladon. Subite la knabino ekkrietis. Dum laborado ŝi estis defrotinta fingron kaj, kvankam kutime ŝi ne estis molanima, ŝi tamen nun agitis la manon. Mi volis rigardi, sed ŝi faris signon, ke mi daŭrigu. „Sensecaĵo sen fino!“ murmuris

la maljunulo kaj, alpaŝante antaŭ la knabino, per forta voĉo diris: ‚Tio, kio devis esti farata, tute ne estas ankoraŭ farita!‘ Kun tio li, per sonantaj paŝoj, eliris tra pordo. Mi nun volis komenci senkulpiĝon pro hieraŭ, sed ŝi, intermitigante, diris: ‚Ni lasu tion, sed nun parolu pri prudenta afero!’

Levante kapon kaj observante min de kapo al piedoj, ŝi trankvile daŭrigis parolon: ‚Mi apenaŭ memoras la komencon de nia interkonatiĝo: sed de kelka tempo vi vizitis nin pli kaj pli ofte, kaj ni kutimis vin. Neniu povas nei, ke vi havas honestan animon, sed ĝi estas tro malforta, ĉiam atentis neĉefaĵojn tiel, ke vi apenaŭ povas prizorgi viajn proprajn aferojn. Tial estas la devo de viaj amikoj kaj konatuloj, pripensi, por ke vi ne spertu malutilon. Vi tie ĉi pasigas duontagojn per kalkulo, pesado, mezurado kaj marĉando, sed tio ne utilas iom al vi! Kion do vi pensas estonte fari por gajni vian porvivon?’ — Mi citis mian heredaĵon. — ‚Ĝi eble estas granda‘, ŝi diris. Mi nomis la sumon. ‚Tio estas multa kaj malmulta‘, ŝi respondis; ‚nome: multa por entrepreni ion per ĝi, sed malmulta por vivi per ĝia procento. Verdire, mia patro faris al vi proponon, sed mi dekonsilis vin! Ĉar: unuflanke, li jam perdis monon per tia afero, kaj, aliflanke‘, ŝi daŭrigis

per mallaŭta voĉo, ‚li estas tiom kutima gajni proiiton de fremduloj, ke eble li ne faros pli bone kontraŭ amikoj! Vi bezonas iun helpanton, kiu estas honeste pensanta.‘ — Mi montris ŝin. — ‚Honeste mi estas‘, ŝi diris, kaj, dum ŝi metis manon sur brusto, ŝiaj okuloj, kiuj alitempe ŝajnis kvazaŭ grizaj, nun briletis helblue, ĉielblue. ‚Sed mia sorto estas aparta. Nia komerco donas nur malmulte da profito, kaj mia patro jam intencas aranĝi trinkejan butikon. Tio do ne estas taŭga por mi! Mi povas nur iari manlaboron, ĉar mi ne volas servadi!‘ Dirante tion, ŝi havis mienon kiel reĝino. ‚Oni verdire faris al mi edziniĝan proponon‘, ŝi diris, eltirante leteron el antaŭtuko kaj duone malbonhumore ĵetante ĝin sur tablon; ‚sed tiuokaze mi devos foriri de tie ĉi.‘ — ‚Ĉu malproksimen?‘ mi demandis. — ‚Kial? Ĉu tio interesas vin?‘ — Mi diris, ke mi translokiĝos samtempe. — ‚Vi do estas infaneca! Tio ja ne povus esti kaj koncernas ion tute alian!‘ — Sed, se vi fidas min kaj amas vivi proksime ĉe mi, vi aĉetu la apudan ĉapelistinan komercon, kiu estas aĉetebla. Mi konas la metion, kaj vi ne timu ke vi ne ricevos la decan procenton de via mono! Ankaŭ per kalkulado kaj skribado vi havos ordan okupon. Pri tio, kio eble fariĝos pluen, ni hodiaŭ ne parolu! — Sed, vi devas aliiĝi! Mi malamas senenergiajn virojn!’

Eksaltinte de seĝo, mi ekprenis mian ĉapelon. ‚Kio estas? Kien vi volas iri?‘ ŝi demandis. ‚Por ĉion malmendi!‘ mi kvazaŭ senpire respondis. — ‚Kion do?‘ — Nun mi rakontis al ŝi mian projekton, fondi kontoron de kopiado kaj informado. ‚Tia komerco ne estas profitiga‘, ŝi diris. ‚Informi sin povas ĉiu mem, kaj skribon ankaŭ ĉiu lernis en lernejo!‘ — Mi diris, ke ankaŭ muzikaĵoj estu tie kopiataj; kaj tion ne ĉiu povas fari! — ‚Jen vi ree parolas sensencaĵon!‘ ŝi alkriis min. ‚Lasu muzikadon kaj pensu necesajn! Ankaŭ, vi ne taŭgas por esti ĉefo de komercejo!‘ — Mi sciigis ŝin, ke mi trovis partoprenanton. ‚Ĉu partoprenanton?‘ ŝi ekkriis, ‚tiu certe intencas trompi vin! Ĉu vi eĉ donis monon?‘ — Mi senvole ekstremis. — ‚Ĉu vi jam donis monon?‘ ŝi ree demandis. Mi konfesis, ke mi donis tri mil florenojn por la unua meblaro. — ‚Tri mil florenojn!‘ ŝi ekkriis. ‚Tiom da mono!‘ — ‚La resto‘, mi daŭrigis, ‚estas deponita ĉe juĝistaro, tial ĝi estas certigita!‘ — ‚Ĉu ankoraŭ pli?‘ ŝi ekkriis. Mi citis la sumon de la garantio. — ‚Ĉu vi mem deponis ĝin ĉe juĝistaro?‘ — ‚Faris mia partoprenanto.‘ — ‚Sed — vi do havos ateston skribitan pri ĝi!‘ — ‚Mi ne havas.‘ — ‚Kaj kiu estas la nomo de via partoprenanto?‘ ŝi demandis. — Mi estis iom trankviligita, ĉar mi povis nomi la sekretarion de mia patro.

„Justa Dio!“ ŝi ekkriis, eksaltante de seĝo kaj kunfrapante manojn. „Patro, patro!“ — La maljunulo eniris. — „Kion vi hodiaŭ legis en gazeto?“ — „Ĉu pri la sekretario?“ — „Jes, jes!“ — „Nu, li estas forkurinta, lasante nombron da ŝuldoj kaj trompinte nombron da personoj. Oni nun persekutas lin per arestletero!“ — „Patro!“ ŝi ekkriis, „ankaŭ tiun ĉi li trompis, kiu fideme transdonis al li sian monon! Li estas ruinigita!“ — „Malsaĝuloj sen fino!“ la maljunulo ekkriis. „Ĉu mi ne estas prava? Sed vi ĉiam senkulpigis lin! Nun vi ridis pri li, nun li ree estis por vi honesta animo! — Sed nun mi ĉesigas la interrilaton! Mi komprenigos, kiu estas estro tie ĉi en domo! — Barbara, tuj iru en vian kameron! Kaj vi, sinjoro, rapide foriru kaj indulgu min de viaj vizitoj! Tie ĉi oni ne donas al almozuloj!“ — „Patro“, diris la knabino, „ne estu malsentema kontraŭ li! Li ja estas jam sufiĉe malfeliĉa!“ „Ĝuste pro tio! Mi ne volas ankaŭ malfeliĉigi min mem! — Tiu ĉi sinjoro“, li kriis, montrante la leteron sur tablo, „tiu ĉi estas viro! Li havas intelekton en kapo kaj monon en poŝo, nek trompas iun, nek ankaŭ permesas, ke aliaj trompos lin, kaj tio estas la ĉefa afero koncerne honesteco!“ — Mi balbute diris, ke la perdo de la garantio ne estas ankoraŭ certa. — „Ho, vere!“ li ekkriis. „Ĉu vi kredas, ke la sek-

retario estas naivegulo? Li estas fripono, sed ankaŭ ruzulo. Kaj nun rapidiĝu; eble vi ankoraŭ ekkaptos lin! Kun tio, metante manon sur mian ŝultron, li ŝovis min kontraŭ la pordon. Turnante min flanken, mi evitis la premon kaj rigardis la knabinon kiu, apogante sin sur tablo, staris kun mallevitaj okuloj, dum ŝia brusto forte ondiĝis. Mi volis proksimiĝi ŝin, sed ŝi kolere puŝis piedon kontraŭ plankon, kaj kiam mi etendis manon, ŝi, ekskuante ĝin, duone levis brakon kiel ree volante frapi min. Nun mi foriris, kaj la maljunulo fermis la pordon post mi.

Ŝanceliĝante mi iris tra stratoj kaj pordego en kampon. Kelkfoje atakis min malespero, sed poste mi ree sentis esperon. Mi memoris, ke mi akompanis la sekretarion ĝis la komerca juĝistejo, kie li deponis la garantion. Mi atendis lin en la enveturejo, kaj li sola supreniris. Kiam li revenis malsupren, li diris, ke oni sendos la ricevateston en mian loĝejon. Verdire, tio ne fariĝis; sed tamen restis ankoraŭ la eblo. Ĉe tagiĝo mi revenis en urbon. Mia unua iro estis al la loĝejo de la sekretario. Sed la homoj tie ekridis, demandante, ĉu mi ne legis gazetojn? — La komerca juĝejo estis nur kelke da domoj pli malproksime. Mi serĉigis en libroj, sed nek lia, nek mia nomo estis trovebla, nek enskribo

pri enpago. Mia malfeliĉo do estis certa. Plue, preskaŭ mi perdis ankoraŭ plion; ĉar, pro la farita societa kontrakto, kelke da kreditoroj volis arestigi min, sed la juĝistaro ne permesis. Laŭdo kaj danko estu dirata al ĝi pro tio!

Dum tiuj malagrablaj aferoj mi — mi devas konfesi — preskaŭ forgesis la butikiston kaj lian filinon. Nun, plitrankviligite kaj pripensante mian pluan faron, mi vive rememoris la lastan vesperon, kiun mi pasigis ĉe ili. Mi tute komprenis la konduton de la maljunulo, pro lia egoismo — sed, la knabino! — Kelkfoje mi pensis jenon: se mi prudente zorgis pri mia havaĵo, mi povis prezenti al ŝi porvivon, kaj eble ŝi, poste — — sed ŝi ja ne amis min!“ Kun tio li, kun pendantaj brakoj pririgardis sian tutan mizeran staturon. — „Ankaŭ ŝi daŭre malamamis mian ĝentilan konduton kontraŭ iu ajn homo!

Tiel mi pasigis tagojn per pensado kaj meditado. Iufoje, dum vespero, — ĝuste dum la tempo kiun mi kutime pasigis antaŭe en la butiko — mi ree sidante imagis esti en la kutima loko kaj aŭdi, ke ili parolante insultis, eĉ ridis pri mi. Subite io bruetis ĉe mia pordo; ĝi malfermiĝis, kaj knabino eniris. — Estis Barbara. — Mi sidis kiel alnajlita sur mia seĝo, kvazaŭ mi vidus fantomon. Ŝi estis palvizaĝa kaj portis paketon sub brako. Alveninta enmeze

de l'ĉambro, ŝi ekhaltis, rigardis ĉirkaŭ la murojn, tiam al la mizera meblaro, kaj profunde ekĝemis. Tiam ŝi aliris la ŝrankon, kiu estis flanke ĉe muro, disvolvis sian paketon, kiu enhavis kelkajn ĉemizojn kaj tukojn — dum lasta tempo ŝi prizorgis mian tolaĵon — eltiris tirkeston kaj kunfrapis manojn pro ĝia malmulta enhavo, sed tiam tuj komencis ordigi la tolaĵon kaj enmeti la kunportitajn pecojn. Tiam paŝante malantaŭen kelke da paŝoj de la ŝranko, kaj rigardante min, ŝi diris, montrante la malfermitan tirkeston: ‚Kvin ĉemizojn kaj tri tukojn mi ricevis, jen ili reportitaj!‘ Tiam, malrapide enŝovinte la tirkeston, ŝi apogis sin per mano al la ŝranko kaj ekploregis. Preskaŭ ŝajnis, ke ŝi estus svenanta, ĉar ŝi sidiĝis sur seĝo apud la ŝranko, kaŝis la vizaĝon en tuko, kaj, laŭ la puŝo sonantaj spiroj mi aŭdis, ke ŝi daŭrigis ploradon. Malbrue alpaŝinte ŝin, mi ekprenis ŝian manon, kiun ŝi volonte lasis al mi; sed, kiam mi, por altiri al mi siajn rigardojn, suprenpalpis ĉe ŝia rigide pendanta brako, ĝis kulbuto, ŝi rapide ekstariĝis, liberigis sian manon kaj per refortigita voĉo diris: ‚Kion helpas tio? Estas do decidite! Vi mem volis ĝin, vi malfeliĉigis nin, kaj plejmulte vin mem! Propre dirote: vi ne meritas kompaton‘ — de nun ŝi pli kaj pli koleriĝis — ‚ĉar vi estis tro malfortanima, por

ordigi viajn proprajn aferojn, kaj tiom kredema, ke vi fidis iun ajn homon, ĉu tio estis fripono aŭ honesta homo! — Sed tamen, mi bedaŭras vin! — Mi venis por diri adiaŭ. Ja, ekstremu do! Vi mem ja estas la kaŭzo. Mi nun devas foriri inter la malĝentilajn homojn, kontraŭ kio mi tiom longtempe batalis. Sed, ne ekzistas kontraŭrimedo. Mi jam donis al vi manon, kaj nun — adiaŭ — por ĉiam! Mi vidis, ke ŝiaj okuloj ree pleniĝis de larmoj, sed, malkontente skuante kapon, ŝi foriris. Mi sentis, kvazaŭ mi havas plumbon en membroj. Alveninte ĉe la pordo, ŝi ankoraŭ unu fojon returnis sin kaj diris: „La tolaĵo nun estas ordigita; zorgu, ke nenia peco perdiĝu — vi spertos malbonan tempon!“ Kaj nun, levante manon, ŝi faris en aero signon kiel krucon kaj ekkriis: „Dio estu kun vi — Jakob — — por eterne, amen!“ ŝi pli mallaŭte aldiris, kaj foriris.

Ne pli frue ol nun mi povis uzi miajn membrojn. Mi rapide sekvis ŝin, kaj, starante sur la turnejo de l' ŝtuparo, mi kriis post ŝi: „Barbara!“ Mi aŭdis, ke ŝi ekhaltis sur la ŝtuparo. Sed kiam mi deiris al la unua ŝtupo, ŝi de sube aldiris al mi: „Restu!“, daŭrigis iron mal-supren kaj eliris tra la pordego.

De tiu tempo mi travivis malbonajn tagojn, sed neniu el ili estis tia; eĉ la sekvanta tago

estis malpli malbona. Nome, ĉar mi tamen ne certe komprenis mian nunan interrilatton kun ŝi, mi, la sekvantan matenon vagis en la ĉirkaŭaĵo de la butikoj, por eble ekscii informon. Sed, ĉar mi ne vidis ion, mi fine de flanko enrigardis en la butikon, kaj nun vidis fremdan virinon, kiu pesis, redonis monon kaj kalkulis. Mi kuragis eniri kaj demandi, ĉu ŝi aĉetis la komerc-ejon? — ‚Ne ankoraŭ!‘ ŝi respondis. — ‚Kie estas la posedantoj?‘ — ‚Ili, hodiaŭ matene, forvojaĝis je Langenlebern.‘ — ‚Ĉu ankaŭ la filino?‘ — ‚Kompreneble! Ŝi ja tie edziniĝos!‘

La virino, eble, rakontis al mi ĉion, kion mi estonte eksciis de aliaj personoj. Nome, la buĉisto el la citita urbeto — la sama, kiun mi renkontis ĉe mia unua vizito — de longtempe proponis edzinigon al la knabino, sed ŝi ĉiam evitis akcepton, ĝis kiam, dum la lastaj tagoj, ŝi cedis, pro la urgado de sia patro kaj la mal-espero pri sia sorto. La saman matenon patro kaj filino vojaĝis tien, kaj, en la momento de nia interparolado ŝi jam estis la edzino de la buĉisto.

La vendistino — mi jam diris — eble rakontis al mi ĉion, sed mi ne aŭdis kaj staris senmove, ĝis kiam fine eniris aĉetantoj, kiuj ŝovis min flanken, kaj la virino demandis min, ĉu mi deziras ankoraŭ ion alian? Mi nun foriris.

Vi kredos, tre estimata sinjoro“, li daŭrigis, „ke mi sentis kiel la plej malfeliĉa homo! Kaj vere, mi sentis tiel la unuan momenton. Sed, elpaŝante el la butikoj kaj nun, turnante min por rigardi la malgrandajn fenestrojn, ĉe kiuj certe Barbara ofte staris kaj elrigardis, feliĉega sento tamen okupis min. Kiel dolĉiganta balsamo trankviligis mian bruston la certeco, ke ŝi nun estas liberigita de sia ĉagreno, estrino en propra domo, kaj ne bezonas plu suferi ĉagrenon kaj mizeron, kiujn ŝi devis suferi, se ŝi kunligis sian vivon kun tiu de senhejmulo, kiel mi! Kaj mi benis ŝin kaj ŝiajn vojojn.

Kiam mi nun do fariĝis pli kaj pli mizera, mi ekdecidis serĉi porvivon per muziko; kaj dum la daŭro de la resto de mia mono, mi ekzercis kaj studis la verkojn de grandaj majstroj, precipe malnovaj, kaj kopiis ilin; kaj, kiam fine la lasta groŝo estis elspezita, mi komencis profitigi mian scion, nome komence en ferm-itaj societoj. Iu gastado en la domo de mia lumastrino donis la okazon. Sed ĉar la muzikaj pecoj tie ne plaĉis, mi stariĝis en kortoj de domoj; ĉar, inter tiom da loĝantoj do eble estos iuj, kiuj scias ŝati seriozon — eĉ fine ĉe la publikaj promenadoj, kie, vere, mi havis la kontentiĝon, vidi, ke unuopaj promenantoj ekhaltis, aŭskultis, demandis min kaj ne sen intereso re-

foriris. Mi ne hontis pro la mono, kiun ili metis en ĉapelon por mi, ĉar, unue: perlaboro de mono ĝuste estis mia celo, kaj due: mi ankaŭ vidis, ke gloraj virtuloj, kiujn atingi laŭ arto mi ne povis iel gloriĝi postulis, ke oni, kaj ofte tre riĉe, pagu iliajn prezentadojn. Tiamaniere mi, kvankam mizere, sed tamen honeste gajnis mian porvivon ĝis tiu ĉi tago.

Post jaroj mi do povis ankoraŭ sperti feliĉon! Barbara revenis. Ŝia edzo estis perlaborinta monon kaj aĉetis buĉistan komercejon en iu el la antaŭurboj. Ŝi estis patrino de du infanoj, el kiuj la plimaljuna estis nomata Jakob, kiel mi mem. Miaj profesiaj aferoj kaj la memoro de malnovaj tempoj ne permesis al mi altrudi min; sed fine, oni mem mendis min en domon, por ke mi instruu la pli aĝan knabon pri violonludo. Kvankam li havis nur malmulte da talento kaj povis ludi nur dimanĉe, ĉar dum semajno la patro okupis lin en metio, li tamen jam povis tre bone ludi la kanteton de Barbara laŭ mia instruado, kaj kiam ni kune ekzercadis kaj ludadis, ankaŭ la patrino iom kunkantis. Vere, ŝi tre aliĝis dum la multe da jaroj, dikiĝis kaj malmulte interesiĝis pri muziko, sed ŝia kanto sonis daŭre tiel bele kiel tiam estinte.“ Kun tio la maljunulo ekprenis sian violonon, komencis ludi la kanteton kaj daŭrigis sian ludon

sen atento pri mi. Fine, ne povante plu toleri ĝin, mi ekstariĝis, metis kelke da arĝentaj moneroj sur tablon kaj foriris, dum la maljunulo daŭrigis ludi. —

Baldaŭ poste mi forvojaĝis kaj revenis nur komence de vintro. La novaj vidoj kaj impresoj forŝovis la antaŭajn, kaj mia muzikisto estis preskaŭ forgesata. Nur okaze de la terura glacirompo dum la sekvinta printempo kaj superakvego de la malalte lokitaj antaŭurboj, kiu estis ĝia konsekvenco, mi rememoris pri li. La ĉirkaŭaĵo de la Gärtnergasse estis lago; la vivo de la maljunulo ne ŝajnis esti minacata, ĉar li ja loĝadis en subtegmento, kaj morto elektis siajn oferaĵojn inter la loĝantoj de la teretaĝoj. Sed, estante sen iu helpo, li tamen devis, vere, esti en granda mizero.

Dum la daŭro de la superakvego mi ne povis fari ion; ankaŭ la estraro, laŭ eblo, provizis de nutraĵo kaj helpis la apartigitajn loĝantojn per ŝipoj. Sed kiam la akvaro forfluis kaj la stratoj ree estis paŝeblaj, mi decidis transdoni al la adreso plej interesa por mi mian parton de la monkolokto, kiun oni aranĝis kaj kiu kolose grandiĝis.

La vido de Leopoldstadt estis terura. En la stratoj oni vidis disrompitaĵojn kaj meblaron, en la teretaĝoj parte ankoraŭ superakv-

egon kaj naĝantajn havaĵojn. Kiam mi, evitante la amason, alpaŝis duone fermitan pordegon de iu korto, tiu malfermiĝis entute, kaj mi ekvidis, en la enveturejo, nombron da kadavroj kiuj evidente estis tie kunmetitaj por esti ekzamenotaj de oficistaro; eĉ en la interno de ĉambroj mi ankoraŭ tie kaj tie vidis mortintajn loĝantojn rekte starantajn aŭ alkroĉitajn ĉe la kradaj fenestroj — mankis ja tempo kaj oficistoj, por juĝistare konstati tiom da mortkazoj!

Tiel irante antaŭen, mi de ĉiuflanke aŭdis ploradon kaj funebran sonoradon kaj vidis serĉantajn patrinojn kaj erare ĉirkaŭkurantajn infanojn. Ankaŭ tie la nigraj akompanuloj de funebra procesio stariĝis, ŝajne proksime ĉe la domo kiun mi serĉis. Proksimiĝante, mi bone rimarkis interrilaton de aranĝoj kaj tien kaj tien ĉi irantaj personoj inter la funebra akompanantaro kaj la loĝejo de la geĝardenistoj. Ĉe la dompordo staris maljuneta, sed ankoraŭ fortika viro kun brava mieno, kiu, vestita per altaj botoj, flavaj ledaj pantalonoj kaj longen dependanta vesto, similis kamparan buĉiston. Li ordonis tion kaj tion, sed dume tre indifereinte interparolis kun la ĉeestantoj. Preterirante lin, mi eniris korton. La maljuna ĝardenistino venis renkonte al mi, tuj reekonis min, kaj salutis plorante. „Ĉu vi ankaŭ honoras nin per via

ĉeesto?" ŝi diris. „Jes, mia mizera maljunulo! Li nun faras muzikon kun la karaj anĝeletoj, kiuj tamen ne estas pli bonaj ol li estis jam tie ĉi sur tero! La honestulo sidis tie supre en sia kamero kun trankvileco kaj certeco. Sed kiam la akvo alvenis kaj li aŭdis, ke infanoj kriadis, li dekuris malsupren kaj savis, trenis kaj portis kaj certigis tiel, ke fine li spiregis kiel forĝista blovilo. Eĉ — oni ja ne povas antaŭvidi ĉion — kiam fine ni konvinkiĝis, ke mia edzo estis forgesinta sian libron de depagoj kaj kelke da florenoj en papermono, en la mura ŝranko, tiam la maljunulo ekprenis hakilon, eniris en akvon, kies supraĵo jam atingis lian bruston, rompe malfermis la ŝrankon kaj fidele alportis ĉion al ni! Sed per tio li, kredeble, malvarmumiĝis, kaj, ĉar helpo ne estis havebla dum la unua tempo, li komencis deliri, kaj pli kaj pli malsaniĝis, kvankam ni laŭ eblo helpis lin kaj, kredeble, pli suferis ol li. Ĉar li daŭre muzikis, nome per voĉo, farante takton kaj donante lecionon. Kiam, post ioma forfluo de la akvo, ni povis venigi kuraciston kaj pastron, li subite ekleviis sin en lito, turnis kapon kaj orelon flanken kiel aŭdante ion tre belan de malproksime, ekridetis, defalis dorsen kaj estis mortinta! — Supreniru do! Li ofte parolis pri vi! La sinjorino ankaŭ estis tie. Ni volis enterigi

lin, kompensante la kostojn, sed sinjorino la buĉistedzino ne permesis tion“.

Ŝi ŝovis min supren sur la kruta ŝtuparo, ĝis la subtegmenta ĉambro kiu estis malfermita kaj tute senmebla, krom ĉerko kiu, jam fermita kaj nur atendante la portistojn, staris en mezo. Ĉe ĝia kapa fino sidis vastkorpa virino, pasiginta jam la duonon de vivo, kaj vestita per multekolora katuna jupo, sed nigraj koltuko kaj kufo kun rubandoj. Mi dubis la eblon, ke iam ŝi estis bela. Antaŭ ŝi staris du preskaŭ plenaĝaj infanoj, junulo kaj knabino, kiujn ŝi evidente instruis, kiamaniere ili konduku ĉe la funebra procesio. Ĵus, kiam mi eniris, ŝi depuŝis la brakon de la junulo, kiu, sufiĉe malgracie estis apoginta sin sur la ĉerko, kaj zorgeme reglatigis la elpendantajn borderojn de l' kadavra tuko. La ĝardenistedzino kondukis min antaŭen, sed jam malsupre eksonis trombonoj kaj sammomente la voĉo de la buĉisto alsonis de strato: „Barbara, estas tempo!“ La portistoj aperis, kaj mi retiriĝis, por doni spacon. Oni levis la ĉerkon, portis ĝin malsupren, kaj la procesio ekmoviĝis antaŭen. Antaŭiris la lerneja infanaro kun kruco kaj standardo, la pastro kun preĝeja servisto. Seninterspace post la ĉerko paŝis la du filoj de l' buĉisto, kaj post ili la geedzoj. La edzo senĉese movis la lipojn,

kvazaŭ li preĝus, sed dum tio ĉirkaŭrigardis dekstren kaj maldekstren; la edzino fervore legis en sia preĝaro; nur la du infanoj kaŭzis maloportunon al ŝi, ĉar nun ŝi ŝovis antaŭen, nun retenis ilin; entute, la ordo de la funebra procesio ŝajnis al ŝi la ĉefa afero. Sed ĉiam ŝi ree legis en sia preĝaro. Tiel la akompanantoj alvenis la tombejon. La tombo estis malfermita. La filoj enĵetis la unuajn manplenojn da tero; la edzo faris samon; la edzino genuis kaj tenis sian libron proksime antaŭ la okuloj. La enterigistoj plenumis sian oficon, kaj la procesio, duone disirante, foriris. Ĉe la pordo fariĝis ankoraŭ malgranda interdisputo, ĉar la edzino juĝis unu postulon de la aranĝisto de tenebraj ceremonioj tro altepreza. La akompanantoj disiris ĉiufanken. La maljuna muzikisto estis enterigita.

Post kelke da tagoj — estis dimanĉo — mi, incitata de psikologia scivoleco, aliris la loĝejon de la buĉisto, pretekste, ke mi dezirus aĉeti la violonon de la maljuna muzikisto kiel memoraĵon. Mi trovis la familion kune, sen ia postsigno de restinta aparta impresio. Tamen, la violono, ordigita kvazaŭ laŭ simetrio, pendis ĉe muro apud la spegulo kaj krucifikso. Kiam mi sciigis mian deziron kaj proponis proporcie altan prezon, la edzo ne ŝajnis neinklina fari

profitigan komercon. Sed la edzino rapide ekstariĝis de seĝo, dirante: „Ne! Tute ne! La violono apartenas al nia Jakob, kaj kelke da florenoj pli aŭ malpli ne estas diferenco por ni!“ — Kun tio ŝi deprenis la instrumenton de l' muro, rigardis ĝin ĉiuflanke, forblovis polvon de ĝi kaj metis ĝin en tirkeston, kiun ŝi, kvazaŭ ŝi timus rabon, fortike enŝovis kaj ŝlosis. Ĉar dum tio ŝia vizaĝo estis deturnita de mi, mi ne povis vidi ĝian mienon. Ĉar sammomente eniris la servistino kun supujo, kaj la buĉisto, sen ĝeno pro la vizito, per laŭta voĉo ekkomencis manĝopreĝon, kiun la filoj laŭtege kunkriis, mi deziris „bonan manĝon!“ kaj eliris tra pordo. Mia lasta rigardo trafis la edzinon; ŝi estis returninta sin, kaj mi vidis, ke larmoj kvazaŭ laŭrivere defluis sur ŝiaj vangoj.



Friedrich Halm

DU AMIKINOJ

Antaŭparolo.

Friedrich Halm, pseŭdonimo por la drama poeto Eligius Franz Josef Freiherr von Münch-Bellinghausen, kiu naskiĝis en la jaro 1806 en Krakovo kaj fariĝis en la jaro 1845 unua gardisto de la imperiestra kortega biblioteko en Wien. En la jaro 1861 li estis farata dumviva membro de aŭstria parlamenta ĉambro de nobeloj, kaj de l' jaro 1867 ĝis 1870 li funkciis kiel ĝenerala intendanto de la kortejaj teatroj en Wien. Li mortis en Wien la 22-an de majo 1871. Li distingiĝis precipe per bonega versfarado kaj kreado de interesaj personecoj kaj scenoj; sed li ankaŭ prezentis en siaj dramoj problemojn originalajn, kiuj estis multe aplaŭdataj, kvankam oni ne povis ĝuste kompreni ilian klarigon. La plej konataj el liaj dramoj estas „Der Sohn der Wildnis“, „Griseldis“, „Der Fechter von Ravenna“, kaj la komedio „Wildfeuer“. El liaj poeziaĵoj estas plej bone konataj la du noveloj „Die Marzipan-Liese“ (La marcipano Elinjo), kaj „Die zwei Freundinnen“ (La du amikinoj), kies esperantan tradukon ni jen prezentas al la Esperantista gelegantaro!

M ü n c h e n.

L. E. Meier.



La grafo de Ormond estis, en aŭtuno de l' jaro 1644, nomata vicreĝo de Irlando, pro la venkoj kiujn li gajnis kontraŭ la irlandaj ribeluloj, sed baldaŭ poste vokata London'on, por tie partopreni je grava interkonsiliĝo de la reĝa konsilistaro. En Anglujo kaj Skotlando, la tumultoj, kiuj poste kaŭzis la morton de Karlo la unua sur la eŝafodo, jam atingis altan gradon; sed en Irlando la movado provizore haltis, pro la tiel decidema kiel saĝa konduto de l' grafo de Ormond; pro tio la grafo forlasis sian amatan edzinon Elisabeth, tute trankviligita pri ŝia sekureco, sed nur timanta, ke ŝi sentus sin des pli soleca dum lia forestado, kiu antaŭvideble daŭrus kelke da semajnoj, eĉ eble unu monaton, ĉar, ĝis nun, dum dekkvarjara edzeco, kaj eĉ dum la foresto de l' grafo en milito, ŝi apenaŭ estis apartigita le li pli ol kelke da tagoj. Sed ankaŭ tiu timo fariĝis senkaŭza pro la ĝoja sciigo, kiun li ricevis baldaŭ post sia alveno London'on, ke la plej intima juneca amikino de lia

edzino, Lady Isabella Rich, intencis pasigi kelke da semajnoj kiel gasto en Kilkenny Castle. Tiun ĉi tre bonvenantan sciigon la grafo tuj respondis per karesa kaj bondeziranta letero, laŭ kiu li juĝis kiel apartan favoron de l' ĉielo, ke dum lia foresto lia edzino havus la societeton de sinjorino, kiu tiel estis la plej amata persono por sia edzino Elizabeth, post edzo kaj infanoj, kiel ŝi mem ŝajnis al li ĉiam kiel la krono de sia sekso.

Dum tiamaniere la grafo kun senŝargita koro dediĉis sin al la ŝtataj aferoj, kiuj de unu tago al alia komplikiĝis pli kaj pli malagrable kaj minacante, grafino Elizabeth en Kilkenny Castle ĉiutage kun pligrandiĝanta senpacienco atendis la horon de reunuiĝo kun amikino, kiu travivis kun ŝi la ĵarojn de ŝia juneco kun simpatio kaj zorgado, helpeme asistis ŝin per konsilo kaj ago dum grava embarasego, kaj kvankam pli maljuna kaj matura, tamen ne nur partoprenis, sed eĉ mem superis la reveman inklinton de sia plijuna kunludantino. Fine, iun tagon, suprenturniĝantaj nuboj de polvo anoncis la alvenon de la sopire atendata sinjorino, kaj peza palankeno, ĉirkaŭita de rajdantaj servistoj, proksimiĝis la kastelan pordegon, sur kies sojlo la grafino kun batanta koro atendis la momenton, kiu redonus al ŝi la longtempe

mankintan amikinon. Lady Isabella tamen, dum la multjara diseco de la du amikinoj, nur malofte kaj mallonge intermitinta, tiom decide kaj frapante aliiĝis, ke la grafino, dum la unua momento de la revido, staris antaŭ ŝi kvazaŭ antaŭ fremdulino, treege frapita kaj surprizita, mireganta kaj senparola, kun larĝe etenditaj brakoj. Tamen, Lady Isabella ne ŝajnis, kiel kutime fraŭlaj virinoj, antaŭtempe maljuniĝinta, kvazaŭ ŝi estus nur ombro de si mem, sed, vere, kun la plej granda ĉarmo de virina beleco, spite de malfavora vojaĝa kostumo; krom tio, ŝiajn graciajn trajtojn tamen kovris tia rava paleco de spirita matureco, kaj la antaŭa petoleca brilado de ŝiaj bluaj okuloj nun fariĝis tiel lumanta radiado de pensema melanholio, plue, ŝiaj lipoj montris tiel konvinke la dolorecan rideton pro akraj sed venke superitaj animaj bataloj, kaj tia estis la indeco kaj graveco de ĉiuj ŝiaj gestoj, ke la grafino preskaŭ sentis inklinon, ĵeti sin antaŭ ŝiaj piedoj, kvazaŭ antaŭ ĉieleca aperaĵo; sed baldaŭ Isabella per laŭta ekkrio de ĝojo ĉirkaŭprenis la longtempe ne viditan amikinon kaj premis ŝin al sia koro.

Kiom frapanta kaj timetiga ajn la mistera raveco de la ĉioma estaĵo de Isabella, kovranta ŝin kvazaŭ lunlumo, efikis al la grafino, tamen,

post malmulte da horoj de intima interparolado, ŝi des pli forte sentis impresata sin, ĉar el ĉiu parolo kaj mieno de la amikino ŝi divenis la malnovan fidelan koron de Isabella, kiu ŝajnis plinobligita de esprimo, pliklarigita de sento, sed nealiigita koncerne bonvolon kaj amon. Kaj pro tio malaperis ĉiu nuanco de retenigo el la animo de la grafino; eĉ la suspekto de la lastaj jaroj, kvazaŭ Isabella intence estus evitinta kunvenon kun ŝi kaj ŝiaj familianoj, nun ŝajnis al ŝi malgrandanima kaj efektive refutita. Kvankam eĉ Isabella ne tute same redonis la senkondiĉan konfidecon, kiun la grafino pruvis kontraŭ ŝi, kaj precipe evitis evidente preparolon de sia frapanta aliigo de post siaj junecaj jaroj, tamen la grafino pardonis tiun retenigon pro la timemo, kiun kredeble sentas ĉiu homo, malfermi per sciigoj apenaŭ resaniĝintajn vundojn; ĉar ŝi sentis sin konvinkita, ke nur tiaj vundoj povis tiom aliigi sian amikinon; ke tiu ĉi, filino el unu el la plej riĉaj gentoj de l' lando, kaj heredontino de granda riĉaĵo, povis decidiĝi, rifuzi la multon da svatiĝantoj kaj fraŭle atendi la aŭtunon de sia vivo.

Ĉirkaŭe dek tagojn post la forveturo de l' grafo, dum bela aŭtuna mateno, la grafino translasis sin, senlabore, al siaj pensadoj. Ŝiaj filinoj, tri ĉarmaj, flamanimaj kaj vivaj knabin-

etoj, ĵus estis promenantaj kun sia gubernistino; ĉe la kontraŭa muro pendis la portretoj de ŝiaj filoj, de gajaj, freŝaj knaboj, kiuj studadis en Oxford. Pro la feliĉegiga sento de sia patrina feliĉo, la grafino ne povi rezigni, plendi la maldolĉan sorton de sia amikino, kiu rifuzis al si tiajn ĝojojn. Ŝia antaŭa juneco aperis antaŭ ŝi dum ŝiaj revoj, kvazaŭ nur hieraŭ travivita, lume kaj brile, kaj ŝi ridetante memoris la mortigan malamon, per kiu la kvindekjara sinjorino Elizabeth Breston tiam persekutis James Butler'n, ŝian nunan edzon; ĉar Elizabeth estis la heredintino de la grafo de Desmond, kaj pro tio kredis esti devigata, konservi la malamon de tiu familio kontraŭ tiu de Butler. Tiam, ĉarme ekruĝigante, ŝi rememoris la tagon, kiam ŝi unue vidis, ĉe kortego, sian edzon, kiu tiam havis la titolon de vicgrafo de Thurles; kaj la ravo de lia vireca beleco, la kavalireca ĉarmo de lia estaĵo kaj la flama pasio de lia amindumado tiom katenis ŝin, ke ŝi pli poste ne rifuzis lin, eĉ kvankam ŝi, kun teruro, ekkonis lin kiel mortigan malamikon, nome anon de la gento de Butler! Ŝi konvinkiĝis, sen granda peno, ke ne nur kristana devo, sed ankaŭ ŝia persona utilo postulis, ne nur por ĉiam forigi la antaŭan malamon de la gento Desmond kontraŭ tiu de Butler, sed ankaŭ la senfinajn

jurajn disputojn, kiuj dum jaroj okupis ambaŭ la familiojn, per la unuiĝo kun la elektita edzo. Poste — kaj nun ŝia frunto sulkiĝis pro mal-kontentego — tiam ŝi memoris reĝon Jakob, kiu ne volis, ke la gento de Butler pliriĉiĝu per la heredaĵo de la gento Desmond, kaj mal-permesis tiun edziĝon. Ŝi memoris la kruelan obstinegecon, pro kiu li, por forigi ŝin de iu proksimiĝo al la amato, transdonis ŝin al la kuratoreco, aŭ, pli bone dirote, al la gardo de l' grafo de Holando, kaj kiamaniere tiu ĉi kva-zaŭ retenis ŝin en mallibereco en la kastelo Eldon Manor.

Sed tie ŝi konatiĝis kun Lady Isabella Rich, la nepino de la grafo, tiam gaja, vigla kaj pe-tolema knabino, kaj gajnis ŝian amikecon. Kaj Isabella — ŝi tion memoris kun larmoj de dank-ema kortuŝeco — helpeme interesiĝis pri ŝi, trompis la gardemon de ŝia ĉirkaŭo, eĉ ebligis al ŝi sekretajn kunvenojn kun la amato, ĝis kiam tiu ĉi, post kiam li ĝajnis por si subaĉete la avidemajn favoratojn de la malenergia reĝo, per promesoj kaj donacoj, post unu jaro de do-loraj embarasegoj kaj gravaj bataloj, prosperis akiri la konsenton de la reĝo por ŝia edziniĝo. De tiu momento — ŝi pensis tion kun rigardo de intima amo al la portreto de sia edzo, kiu alridetis desur la muro, — ŝia vivo estis nur

unu daŭra somera tago, kaj dekkvar jaroj pasis por ŝi kiel feliĉega revo! Kaj kia aŭtuno de plej riĉa beno, plenega de riĉaj fruktoj, kia pleno da feliĉo ankoraŭ atendis ŝin! Ĉar ŝia edzo, glora generalo, ankoraŭ pli glora kiel ŝtatis- to, ne nur indigata de l' konfido de sia reĝo, sed ankaŭ ĉiusence inda de ĝi, jam estis dum flor- anta viraĝo grafo de Ormond kaj vicreĝo de Irlando kaj dum venontaj jaroj sendube devis fariĝi pli eminenta per indoj kaj honoroj; kaj ŝi mem, riĉa, respektata, potenca, patrino de kvin tre talentaj, florantaj infanoj, sed tamen — kontentiga rigardo al spĝgulo ja pruvis tion — ankoraŭ kun nevelkinta beleco, kiu eĉ superis tiun de pli junaj virinoj; certa pri la nepasema amo de sia edzo, la plej bela kaj eminenta viro de lia tempo, kaj kiun ŝi mem amis per ĉiuj fortoj de sia animo!

Piedbatoj de ĉevalo, aŭdiĝantaj en la kastel- korto, intermitigis ŝiajn revojn, kaj, kvazaŭ la ĉielo volus verŝi ankoraŭ pli da ĝojo en la plen- egan pokalon de ŝia feliĉo, oni anoncis al ŝi, ke Philipps, la privata sekretario de l' grafo, alvenis kaj volis transdoni al ŝi leteron de ŝia edzo. Efektive tuj poste palvizaĝa timema juna viro, nome Philipps, staris antaŭ la grafino, kiu tiom demandis lin pri la bonfarto, mieno kaj humoro de la grafo, ke li apenaŭ trovis okazon

por respondi kaj fine eliris kaj kun profunda riverenco prezentis al la grafino malgrandan leteron sigelitan per la sigelo de l' grafo. Sed kiam ŝi legis la surskribon sur la kuverto: „Al mia plejamata Elizabeth“ kaj ekkonis la skribkarakteron de sia edzo, ŝi intermitigis la interparolon kun la sekretario, kiu ĵus volis sciigi ŝin pri sia komisio en Dublin kaj aliaj, nune por ŝi tre indiferentaj temoj. Per kelke da ĝentilaj vortoj ŝi forpermesis lin kaj ĵetis sin en apogseĝon en la arkaĵo de l' balkonaĵo, por kun maldistreco kaj kvieto ekscii la enhavon de la dolore sopirita kaj ĝojege ricevita letero. Tamen, apenaŭ ke ŝi rompis la ciron de l'sigelo kaj rapide tra legis la folieton, ŝi, kiel pikita de vipero, ekskuiĝis, lasis fali la folieton kaj tremante kaj palvizaĝe rigardis fikse antaŭ sin per larĝe malfermitaj okuloj, kvazaŭ iu fantomo subite terure leviĝus antaŭ ŝi. Fine, post iom da tempo, forviŝante la malvarman ŝviton de sia frunto, kaj kvazaŭ ekvekiĝanta el profunda sonĝo, ŝi ree ekprenis la folieton kaj kun ŝanceliĝanta mano legis jenon:

„Kara Lady!

Mi ĉesigas la silenton kiun vi al mi ordonis kaj kiun mi dum jaroj fidele konservis, por sciigi vin pri io, kio trankviligas mian konsciencon kaj same devas konvinki

vin, ke la ĉielo plenumis niajn petojn kaj favore akceptis nian pentadon kiel kompenso de nia peko. Vizito en la „George College“ de Cambridge donis al mi tiun trankviligon, kaj la unuanima konstato pri la grandaj talentoj kaj kapabloj, kiel ankaŭ pri la bonanimeco, diligenteco kaj modesteco de nia William, ankaŭ trankviligu vin! William estas la ornamo de la instituto, la fiero de siaj instruistoj, la amato de siaj kunlernatoj! La ĉielo benis nian infanon, tial Li ankaŭ pardonis min, nek ordonas al ni alian pentofaron pro nia erariĝo, ol nur jenan: ke ni sekrete kaj kaŝe devas prizorgi la estontecon de la ĉarma esperiga knabo! Ni akceptu tiun gravan provadon kun humileco, kiel ĝis nun, kaj vi unuigu kun mi en preĝado por la bonfarto de nia infano!

James, grafo de Ormond“.

La grafino ripete relegis, tiam kunfaldis la folieton kaj kun mallevita kapo fikse rigardis antaŭ sin. Tio do ne estis ŝerco, la grafo nepre ne povis permesi al si tian ŝercon! Verŝajne li interŝanĝis du memskribitajn leterojn, post kiam li estis sigelinta ilin, kaj surskribis ilin per falsa adreso! Kaj la sinjorino, al kiu tiu ĉi

letero estis destinita, la sinjorino, kun kiu la grafo, laŭ lia, ho! tre klara konfeso, estis pekinta, kiu ŝi estas? Dum ilia edzeco la grafo neniam donis al ŝi kaŭzon de dubo pri sia fideleco! Krom tio la knabo, la frukto de tiu peko, almenaŭ havis dek tri aŭ dek kvar jarojn kaj tial necese devis esti naskita antaŭe, ol dum la komenca tempo de ŝia edzeco kun la grafo; kaj pro tio — terura suspekto ekkaptis ŝin kaj kuntiris dolorige ŝian koron. Ŝi devis certigi sin; ŝi sonorigis por alvoki serviston kaj ordonis al li, ke li alvenigu al ŝi la sekretarion. Atendante lian alvenon, ŝi trapaŝis, kiel plumo agitita de ventego, nun kun maltrankvila rapideco, nun per dubece prokrastemaj paŝoj, la spacon de l' ĉambro; sed, kiam de ekstere paŝoj proksimiĝis la pordon, kaj la atendita aperis sur la sojlo, ŝi duone ŝanceliĝante apogis sin per la tableto, sur kiu kuŝis la fatala letero, kaj, antaŭ ol la sekretrario povis paroli, tuj ŝi lin demandis, ĉu li jam transdonis la leteron, kiun la grafo donis al li por Lady Isabella Rich? — „Lady — Isabella — Rich“, balbute, frapite diris la sekretario, dum lia vizaĝo purpure ekruĝiĝis kaj liaj rigardoj kiel helpon serĉantaj eraris ĉirkaŭen. — „Vere; ja! Al Lady Isabella Rich!“ diris la grafino, mortpala sed nekurbite sin tenante, kaj proksimiĝis al li. „Tion mi al-

menaŭ eksciis el la letero de mia edzo!“ Kaj kun tio ŝi tiel akre kaj trapenetrante rigardis la sendecidan kaj senkonsilan sekretarion, ke tiu ĉi fine, rezignante iun pluan elturniĝon, ne nur konfesis, ke li transdonis leteron de la grafo al Lady Isabella, sed ankaŭ, por senkulpigi sian embarason, aldiris, ke li devis ĵure promesi al la grafo, nepre ne sciigi iun ajn personon pri la letero de li al Lady Isabella. Pro tio, la grafino ankoraŭ pli paliĝis ol ŝi jam estis, kaj ŝiaj lipoj moviĝis kiel por ploro; sed retenante sin, ŝi intermitigis la plujajn senkulpiĝojn de la sekretario ekstreme konfuza per favora kapa balanco, kaj turnis al li la dorson, senakcente dirante: „Vi do devus scii, Philipps, ke mia edzo ne havas iun sekreton kontraŭ mi!“

Sed, kiam la sekretario, foriranta kun multe da riverencoj, fermis la pordon post si, la grafino, ĵetinta sin en apogseĝon, translasis sin, sen iu sindevigo, al la tuta pasieco de sia doloro. Ŝi ja estis perfidita, kaj perfidita de la du personoj, kiujn ŝi plej senkondiĉe fidis, nome de la amato de sia animo kaj de la kunulino de sia juneco! Perfidita, sendube mallongtempe antaŭ aŭ post sia edziniĝo, certe do dum tempo, kiam ŝi ĝuste plej konvinke estis fidinta ilian fidelecon! Ekstreme trompita, precipe pri la valoro de sentoj, sur kies supoze neskuebla

fundamento ŝi fidante estis konstruinta sian tutan feliĉon de vivo, ŝi nun vidis, ke la fiera konstruaĵo, ruiniĝante, peco post peco, fariĝis abomena rubaĵo. Maldolĉe ridetante ŝi memoris la proverbon pri la gento de Desmond, kiun oni ofte, dum ŝia infaneco, diris al ŝi:

„Agas kun perfido

Ĉiu Butlerido!“

Kaj ŝi dubis, ĉu ŝi povus pluen kunvivi kun edzo, kiu povis tiel akre vundi ŝiajn sentojn, tiel malhonore perfidi ŝian konfidecon, kaj eĉ povis tiom seniĝi de ia delikateco de animo, ke li, ne nur indiferece, sed eĉ ĝoje, enirigis sian kunkrimulinon en la benatan sanktejon de ŝia domo kaj nun daŭrigis la trompon, kiun li praktikis antaŭ jaroj kontraŭ sia fianĉino, hodiaŭ kontraŭ sia honesta edzino, la patrino de siaj infanoj! Tiu ĉi konsidero fine ekskluzive okupis la grafinon. Ŝi imagis, ke Isabella, ŝia gasto kaj amikino, al kiu ŝi ankoraŭ hieraŭ plej intime konfidis siajn korajn sentojn, hodiaŭ sekrete ridus pri la naiveco de ŝi, la trompita, kaj jam antaŭĝojus pro la horo, dum kiu ŝi kun la grafo, ŝia edzo, en Kilkenny Castle, en ŝia propra domo, povus mokadi ŝian infanecon! — Ne do! Ne, tion ili ne povu! Kiel elektra frapo tiu ideo tremigis ĉiujn ŝiajn nervojn. Ŝi ekstarigis, alpaŝis la spegulon, rapide ordigis la mul-

ton da sia malhelkolora hararo, kies riĉaj plektaĵoj estis distiriĝintaj pro la furioza manipulado de ŝiaj manoj dum ŝia malespero, kaj, kun la fatala letero en mano, rapide aliris la pordon. Sed subite ŝi ekhaltis, por ankoraŭ unu fojon rapide tralegi la malfeliĉajn liniojn. — „Erariĝo, pento, pentofaro!“ ŝi parolis por si mem; „ho! nur vortoj! Hipokriteco de lipoj, dum la koroj daŭrigas pekadon! Kiu perfidis, ree povas perfidi! Neniun ajn indulgon por perfiduloj!“ Kun tio, kunfaldante la leteron, ŝi, fiere levante la kapon, ŝire malfermis la pordon kaj paŝis tra la konfuze transversigantaj koridoroj kaj haloj de l' kastelo al la apartementoj de Lady Isabella, dum ŝi murmuretis la antikvan batalan devizon de la gento de Desmond:


„Riski, batali
Honore nur fali!“

Tamen, la lasta tralego de tiu fatala letero fesi! La vorto „pento“ restis en ŝia animo, kaj pro tio ŝi, kvankam ne pli repaciĝema, sed tamen pli trankvila kaj potenca pri siaj paroloj, ol ŝi estis ĝin komencinta, alvenis la celon de sia irado.

Kiam la grafino malfermis la pordon de la ĉambro de Isabella, ŝi trovis tiun ĉi sidantan ĉe tablo, sur kiu estis duone malfermita voj-

aĝa kesteto kaj vazo, plena de floroj, el venezia vitro, apud malfermita libro, kies nigra marokena bindaĵo kaj arĝentaj fermaĵoj signis ĝin kiel edifan libron. Apogaute la kapon per mano, kaj profunde enpenisa, Isabella revante, fikse rigardis leteron, ŝajne ankoraŭ ne malfermitan, kiu kuŝis antaŭ ŝi sur la tablo. Sed, ekvidante la grafinon, kiu momenton ekhaltis en la pordo, ŝi, forte ekruĝigante, ekstarigis kiel per risorto levegita, ĵetis la leteron en la malfermitan libron, kiun ŝi rapide fermis, kaj tiam, iom post iom regajnante malkonsternecon, iris al renkonto de la amikino kun afabla rideto kaj etenditaj brakoj. Sed la grafino, per malakcepta gesto rifuzante la ĉirkaŭprenon, paŝis antaŭen ĝis la tablo, ĉe kiu Isabella estis sidinta, kaj tiam malrapide, akre akcentante ĉiun vorton, kaj per akra sentenco diris: „Lady Isabella! Trompita per la malĝusta surskribo, mi malfermis leteron, kiun mia edzo direktis al vi, kaj mi legis ĝin! Jen ĝi! Prenu do tion kio estas via, kaj redonu al mi tion kio estas mia!“ Kaj post tio ŝi prezentis, per unu mano, al ŝi la leteron, dum per la alia ŝi prenis la leteron el la libro! Sed ŝi ne malfermis ĝin, sed, post kiam ŝi rigardis sigelon kaj surskribon, ŝi fikse direktis siajn okulojn, brilantajn pro kolero, sur la vizaĝon

de Isabella, kiu, ekhaltiĝante kaj tremante tutkorpe, tenis antaŭ sin la fatalan folieton, kiun ŝiaj larĝe malfermitaj okuloj ŝajnis reteni per supernatura forto. Sed kiam ŝi fine, pro la eksciteco de l' momento, malfortiĝis kaj, kun konvulsia singultado refalis en la apogseĝon, la grafino, kun esprimo de nedirebla tedo, deturnis sin de ŝi kaj iris al la fenestro. Tie starante dum kelke da momentoj, dum nur la dolora ĝemado de Isabella intermitigis la silenton de la ĉambro, ŝi, rapide returnante sin, kun trankvila indiferenteco diris: „Jen mi vidas Storrison, vian ĉevalestron, alveni en la korton! Ĉu vi volas diri al li, ke li pretigu la palankenon por via forvojaĝo? Aŭ ĉu mi diru tion?“ — Kaj kun tio ŝi per rapida paŝo aliris la pordon; sed, antaŭ ol ŝi povis atingi ĝin, Isabella salte ekstartiĝis, ĵetis sin antaŭ ŝin kaj, levante la manojn, kvazaŭ repelante, kontraŭ ŝi, tremante diris: „Ne, vi ne foriru, Elisabeth! Vi min aŭskultu! Vi ne juĝu min kiel kulpa, dum mi nur estis malfeliĉa!“ — Kaj kiam la grafino, repuŝiĝante por eviti ŝian tuŝon kiel tiun de vipuro, nun ordone alkriis al ŝi: „Donu spaccon! Vi unufoje trompis min kaj ne retrompu min plu!“ tiam Isabella, plej pasie ekscitite, ĵetis sin sur genuojn antaŭ ŝi kaj, per voĉo duone sufokata de larmego, kun freneza perforto ek-



kriis: „Vi devas aŭdi min! Vi ŝuldas tion al vi kaj al via kredo pri homa valoro; tio decas vin pro viaj infanoj, kiuj ne iel devas dubi la memoron de sia patro, kaj pro via konscienco, la netuŝata paceco de via morta horo; ĉar vi devas aŭdi antaŭ ol vi juĝas, ekzameni antaŭ ol vi kondamnas!“

La grafino, dubanta, ĉu la terura eksciteco de Isabella estis serioza kaj vera, aŭ nur bone ludata kaj ŝajnigata, iom rigardis malsupren al la genuanta amikino, sed fine pli dolĉaj sentoj tamen superis ŝin. „Bone, mi volas aŭskulti!“ ŝi diris kaj sidiĝis en apogseĝon, dum Isabella, pene restariĝante, ŝancele aliris seĝon, sur kiu ŝi, kun disligita hararo, tute senenergia, kaj sensukcese klopodanta ĉesigi la nehaltigeblan larmaron, sidis longtempe silenta kaj pene spiranta, kaj tiel prezentis aspekton de senkonsola ĉagrenego.

Dum iom da tempo nepra silento estis en la ĉambro, ĝis kiam Isabella subite, kvazaŭ parolante al si mem, ekdiris jenon: „Ne estis do malsaneca, infaneca avido, kiu puŝis min alveni tien ĉi, nek estis malprudenta malforteco, cedi ĝin! Dio postulis, Dio volis, ke mi per sincera konfeso pentofaru pro mia peko; Dio kondukis min al la ofendita virino, por ke mi malkaŝu antaŭ ŝi la malhonton de mia animo! Dio tiel dispo-

nis, lia dispono estu laŭdata!“ — Sed tiam, metante manon al la frunto, kvazaŭ por kolekti siajn pensojn, ŝi daŭrigis: „Ĉion vi sciis, Elisabeth, ĉion, kiel ĝi estis kaj fariĝis, de l'komenco ĝis la malgaja fino, la malfeliĉon de unu momento kaj la penton de longaj jaroj!“ — Ree ŝi silentis dum iom da tempo, ĝis kiam fine ŝi, fiksante rigardojn kvazaŭ malproksimen, komencis, per premata voĉo, paroli jenon: „Mi havis dek sep jarojn kaj kun mia malsaniĝema patrino vivis en Londono. Tiam mi estis alia karaktero ol nun, eĉ alia ol tiam, kiam vi konatiĝis kun mi, antaŭ jaroj! Mi estis sovaĝa, perfortema, obstina, ne kapabla cedi iun devigon, kaj tiom kolerigita per la senmezura rigoreco de la puritanaj tendencoj de mia edukado, aŭ tiom negvidebla laŭ naturo, ke eĉ la unuaj perfortaj atakoj de malsano de mia patrino (ŝi pli poste mortis pro ĝi) ne povis daŭre retenigi min, nepre kaj iamaniere havigi al mi la kontentigon de ĉiu avido, ĉiu kaprico, kiun mi eksentis. Tia avido estis la vizito de teatro, kiun eĉ nur citi, estis, en mia gepatra domo, konsiderate kiel puninda facilanimeco, kaj kiun mi, ĝuste pro tio, decidiĝis ekkoni ĉe iu ebla venonta okazo. Tiu ĉi okazo baldaŭ troviĝis. Iun tagon mia patrino, post unu el la teruraj atakoj de sia malsano, esprimis la bezonon de kvieto, kaj ĉar

tiuokaze ŝi kutimis refortiĝi per dormado dum tuta tago, mi havis plenan okazon por plenumi mian intencon. Mi havigis al mi viran vestaĵon, kaj, vestita per ĝi kaj per ĉapelo plej eble malsuprenigita ĝis sur la frunton, mi, dum nebula, malagrabla aŭtuna vespero, sekrete aliris la „Globe“-teatron, en kies plenegaj spacoj mi serĉis kaj trovis lokon, kiu permesis al mi liberan rigardon al la scenejo, sed tamen kaŝis min antaŭ la rigardoj de la ĉeestantaro. Oni, tiun ĉi vesperon, prezentis unu plej ŝatatan dramon de Shakespeare, nome „Romeo kaj Julia“, kaj, apenaŭ ke la kurteno de la scenejo disiĝis, la nemortemaj paroloj de la majstro, kiuj tiam la unuan fojon trafis miajn orelojn, okupis mian koron tiel, ke mi tute eksentis liberigate de iu timo; tute forigata el la realeco kaj tiel ensorbata de la superanta impreso de la mirinda poezio, ke, eĉ dum la aktinteraĵoj, mi, tute ebriega de ravo nur revadis maldorme. Pro tiu stato mi nur sentis kiel maloportunan distron, sed ne kiel minacantan danĝeron, la malcivilizan alpremiĝon de mia apudulo, de duone ebria maristo. Ja, mi eĉ sentis dankon al mia malgracia apudulo ĉar li, per siaj largaj ŝultroj, faris al mi vojon tra la ondiĝanta homamaso, kiam mi, post fino de la prezentado, duone senkonscia, kiel ebria, ŝanĉeliĝe aliris la alirejon

de la halo. Alveninte eksteren kaj rekonsciigata per la freŝa nokta aero, mi klopodis, plej-rapide kaj sekrete reiri hejmen tra la senhomaj placoj kaj malplenaj stratetoj, tra kiuj mi estis alveninta, kiam subite mi sentis min ekhaltigata per fortika mano, kiu larĝe kaj kvazaŭ ferece kaptis min ĉe ŝultro. Estis mia apudulo, kiu, sufiĉe sagaca por diveni mian sekson, sed ne sufiĉe grandanima por kontentiĝi per mia danko pro la servo kiun li faris al mi en la interpreniĝo, nun kun insolenta malhonto klarigis al mi siajn pretendojn pri mia dankemo. La arogantegaj diroj koncerne la maniero, laŭ kiu li deziris esti dankata, la senkonsidera malĝentileco, per kiu li, spite ĉiu mia kontraŭbatalo kaj defendo, ĉirkaŭprenis min, tiom min maltranviligis kaj timigis, ke, forgesante mian kostumon, mi laŭvoĉe kriis pro helpo. Subite iu fortika mano ekkaptis mian atakanton ĉe la nuko kaj ĵetegis la duone ebriigiton per potenca puŝo antaŭen en la straton. Mi, elĉerpita kaj singultanta, apogis min en la arkaĵon de enirejo, kien mi estis rifuĝinta, dum mia protektanto, kun mano ĉe tenilo de sabro, staris apud mi kaj, kun trankvila, firma sinteno, atendis la atakon de la kontraŭulo. Sed kiam tiu ĉi, pene leviĝinta de l' falo, nur intencis, plejeble rapide forkuri, mia savinto turnis sin al mi, demandis

min, kien li devus konduki min, por iri hejmen; kaj post ekscio, prenis min tremantan per brakon kaj ne plue iel parolante al mi akompanis min sur la plej mallonga vojo al mia loĝejo. Ne pli frue, ol kiam ni atingis ĝin, kaj li, rifuzante la esprimon de mia danko, diris adiaŭ al mi, li sentis motivon aldiri kelke da paroloj bonintencaj koncerne la danĝerojn, kiujn povas kaŭzi al junaj sinjorinoj tro viva imageco, kaj esprimi la esperon, ke la rezulto de tiu ĉi mia unua entrepreno senavidigus min por ĉiam pri similaj aventuroj! Kun tio li foriris de mi! — La nokto estis tiel malluma, ke mi ne povis vidi la vizaĝon de mia savinto; sed lia sinteno kaj lia tuta konduto supozigis al mi junecon kaj gracion. Kontraŭe, mi daŭre kaj neforgeseble konservis la sonon de lia voĉo, kaj ĝia bonsoneco tiom potence eniĝis mian tutan animon, ke ĝi ankoraŭ post semajnoj, eĉ monatoj resonis en ĝi kiel forsonanta sonorado, kaj mi, jam dum tiu unua nokto, pasigita febrante kaj sendorme, estis konvinkata, ke mi reekonus tiujn sonojn post jaroj, kaj daŭre mi devis memori la diron de l' poeto:

Ankoraŭ ne cent vortojn trinkis mia

Orelo, tamen konas mi la sonon!“

La grafino faris senpaciencaĝ geston, pro kio Isabella, ekhaltanta, turnis, kvazaŭ demand-

anta, siajn grandajn, malhelajn okulojn kontraŭ ŝin, sed tiam, subite mallevente ilin, ŝi, post mallonga silento daŭrigis jene: „Mi ne havis tempon por senintermite translasi min al miaj revoj kaj aŭskulti la internajn tonojn, daŭre sonantajn en mi, de tiu neforgesebla voĉo; ĉar la malsaneco de mia patrino kaj ŝia morto post monatoj da akra suferado, tiom plenigis mian animon de l' doloro estanta, ke ĝi lasis nur des pli malmulte da spaco al aliaj aferoj, ju pli la aliĝo de miaj cirkonstancoj okupis la tutan fortecon de mia animo. Mia onklo kaj kuratoro, la grafo de Holando, estis preninta sur sin ne nur la administradon de mia havaĵo, sed ankaŭ la gardadon de mia persono, kaj kondukinta min al Eldon Manor, kie mi, malsanema kaj emociita en la interno de mia viva estaĵo, kaj kunvivanta kun la velkinta kaj malbonhumora maljunulo, travivis unuformajn, sed neniel senlaborajn tagojn, ĉar la avareco de mia onklo sciis kiamaniere utiligi min kiel dommastrinon, kaj tiamaniere li estis ŝarginta sur min la priobservadon de sia tuta vasta mastrumo.

Tiel pasis longa, senĝoja vintro, kaj fine printempigis; kaj kun la printempo ankaŭ alvenis vi, Elisabeth! Jam dum mia soleco mi estis eksciinta la sciigon pri via inklino por la

Viscount de Thurles kaj pri la neforigebla obstinegeco de reĝo Jakob, kiu kontraŭstaris vian unuiĝon aŭ, pli ĝuste dirote, la kuniĝon de la posedaĵoj de la gento de Desmond kun tiu de l' gento Butler. La atendego, kun kiu mi esperis vian alvenon, kaj kiun tiom pravigis la ĉarmo de via ekstero, la paleco de viaj vangoj, la gracia kortuŝeco, kun kiu vi akceptis mian intereson kaj kiu jam dum la unua horo gajnis por vi mian tutan koron, sed antaŭ ĉio la interna puŝo, helpi vin, la trankvilan suferantaron, kaj kontraŭbatali la reĝan arbitrecon — ĉio ekvekis en mia koro, suferanta pro la korpemanta unuformeco de la tagoj kaj sopiranta, laŭ ĉiu ebla sento, liberecon kaj moviĝon, la malnovan puŝon nereteneblan, sperti ŝanĝon kaj aventurojn, batalon kaj danĝerojn! Vi scias, Elisabeth, ke mi baldaŭ uzis mian situacion kaj mian influon pri la servistaro de la domo, por garantii vian interkomunikon kun la amata viro, ne nur per regula letera korespondado, sed ankaŭ, poste, per sekretaj kunvenoj. Vi ankoraŭ memoros la tagon, kiam Wilson, la arbargardisto, nia konfidulo, la unuan fojon lasis eniri vian amaton tra la ĝardeno pordeto de l' parko, kaj mi lin kondukis al la pavilono, kie vi, ebria pro ĝojo, lin atendis, dum mi, por forigi la atenton de l' onklo pri nia entrepreno,

prezentis al la avida avarulo pakon da miaj kalkuloj por ekzameno. Vi scias ke, laŭ nia interkonsento, mi poste, kiam li sufiĉe estis en-sorbita de la ciferoj, sekrete foriris de li, por, laŭ via deziro, asisti vian kunvenon kiel honor-gardantino. Sed — vi ne scias, kion mi eksentis, kiam mi, foriĝinta de la diversaj demandoj de l' onklo, nun malfermis la pordon de tiu pavilono kaj ekaŭdis la ebriigajn sonojn de la neforgesita voĉo, kiu, dum la nokto de mia teatra vizito, tiel dolĉe kaj indulgeme estis admoninta min! Ne povante moviĝi, kvazaŭ ŝtonigitaj, mi ekhaltis sur la sojlo! Miaj membroj rigidiĝis, mia koro ĉesis bati, nur mia animo aŭskultis; sed mi ne komprenis, nek iel volis kompreni liajn vortojn, mi nur sentis min fiksita sur la loko per la bonsoneco de lia voĉo, kiu, kun rava bonsento min ekstremantan suprenlevis nun kvazaŭ per serafaj flugiloj, kaj forportis min fluge trans mondon kaj vivon supren al ŝtelaro! Nur kiam li eksilentis kaj nun vi komencis respondi, mi regajnis tiom da forto kaj konscio, ke mi povis eniri, kaj fermante la pordon post mi, kaŝis min en angulo de la ĉambro, kie mi, nun feliĉege revante ĉe la ĉieleca muziko de lia voĉo, nun, kiam li silentis, kvazaŭ sentis min kiel deĵetegata de ĉielo al tero, kaj ekvekiĝanta kun subita teruro, pas-

igis la horon de via kunestado. Fine vi interadiaŭis, kaj alvenis nun por esprimi vian intimegan dankon al mi, via protekta genio (laŭ via diro). Li alparolis min; mi aŭdis, sed mi ne komprenis lin; surdigita kaj duone senkonscia mi staris antaŭ li, nek riskis levi la okulojn; fine li ekprenis mian manon! Kiel fulmo ekstremitigis min lia tuŝo! — „For, for!“ mi ekkriis kaj deŝiris min, „for!“ Vi kredis ke tio estus averta alvoko pro minacanta danĝero kaj rapide disiris! Ho, ĝi estis la nekomprenita krio pro helpo de mia antaŭsentanta animo, kaj ĝi nur estis destinata por mi, mi sola!“

La grafino, kies frunto, dum tiu sciigo, pli kaj pli sulkiĝis, nun rapide kaj akre intermitigis. „Sufiĉas!“ ŝi diris, „finu! Simple kaj mallonge diru tion, kion vi devas diri, anstataŭ ol detaligi sentojn, kies priskribo devus tiom esti turmentaj por vi, kiom ili estas tedaj por mi!“

Pro tiu ĉi maldolĉa riproĉo, Isabella dolore ridetante rigardis la grafinon; forte ekruĝigante, ŝi malforte skuis la kapon kaj dolĉe kaj mallaŭte diris: „Ne, vi devas ekscii ĉiun movon de mia animo; ĉar ĝiaj sentoj estis ja la kaŭzo de mia mizero, ne mia volo nek faro!“ Iom da tempo silentinte, sed tiam perforte ekkuraĝ-

iĝante, ŝi daŭrigis: „La voĉo de mia nekonata protektinto, kiu tiam, la unuan fojon depost la fatala nokto de mia teatra vizito, retuŝis mian orelon, de tiu momento ankoraŭ pli forte, pli neresisteble efikis sorĉe kontraŭ min! Ĝiaj sonoj persekutis min, kien ajn mi min direktis, kion ajn mi ekfaris; ĝia bonsono ĉirkaŭbruis min dum tago, plenigis la sonĝojn dum nokto kaj, fortirante min de l'efektivo, ĉirkaŭvolvis min per sorĉa kateno, kiun mi des pli malmulte povis eviti, ju pli mi devis, pro manko de kuraĝo, rezigni la savontan intencon, kiu tiel ofte min ekkaptis, nome: konsulti vin mem pri mia stato! Ĉar mi timis, ke vi mokus min, aŭ eĉ juĝus kiel ĝermantan amon tion, kio nur kiel malsano alflugis min, submetante mian tutan estaĵon, sed nur lasante — kaj tion mi nepre sentis mem — mian koron sen iu tuŝo! Mi ja, vere, ne deziris, nek postulis ion! Kiom ajn superanta estis la influo kiun li efikis kontraŭ min per sia persono, sed pli per sia voĉo, tamen mi nepre ne sopiris lian ĉeeston; male: mi timis ĝin, ne nur pro la penso terura, ke li reekonus min iam poste kiel la aventureman heroinon de tiu nokto, sed, antaŭ ĉio, pro tio, ĉar mi, dum lia ĉeesto, sentis min mallibera, fortirita de mi mem, kvazaŭ katenita! Mia koro kun ĉiu ebla pasieco de vera inklino aliĝis vin; mi

ĝojis pro via feliĉo, sed neniuj ajn sentoj de envio, de malfavoro trafluis mian animon ĉe la penso de via unuiĝo; kontraŭe, mi ardadis pro avido, akceli ĝin, helpi vin en la batalado, kontraŭ la tirana arbitreco, al la fina venko! — Ne, mi ne amis lin; sed tamen mi ne povis superi min por konfesi al vi mian malfortecon; kvankam mia maltrankvilego pliiĝis, ju pli viaj kunvenoj multiĝis kaj mi, per la daŭra partopreno, trudita al mi per viaj petoj, fine sentis min ĉirkaŭvolvita de sorĉa reto kaj senigita de volo kaj konscio, eĉ, laŭ jama diro, de mi mem! Mia stato tiom pliakriĝis, ke fine ne nur la sono de lia voĉo, aŭ la flamo de lia rigardo, trafanta min kiel fulmo, ne, sed ankaŭ la nura hazarda tuŝo de iu ganto kiun li forgesis, laŭreve senkonsciigis min, kaj mi sentis miajn membrojn kvazaŭ paralizitaj kaj miajn pensojn fortiritaj en fabelan mondon, kies fantomojn mi de tiam neniam plu povis revoki al mia konscio! Kiom ofte do, post kiam mi sidis apud vi, dum horoj, palvizaĝa kaj senmova, fikse rigardanta antaŭ min per larĝe malfermitaj okuloj, vi insulte nomis min enuiga kaj dormema kaj ridis, dum vi ja devus priplori min, same kiel mi mem, dum klaraj momentoj, intime ploregis mian misteran sorton!

Dume pasis aŭtuno. Pro la komenciĝo de

la maldolĉa sezono, viaj kunvenoj malmultiĝis, eĉ via korespondado prokrastiĝis, ĉar ĉiuspecaj familiaj aferoj forvokis vian fianĉon Irlandon, post kiam li, dum multe da monatoj, en London, sensukcese klopodis gajni la favoron de la obstinema reĝo! Kaj nun, kvazaŭ pro lia foriro al la lampo de via vivo mankus oleo, vi malsaniĝis — vi scias, kiom vi malsaniĝis! Mi flegis vin, sidis apud via kuŝejo, kiam malserenaj teruraj fantomoj ŝajnis ĉirkaŭi vin; mi tenis vin en miaj brakoj, kiam vi, elĉerpita de la furiozado de l' malsano, malfortiĝis, palvizaĝa, lacega kiel mortiĝanta; mi preĝadis, tordis la manojn, kiam vi kuŝadis senkonscia, en surda sensenteco rigide rigardanta antaŭ vin, dum tagoj, semajnoj! Estis malbona, ĉagrenega tempo! Dum tio alvenis kristnasko. Jam, dum malfrua vespero, Wilson, la arbargardisto, forvokigis min de l' kuŝejo, sur kiu vi, muta kaj senmova, ŝajnis dorme mortiĝanta, por sciigi min, ke li — via fianĉo, estis alveninta! Pro la manko de viaj leteroj, li alvenis de Irlando, kaj, apenaŭ ke li eksciis vian malsanecon, li senprokraste suriris ĉevalon kaj rapide alrajdis al Eldon Manĉr.

Estis maldolĉa, malafabla nokto; furioza ventego ĉirkaŭbruegis la antikvan kastelon kaj laŭnube forpelis antaŭ si la neĝon, defalantan

kiel turniĝantaj grandaj flokoj. Wilson raportis, ke la juna viro tute rigidiĝis kaj, mortige elĉerpita, apogis sin kontraŭ la parka murego; la plej proksima gastejo estis ankoraŭ sufiĉe malproksima, tiel ke la lacigita ĉevalo kaj la duone frostinta rajdanto povus pereii dum la rajdado tien; kaj li ne povis, diris li, garantii, ke ili ne trovus morton, se ne almenaŭ por kelke da horoj ili povus ripoziĝi en la kastelo! — La mizero de l' momento estis granda! La onklo ne nur estis hejme, sed eĉ ankoraŭ maldorma; tamen, la respekto, kiun sentis la servistaro kontraŭ mi, kaj la karesa kompato kiun ĉiuj sentis pro via sorto, permesis min, estas vere, kontraŭ lia scio, eĉ kontraŭ liaj severegaj ordonoj, plenumi la devon de humaneco! Mi ordonis, ke oni konduku vian fianĉon en malofte uzatan flankajon de la kastelo, provizu lin per hejtado, manĝaĵo kaj trinkaĵo, sed antaŭ ĉio donu al li, kiel la plej bonan korfortigilon, esperon de via baldaŭa resaniĝo, kvankam mi mem preskaŭ ne povis plu esperi tion.

Tiam mi aliris mian onklon, por dormigi lin per mia ĉeesto kaj parolo pri mastrumaj aferoj, kaj kiam li, laca kaj dormema, pretigis sin kuŝiĝi, mi rerapidis al via kuŝejo. Kiam mi forlasis vin, vi kuŝadis kun surda sensenteco. Kiom mi do devis miregi, kiam mi trovis vin,

kvankam elĉerpitan kaj kadukan, tamen tute konscian! Ankoraŭ hodiaŭ mi ne scias, ĉu eble vi eksciis la alvenon de via fianĉo per iu nerajtigita sciigo, aŭ ĉu via antaŭsentanta animo divenis ĝin; sufiĉas, ke vi ĝin sciis; vi jam de malproksime etendis la manojn konsumitajn kaj tremantajn al mia renkonto kaj, kun feliĉa rideto, alkriis min: „Li ĉeestas! La fidelulo, li ĉeestas! Tra ventego kaj fulmotondro, kun dangero de sia vivo, li venis al mi!“ Kaj kiam mi, timante novan atakon de febro volis forigi vin de tiu temo, vi respondis: „Kial vi trompas min? Mi scias, ke li ĉeestas! Transe, en la blanka turo, en la balkonaĵa ĉambro li estas!“ Kaj dum mi staris dubanta, treege mireganta, ĉar vi, antaŭe kvazaŭ mortiĝanta, nun sciis aferojn, kiujn mi, pro grava kaŭzo, ne konfidis al vi, vi komencis ataki min per petoj, ke mi iru por mem paroli al via fianĉo. „Pro mia amo, iru!“ vi diris; „li estas malĝoja, li suferas! Iru Isabella, por konsoli lin! Diru al li, ke lia amo redonis vivon al mi — ĉar: mi vivos! Mi scias kaj sentas, ke mi estas resaniĝinta!“

„Ĉu mi efektive diris tion? Mi opinias, ke mi nur songis tion!“ nun intermitigis ŝin la grafino, kaj meditante apogis la kapon per mano.

„Bedaŭrinde, vi diris tion“, daŭrigis Isabella,

„kaj kiam mi kontraŭstaris kaj admonis vin, eĉ proponis mem alkonduki lin al vi, vi fariĝis pli kaj pli furioza kaj urĝanta! „Iru“, vi ekkriis, „aŭ mi mortos! Iru, iru, tion mi postulas!“ Kun tio vi per febreca perforto forpremis min de via kuŝejo, kaj — mi foriris! Dio scias, ke nur la timo, pli vin eksciti kaj tiel malhelpi eblan resanigan ŝanĝon de via malsano, forpelis min! Sen iu lumo, por ke la luma brilo en preskaŭ neniam uzata parto de l' kastelo ne eble veku mian kontraŭe loĝantan onklon, mi kun premita koro kaj prokrastanta paŝado iris laŭlonge de la haloj kaj koridoroj, kiuj kondukas al la torda ŝtuparo de l' blanka turo. Sed, apenaŭ ke mi metis piedon sur la unuan ŝtupon, stranga korpremo atakis min, kiu preskaŭ senspirigis min kaj fine devigis min ekhalti! La aero kiu alblovetis min, ŝajnis esti delikata senkonsciigaodoro, kaj mi jam intencis iri returnen, sed la deziro, plenumi viajn petojn, kaj subita ekkoleriĝo pro mia infaneca malforteco, kun la espero, aranĝi ĉion per malmulte da paroloj, devigis min, daŭrigi mian iradon; tial mi rapide suriris la ŝtuparon kaj malfermis la pordon de l' balkonaĵa ĉambro.

Malbrila, necerta lumeto de duone estingiĝanta lampo kaj sufoka varmego de la trohejta kameno alvenis min. Sur seĝo mi vidis

ĵetitajn mantelon kaj ĉapelon, kaj apude glavon apogitan; sur tableto staris, apud kelkaj ŝajne ne tuŝataj pladoj, kruĉo da vino; sed li mem, elĉerpita pro la longdaŭra rajdado kaj la malbona vetero, kuŝis etendita sur kuŝejo kaj dormis. Lia vizaĝo, kvankam malforte ruĝa pro la akra aero, aŭ eble nur pro la rebrilo de la estingiĝantaj karboj de l' kameno, montris kavajn vangojn kaj doloran trajton ĉe la lipoj. Kredeble, la sciigo de via malsaniĝo forte emociis lin, kaj la konsola raporto de Wilson, ke vi jam estis resaniĝanta, permesis al li kelkajn minutojn da dormado post parto de time pasigita nokto da maldormo. Kaj, ĉu mi do intermitigu tiun ĉi bonfaran dormon? Mi ne kuragis; mi turnis min por aliri la pordon, kiam, post kelke da paŝoj, la falo de lia glavo, kiun miaj pretertuŝantaj roboj deglitis de l'seĝo, ekvekis lin! Li ekskuiĝis, ekvidis min kaj ekkriis: „Elisabeth! Vi vivas! Vi resaniĝis, estas redonita al mi!“ kaj salte alkuris min! Sed mi ne povis paroli: apenaŭ ke lia voĉo tuŝis mian orelon, ree min ĉirkaŭis la nebulo de laŭsonĝa senkonsciigado, en kiu mi kutime envolviĝis pro ĝi, kaj, kiam li tuŝas, ĉirkaŭprenas kaj altiras min al la kuŝejo, jen kvazaŭ flama torento tratremigas miajn membrojn; mi ekŝanceliĝas, miaj okuloj fermiĝas; sed li kisas

min, genuas ĉe miaj piedoj kaj ree kisas min; paroloj post paroloj kiel tiom da sorĉaj sentencoj fluas el liaj lipoj, kaj nun kraketante estingiĝas la malbrila radio de l' lampo — kaj mi estas perdita! — Kiam mi, ekvekiĝante el senkonscia kapturino, duone freneza eltordas min el liaj brakoj, jen eksonas paŝoj de l' ŝtuparo; Wilson, laŭ lia ordono admonanta lin al ekvojiro, alvenis; tra la duone malfermita pordo enbriletis la radio de lia lampo! Mia pereiginto, ankoraŭ klopodanta, min retenis, subite lasas min, ekkonas min: „Granda Dio — Isabella!“ li ekkrias kaj ŝancele repuŝiĝas, dum mi, surdigita de sovaĝa teruro, rapidege kuras malsupren la ŝtuparon kaj tra haloj kaj koridoroj forrapidas sen scio de vojo nek celo! Nur ĉe via kuŝejo mi rekonsciiĝis! Jen vi kuŝis kaj faris la dormon de resaniĝo, laŭ via promeso! Ĉirkaŭ vi estis paco, kaj feliĉega kvieto radiis el viaj trajtoj, kaj mi estis perdinta ilin, perdinta pacon kaj kvieton por estontaj jaroj, kaj interŝanĝinta ilin kun malhonoro kaj memmalŝato!“

Isabella, eksplodante de konvulsia singulto, kaŝis la vizaĝon en la manoj; sed la grafino, kies frunton, dum ŝia raportado, dubo kaj fido, kolero kaj kompatato interŝanĝe sulkgigis kaj kiel sunradioj serenigis, akre observante rigardis ŝin, ĝis kiam ŝi, post paŭzo de enpena silento,

mallonge, sed ne maldolĉe, ekdiris: „Nu, kaj plue?“

„Plue“, ekkriis Isabella, levante al ŝi la larmoplenajn rigardojn, „plue! — Ja, plue, plue antaŭen bruadas la torento de l' tempo, nek demandas, kion ĝi kunprenos, nek kion ĝi alportos! Plue, plue antaŭen tero rulas sian eternan vojon, ĉu gentoj sur ĝi ekfloras aŭ forvelkas, kaj plue, plue antaŭen puŝas la sorto la homon sur lia pilgrima vojo, ĉu li ŝiretos florojn aŭ enpremos dornojn en sian koron, kaj tiel ankaŭ mi plue vivadis, supozite ke spirado kaj la deziro, esti enĉerkigita kaj enterigita, povas esti nomata vivo! Estis mia ŝanco, ke, kvankam la morgaŭan matenon vi ekvekiĝis fortigita kaj evidente resaniĝanta, tamen neniu memoro pri la okazintaĵoj de la antaŭa nokto restis en vi, ke vi eĉ poste, kiam vi eksciis la abnegacian viziton de via fianĉo, akceptis tiun ĉi sciigon pli trankvila ol mi atendis kaj sen demando pri pluaj detaloj; ĉar tiam mi sentis min tiel neniigita en mia plej interna animo, tiel frakasita, tiel senkonsila kaj bezonanta helpon, ke nur unu via parolo estus sufiĉinta por eltiri de mi, sen iu kontraŭdiro, mian malfeliĉan sekreton! Sed vi ne diris tiun parolon, vi resaniĝis kaj vivis, en la ĝojega sentado de revenanta forto, nur por la

estanto, kun espero de l' estonta, kaj lasis al mi, ĉirkaŭruli en mia brusto, timeganta kaj malesperanta, la memoron de la pasinta terurego! Ĉirkaŭe post unu semajno, Wilson sekrete transdonis al mi leteron — ĝi estis skribita de lia mano! Mi ekfrosttrems; ĉar, kvankam alitempe tio kio devenis de li, aŭ kion tuŝis lia mano, efikis kontraŭ min kiel sorĉo kaj kaŭzis en mi la plej mirindajn sentojn, tamen nun, depost tiu terura nokto, la hazarda renkonto de tiaj objektoj plenigis min de senintenca abomeno kaj mortiga tedo, eĉ nedirebla naŭzo, kaj malvarma ŝvito kovris mian frunton, kiam mia memoro revokis al mi la sonon de lia voĉo. Tamen, mi sentis, ke mi devis devigi miajn sentojn kaj ekscii la enhavon de la letero, kaj tiel mi malfermis ĝin. Ĝi enhavis pasiecan memkulpigon kaj plendon kontraŭ la sorto kiu fortiris lin, kiu nur vivas por vi kaj per vi, al tia krima erariĝo, per malfeliĉega logo, kiun nur povis kaŭzi dormemeco kaj la ĝuado de flamiga vino, li sentis plene la gravecon de respondeco, kiun li per tio ŝarĝis sur sian animon, kaj la sanktan devon, rebonigi la malrajton faritan al mi, kaj pro tio li estas decidinta, tute nuligi sian pasintan estecon, peti de mia onklo mian manon kaj peti de mi mem mian konsenton. Kun teruro mi forĵetegis la leteron; sed ne nur la penso, ke per tiu faro

eble estus riskota via, de la ĵus resaniĝinta, feliĉo kaj eĉ via vivo; ne nur la humiliga sento, ke mi apartenus al viro kiu amas alian virinon; sed antaŭ ĉio la malinklino, la abomeno, transdoni min al li, la pereiginto, rabinto de mia honoro, entute al iu viro ajn, kaj, pli ankoraŭ la malamo kontraŭ li, ol la amo por vi, kaŭzis la ekflamiĝon de mia kolero!

De tiam, mi plitrankviliĝis; la mizero kiun li proponis al mi por la estonteco, malpliigis al mi la premon de l' estanteco, kaj la ĝojiga progreso de via resaniĝo plidolĉigis kaj igis min pli kuraĝa, ol mi estis dum la unuaj tagoj post la fatala vespero. Jen, alvenis dua letero, kiu trankvile kaj serioze plendis mian nerespondon de la unua, sed tamen pravigis mian silenton pro la duboj kiujn lia propono devis kaŭzi al mi, ĉar mi ja precize konis lian interriltaton kun vi. Post tiu ĉi enkonduko li ree konstatis, ke tiu fatala erariĝo estis nur la konsekvenco de eksciteco pliigita ĝis senkonscienco, kaj petis min esti konvinkata, ke li havas karakteron de honorama viro, kiu ĉiam sciis subordigi sian inklinon al devo kaj, laŭ lia konvinko, ne nur la amo, sed ankaŭ reciproka estimo kaj abnegacia sindonemo povus feliĉigi edzecon.

Tiu ĉi letero meditigis min, kaj, kvankam mia malinklino kontraŭ la skribinto eĉ pliigis, anstataŭ ol malpliigis dum la legado, tamen

mia prudento ekkonis, ke la sento de viro kiu proponas sian manon al preskaŭ malriĉa kaj krom tio neamata knabino, nur por reestigi ŝian honoron per la ofero de lia propra feliĉo de vivo, meritas estimon kaj respondon al lia letero. Tial mi reskribis al li, ke mi tute resignis iun ajn pretendon je lia mano, eĉ sincere pardonis lin pro la grava malrajto kiun li faris al mi, nur supozite ke li plejeble feliĉigus vin, Elisabeth, kaj tiel fidele aliĝu vin, kiel vi ĉiel ĝin meritas! Dum sama tempo al mi prosperis, ruze ekscii de mia onklo, ke la reĝo nur tial kontraŭstaris vian unuiĝon, ĉar li intencis devigi vian fianĉon al faro de iu perforta ago, pro kiu la reĝo povus rajte konfiski liajn bienojn, kies unu, nome Hawkesburg'o, jam de jaroj unu el liaj favoratoj, nome Lord Duncaster, deziras akiri. La onklo aldiris, ke la translaso de tiu ĉi bieno tuj aliigus la senton de l' reĝo, sed, pro la timemo kaj senenergieco de mia onklo, tiu ĉi promesigis min, ke mi ne sciigus vin pri tiu sekreto. Tiun ĉi promeson mi ja plenumis; kontraŭe, mi sciigis pri ĝi vian fianĉon, ĉar koncerne tiun ĉi, pri kiu li kredis ke mi tute ne konus lin, li ja ne devigis min silenti. Pro tio mi uzis papereton, sur kiu mi skribis per aliĝita skribkaraktero —“.

„Kiel? Tiu mistera papereto devenis de

vi, ĉu ne?“ nun ekkriis la grafino plejeble mi-reganta; sed tuj ŝi, strange dubante kaj spionante rigardis Isabella'n kaj diris plue: „Ĝi devenis de vi kaj havis la subskribon „Melvil“ laŭ mia scio —“

„Ne, ‚Burgoyne, fidela amiko‘ estis la subskribo!“ respondis Lady Isabella; „ĉar, kvankam mi bone sciis, ke mia nomo pli kredigus lin pri la sciigo, mi tamen ne volis ŝajni, kva-zaŭ mi kompensus malbonon per bono, kaj per tio intencus hontigi mian malamikon! Nek dum longa tempo mi restis dubanta, ĉu mia averto efikis laŭ deziro, ĉar via fianĉo baldaŭ per nova letero petegis min, ankoraŭ unu fojon pri-pensi lian proponon, kaj sciigi lin pri mia decido ĝis la oka tago; post tiu ĉi limtempo li sentus sin liberigita de iu devo kontraŭ mi kaj ne plu rezignus, konfidi sian estontecon al via mano, ĉar ŝajnas nun, ke li povos, laŭ certa maniero, gajni la konsenton de l' reĝo koncerne via unu-igo. La ricevo de tiu letero — jen ĝi estas, kaj jen ankaŭ la du antaŭaj leteroj —“ Isa-bella intermitiĝis, rapide malfermante la voj-aĝan kesteton starantan antaŭ ŝi sur la tableto, kaj prezentante al la grafino kelke da flaviĝ-intaj folietoj — „la ricevo de tiu letero, kiun mi tuj decidis neniam kvitanci per iu respondo, la unuan fojon post longaj turmentoplenaj semajnoj plenigis mian koron de nobla, sincera ĝojo

kaj redonis al mi kuraĝon kaj malĝenetecon. Vi ja estis resaniĝinta kaj denove floris kiel rozo; via feliĉo estis certa — kiom do valoris mia estonteco! Sed tiu atako de facilanima esperemo estis nur kvazaŭ sunradio antaŭ ventego! Ankoraŭ antaŭ la fino de la limtempo, donita al mi por pripenso, mi, malfeliĉega virino, sentis min — graveda! — Mi preskaŭ malesperis!

Akcepti la manon de via fianĉo estus por mi same, kiel transdoni min por vivdaŭro al neamata edzo, kun la konscio, ke li ne estus amanta min! Se mi rifuzos, mi devos, se iel mi prosperos kaŝi mian pekon, kuntreni en mi dum vivdaŭro la ŝarĝon de fatala sekreto, devos trompi, hipokriti, ŝajnigi, aŭ, se mia erariĝo publikiĝos, fini mian vivon, ŝarĝita de l' moko kaj malestimo de l' mondo, en senkonsola soleco! Tiukaze minacata de l'pereigo de via feliĉo, tiuĉikaze turmentita pro la sorto de l' malfeliĉa estaĵo, kiun mi portis sub la koro, — tie kaj tie ĉi abismo malfermiĝis antaŭ mi! Daŭre mi pripensis la kvietan, klaran lageton, kiu, malproksima de Eldon Manor, tiom ofte estis la celo de niaj vesperaj promenadoj, kaj internaj voĉoj siblis, kiom profunda ĝi estas kaj kiel malvarmete kaj pace oni povus kuŝi en ĝi. Kaj tiam mi readmonis min, ĵetis min genuen kaj ploris kaj preĝis kaj petegis ĉielon pro

forto, konsilo kaj savo! Kaj — mia petego plenumiĝis! Ĉar iun tagon mi klare ekkonis mian estecon: mi komprenis, ke la radiko de mia tuta malfeliĉo estis la troiĝo de mia fantazio, la malsaneca interna puŝo al nekutimaj kaj aventuraj agoj, kaj ke mi, anstataŭ ol superitium puŝon, nutris kaj edukis ĝin, ĝis kiam ĝi ne nur fortiris mian spiriton al ribelado kontraŭ la leĝoj de konveno kaj moro, sed ankaŭ, pro la troiĝo, elĉerpante malfortigis la potencon de mia korpo. Mi komprenis, ke Dio puŝis min en la abismon de mizereco, por ke mi, per la maldolĉeco de mia doloro, ekkonu mian eraron, kaj pento rekonduku min el nokto al lumo! Mi komprenis, ke mi ne devas eltiri min el Lia punanta mano, nek oferi fremdan feliĉon, por kaŝi mian malhonoron antaŭ la mondo; sed ke mi devis toleri ĉion sola, ĉar mi sola ja kulpigis! Di tiu momento mi estis savita; mi pasigis la limtempon, kiun via fianĉo decidis, kaj trankvile kaj sindoneme atendis la estontecon, preta, humile pentanta akcepti tion, kion ajn ĝi estus alportonta! — Sed Dio estis favora! Ĉar post malmulte da tagoj rapida sendito forvokis min al mia mortanta kuzino en Nederlandojn, kiu destinis min kiel heredontinon kaj kies okulojn mi fermu! Tie, en fremdlando, rajtigita, per la funebro pri la mortintino, retiri min tute de l' publiko, mi, en profunda soleco,

naskis infanon, kiun mi ne pli frue, ol kiam vi delonge estis edzino feliĉa, transdonis al lia patro por gardo kaj edukado, rifuzante iun ajn pluan korespondadon.

Kaj nun, vi scias ĉion! Sen kaŝemo nek plibeligo mi malkaŝis al vi la sekreton de mia vivo. Mi dum longaj jaroj pentofaris, per pentado, diseco de mia infano, kaj de vi; mi kredas ke mi kompensis ĝin per kuraĝa rezigno de ĉiuj ĝojoj de l' vivo, kiujn ajn povas doni domo kaj familio, per persista deturniĝo de ĉiuj tercaj aferoj, per severa plenumo de la devoj de l' ofico, kiu estis al mi donata; sed — la profundan senton de honto, kun kiu mi memoras mian pekon, la turmentegan maltrankvilon, kun kiu mi ĉiutage timis la publikiĝon de mia malhonoro, la nedireblan maltrankvilegon, kun kiu mi, ĝis la hodiaŭa tago, devis kaŝi la enigmecon de mia vivmaniero — tiujn ĉi turmentajn sentojn mi nur povos superi, se vi, kies rajton mi iam senvole difektis, vi, samtempe kiel mia defendanto kaj juĝisto, parolis vian decidon pri mi, absolvis min de la kulpigo de intenca malfideleco kaj konscia perfido, kaj konstatis la plej intiman ekkriion de mia animo: Senkulpa!“

Ĉe tiuj ĉi paroloj Isabella estis leviĝinta de sia seĝo kaj staris rekte sin tenanta, kun unu mano sur la brusto, la alia levita supren, kva-zaŭ ŝi volus elvoki la ĉielon kiel atestonton de

sia senkulpeco; ŝiaj okuloj lumadis kaj ŝiaj trajtoj radiadis brilantaj de kvazaŭa superteriĝo, kiun nur la plej alta entuziasmo de animo vidigas sur homa vizaĝo; sed baldaŭ la ekskuiĝo de ŝia delikata korpo, pro la plej intima emocio de ŝia animo, superis ŝian forton; senfortiĝanta ŝi reen falis sur la seĝon kaj kaŝis per manoj sian vizaĝon superverŝatan de larmoj. Sed la grafino, dume enpense traleginte la leterojn prezentitajn al ŝi de Isabella, nun ankaŭ malfermis la antaŭe prenitajn leterojn. Traleginta ĝian enhavon kun rapidemo, ŝi silente ekstariĝis, alpaŝis la fenestran arkaĵon, kie staris skriba pupitro, ekprenis plumon kaj rapide skribis kelke da linioj sur tie kuŝantan folieton da papero. Fininte la skribon, ŝi alpaŝis Isabella'n, kaj, metante manon sur la malrapide leviĝantan kapon de l'amikino, ŝi diris per voĉo kiu tremis pro plorejo: „Mi skribis al mia edzo; ĉu vi ne volas aldoni kelke da linioj?“ Kaj kun tio ŝi prezentis la folieton al Isabella. Ĝia enhavo estis jena:

„Mia estro kaj edzo!

La leteroj, kiujn vi alsendis per Philipps, alvenis; nur, la kuverto de la letero kiu portas mian nomon, enhavis la sciigojn destinitajn por Isabella, dum tiu ĉi ricevis la miajn. Ne ektimu pro tiu interŝanĝo, kiu al tiom

pripensema aferisto, kiel estas vi, nur povis okazi pro speciala destino de Dio! Mi mem, kvankam unuamomente mi sentis tre doloran impreson de la sciigo kiun mi tiumaniere ricevis, tamen benas la okazon, kiu firmigas mian opinion pri via karaktero de vera nobelo, kiu ĉiam estis preta, oferi sian feliĉon kaj vivon al la plenumo de sia devo; plue tiu okazo ankaŭ konigis al mi Isabella'n kiel la plej malegoistan, abnegacieman kaj per plej gravaj provoj pruvitan fidelan amikinson. Respondante al la bonaj sciigoj, kiujn vi ricevis pri viaj filoj, mi vin petas, ke vi ne pli longtempe malhavigu al ili ilian fraton William, kiu estas edukata en Cambridge, sed plejeble baldaŭ konduku lin Oxford'on, por ke kun frateca interamo grandiĝu tiuj, kiuj de nun posedu komune kiel vin kiel fidelan prizorgeman patron, tiel ankaŭ kiel karan, karesan patrinon, vian

Elisabeth“.

Lady Isabella tralegis la folieton, kiun la grafino prezentis al ŝi, kaj lasis ĝin fali el siaj tremantaj manoj, sen parolo de respondo; sed kiam la grafino, konfideme metanta manon sur ŝian ŝultron, ripetis la demandon: „Ĉu vi ne volas aldoni kelke da linioj?“ ŝi fikse rigardis la grafinon per larmaj rigardoj tiel timeme em-

barasite, kvazaŭ petanta helpon, ke tiu ĉi tuj ekkriis: „Ĉu vi ne volas skribi? Aŭ ĉu eble vi eĉ preferas, ke ankaŭ mi ne forsendu tiun ĉi leteron? Ho, mi komprenas vin; vi ne deziras, ke li eksciuj la turmentojn kiujn vi spertis hodiaŭ; vi ekruĝiĝas pro la penso, ke li eble, dum intime konfidanta momento, povus citi la pasintan okazintaĵon; vi deziras, ke kun la konfeso de via peko ankaŭ samtempe estingiĝu por ĉiam ĝia memoro! Vi estas prava, kaj mi agos laŭ via volo!“ — Kun tio ŝi disŝiris la folieton kaj, ame premanta la ŝin ĉirkaŭprenantan amikinojn, ŝi aldiris: „Tamen vi nun kaj por estonta tempo ĉiam estos mia plej bona amikino, fidela animo, vi! kaj via William mia kore amata filo!“

Kaj ili restis amikinoj! Kiam, post la perforta morto de l'reĝo Karlo unua, la grafo Ormond, fidela ano de sia reĝo, devis rifuĝi al la kontinento, sed la grafino devis decidiĝi, por savi la heredaĵon por siaj filoj, resti hejme, kaj dum la protektorado restadi, malproksima de sia familio, en Kilkenny Castle, tiam Lady Isabella, kiu ĝismorte restis fraŭlino, partoprenis ŝian solecon kaj kuraĝigis ŝin en ŝiaj zorgoj, kiel ankaŭ tiu konsole ŝin asistis dum ŝia funebro pro la morto de ŝia filo William, kiu dum floranta junuleco devis forlasi la vivon.

○ ○ ○ ○ ○



ENHAVO

Karl Friedrich Rumohr: LASTA SAVELLO	3
Theodor Körner: LA ŜTONEGOJ DE HANS HEILING	87
Johann Gabriel Seidl: LA BLUULINO. LA INVALIDO	113
Franz Grillparzer: MALRIĈA MUZIKISTO	145
Friedrich Halm: DU AMIKINOJ	213



15. -

1974 JUN 21.

